

Herbert George Wells

La

Nevidebla

Viro.



Verko el la publika fako.

# Personaro.

## La ĉefaj gravuloj

Adai (FrV : *Adye*) : Kolonelo konata de Kempo kaj ĉefo de la Arktea polico.

Bunting (FrV : *Bunting*) : Pastoro de Bramblehurst.

Grifino (FrV : *Griffin*) : Nomo de la nevidebla viro.

Johana Halo (FrV : *Janny Hall*) : La gastigantino de la gastejo de Bramblehurst.

---> kaj Sro Halo (FrV : *Hall*) : La edzo de Johana.

Kempo (FrV : *Kemp*) : Juna kuracisto de Arkteo.

Kuss (FrV : *Cuss*) : La empiriulo de la vilĝo.

Millia (FrV : *Millie*) : Limfata servistino de la gastejo Halo.

Roberto Ĵafers (FrV : *Bobby Jaffers*) : Policisto de Bramblehurst.

Teĉjo Henfrej (FrV : *Teddy Henfrey*) : Malgranda horloĝisto de Bramblehurst.

Tomaso Marvel (FrV : *Thomas Marvel*) : Almozulo kiu vagas en la dunoj de Iping.

## Sekundaraj gravuloj.

Ferensido (FrV : *Fearenside*) : Tiu kiu veturis la pakaĵojn

Fleĉer (FrV : *Fletcher*) : Maljunulo

Gibins (FrV : *Gibbins*) : Neprofesia pajloŝtopisto de la paroko.

Guldo (FrV : *Gould*) : la asistanta instruisto.

Helaso (FrV : *Heelas*) : La plej proksima najbaro de Kempo.


Huster (FrV : *Huxter*) : Butikisto kiu loĝas antaŭ la gastejo

Sandio Vaĝers (FrV : *Sandy Wadgers*) : Forĝisto kiu loĝas apud la gastejo.

Vikstido (FrV : *Wicksteed*)

: Murdita

kvardekkvinjara viro.



# Enhava tabelo.

01 _ Iu stranga pasaĝero.....	4
02 _ La unuaj impresoj de Teĉjo Henfrej.....	11
03 _ La mil kaj unu boteloj.....	17
04 _ Iu intervjuo.....	24
05 _ Iu ŝtelisto en la pastorejo.....	31
06 _ La meblaro kiu dancas.....	34
07 _ La fremdulo senmaskigita.....	39
08 _ Sur la irado de la Nevidebla Viro.....	49
09 _ S <sup>ro</sup> Tomaso Marvel.....	50
10 _ Vizito de S <sup>ro</sup> Tomaso Marvel al Iping.....	57
11 _ En la gastejo.....	61
12 _ La Nevidebla Viro furioziĝas.....	66
13 _ S <sup>ro</sup> Marvel diskutas sian submetiĝon.....	73
14 _ En Stoŭe-Haveno.....	76
15 _ La viro kiu kuris.....	83
16 _ "Al Ĝojaj Ludantoj de Kriketo".....	86
17 _ La gasto de la kuracisto Kempo.....	91
18 _ La nevidebla viro dormas.....	101
19 _ Unuaj principoj.....	106
20 _ La loĝejo de Granda Portlando Strato.....	113
21 _ En la strato Oksfordo.....	125
22 _ En iu ĉiovendejo.....	131
23 _ La butikoj de galerio Druri.....	138
24 _ Abortita projekto.....	149
25 _ La ĉasado kontraŭ la nevidebla viro.....	154
26 _ Murdo de sinjoro Vikstido.....	157
27 _ Sieĝado de la domo de Kempo.....	162
28 _ La ĉasisto ĉasata.....	173
Epilogo.....	180

## 01 \_ Iu stranga pasaĝero.

La fremdulo alvenis en februaro, dum nebula mateno, en kirlado de vento kaj neĝo. Li venis piede tra la duno, de la Bramblehurst stacidomo, portanta per sia mano kovrita de dika ganto, malgrandan nigran valizon. Li estis bone envolvita de la piedoj ĝis la kapo, kaj la rando de ĉapelo el mola felto lasis videti pri lia vizaĝo, nur la brilantan pinton de lia nazo. La neĝo amasiĝis sur liaj ŝultroj kaj sur lia brusto; ĝi ankaŭ aldonis blankan kreston al la sako kies li estis ŝarĝinta.

Li eniris, ŝanceliĝante, pli morta ol vivanta, en la gastejon, kaj, metante planken sian pakaĵon :

- Fajron, li ekkriis, fajron, bonkorece ! Ĉambron kaj fajron !

Li frapetadis la plandumojn, skuis en la trinkejo la neĝon kiu kovris lin, poste sekvis S<sup>ino</sup> Halo<sup>n</sup> en la saloneton por meti siajn kondiĉojn. Sen alia antaŭsigno, kaj ĵetante du suverenojn sur la tablon, li ekloĝis en la gastejo.

S<sup>ino</sup> Halo aranĝis la fajron kaj iris pretigi la manĝon per siaj propaj manoj. Gasto haltanta en Iping vintre, estis ĉieldonaco pri kiu oni neniam aŭdis paroli. Kaj plie, gasto kiu ne marĉandis ! Ŝi estis decida sin montri inda je sia bona fortune.

Tuj kiam la ŝinko estis ĝuste kuirita, tuj kiam Millia, la limfata servistino, estis iom vekita per kelkaj insultoj sagace elektitaj, la gastigantino alportis tablotukojn, telerojn kaj glasojn en la ĉambron kaj komencis surmeti la manĝilaron kiel eble plej elegante. Kvankam la fajro vigle brulis, ŝi konstatis, ne sensurprize, ke la vojaĝanto ankoraŭ gardis sian ĉapelon kaj sian mantelon kaj, rigardante tra la fenestro la neĝon fali en la korto, staris por kaŝi sian vizaĝon. Liaj

manoj ankoraŭ gantitaj estis krucitaj malantaŭ lia dorso. Li sajnis dronita en siaj pripensoj.

Ŝi rimarkis ke la fandita neĝo kiu ankoraŭ punktis liajn ŝultrojn, falis pogute sur la tapiŝon.

- Ĉu vi bonvolu permesi al mi, sinjoro, ŝi diris, preni viajn vestojn, por ilin sekigi en la kuirejon ?

- Ne, respondis la alia sen turni sin.

Ne estante certa esti bone aŭdita, ŝi estis redironta sian demandon kiam li turnis la kapon kaj rigardante ŝin :

- Mi preferas gardi ilin, li klare aldonis.

S<sup>ino</sup> Halo rimarkis ke li surhavis larĝajn blujajn okulvitrojn, kun flanke lensoj je orta angulo, kaj ke densaj vangharoj, sternintaj sur la kolumo de lia vesto, nebligis vidi ion pri liaj vangoj kaj lia vizaĝo.

- Bonege, sinjoro, kiel plaĉos al vi... Post momento, la ĉambro estos pli varma.

Li ne respondis kaj denove deturnis sin. S<sup>ino</sup> Halo, sentante siajn proponojn maloportunajn, lerte elfinis primeti la tablon kaj diligentis trotetante eliri. Kiam ŝi revenis, sia gasto ankoraŭ tie staris, senmove kiel statuo el ŝtono, ĝibigante la dorson, la kolumo relevita, la rando de la ĉapelo mallevita kaj degutadanta, la vizaĝo kaj la okuloj tute kaŝitaj. Ŝi servis per grava gesto la ovojn kun ŝinko kaj ŝi kriis, prefere ol ŝi diris :

- Via matenmanĝo estas preta, sinjoro !

- Dankon, respondis tuj la fremdulo.

Sed li ne moviĝis ĝis ŝi refermis la pordon malantaŭ si.

Nur tiam li returniĝis kaj proksimiĝis al la tablo kun ia senpacienco.

Kiam ŝi ĵus alvenis al la kuirejo, pasinte malantaŭ la verŝtablo, S<sup>ino</sup> Halo aŭdis bruon ripetita laŭ regulaj intervaloj : tak, tak, tak; tio ĉiam rekomencis; estis la bruo de kulero turnomovanta en bovlo.

- Ha, tiu knabino ! ŝi ekkriis. Nu ! Mi tute forgesis la mustardon. Estas ŝia kulpo : kial ŝi ĉiam estas tiom malrapida ?

Kaj daŭrigante mem batmiksi la mustardon, ŝi ĵetis al Millia kelkajn mildecojn pri la malavantaĝoj de la maldiligenteco. "Ĉu ŝi ne per siaj manoj pretigis ovojn kaj ŝinkon, surmetis la manĝilaron, kaj fine faris ĉion, dum Millia, Dio mia !, Dio mia !, sukcesis nur malebligi ŝin servi la mustardon ! Kaj tio, por nova gasto kiu montris intencon restadi !" Tiam la gastigantino plenigis la mustardujon kaj, ceremonie metante ĝin sur la nigran kaj oran tepleton, ŝi alportis ĝin al la salonon.

Ŝi frapis kaj tuj eniris. Tuj la fremdulo faris rapidan movon : ŝi havis nur tempon duonvidi blankan objekton kiu malaperis malantaŭ la tablo; la vojaĝanto ŝajnis levpreni ion sur la pargeto. Estis nur post esti demetinta sian pleton ke ŝi rimarkis ke surtuto kaj ĉapelo estis demetitaj kaj lokitaj sur seĝo antaŭ la fajro. Paro da malsekaj ŝuoj minacis per rusto ŝian fendron el ŝtalo. Ŝi senhezite antaŭeniris al tiu ĉi vestaĉo, kaj per tono kiu akceptis nenium neadon :

- Nun, sendube, mi povas preni tiun ĉion por sekigi ĝin.

- Lasu la ĉapelon, respondis la vizitanto per obtuza voĉo.

Turnante sin, ŝi vidis ke li levis la kapon kaj ke li sendeturne rigardis ŝin. Dum minuto ŝi observis lin rigide, tro surprizita por diri ion.

Li tenis blankan tukon, iun buŝtukon alportitan de li, sur la malsupra parto de sia vizaĝo, tiel ke sia buŝo kaj siaj makzeloj estis tute kaŝitaj : tio kialigis la mallaŭtan tembron de lia voĉo. Sed ne estis tio kio plej mirigis S<sup>inon</sup> Halo<sup>n</sup>. Fakte, la tuta frunto de la vojaĝanto, super la bluaj okulvitroj, estis kovrita de blanka bendo, alia bandaĵo, almetita sur la oreloj, ne lasis videti la plej malgrandan pecon

de la vizaĝo, se ne paroli pri iu ruĝa kaj akra nazo, ankoraŭ tiel ruĝa kaj brila kiel antaŭ momento, dum la alveno. La viro surhavis ĵaketon el malhela veluro, kun larĝa nigra kolumo, malfaldita ĉirkaŭ la kolo kaj lasanta pasi strion de subvesto. La hararo, densa kaj bruna, kiu hazarde elglitis laŭ malgrandaj tufoj, laŭ strangaj kornetoj, el sub la du krucitaj bandaĵoj, donis al la fizionomio la plej strangan aspekton kiun oni povus imagi. Ĉi tiu kapo, volvita, ĉirkaŭvindita, estis tiom malsama al tio kion antaŭvidis S<sup>ino</sup> Halo ke tiu ĉi, dum momento, ŝtoniĝis.

Li, tute ne formetis sian buŝtukon; li daŭrigis teni ĝin sub sia nazo, tiel kiel ŝi nun vidis lin, per iu maronkolore gantita mano, kaj tra siaj nepenetreblaj okulvitroj, li rigardis ŝin.

- Lasu la ĉapelon! li ripetis, duonsvene parolante tra sia blanka buŝtuko.

La nervoj de S<sup>ino</sup> Halo komencis resereniĝi post la sentita skuo. Ŝi lasis la ĉapelon sur la seĝo apud la fajro.

- Mi ne sciis, sinjoro, ke..., ke...

Kaj ŝi haltis, tute embarasita.

- Mi dankas vin, li seke eligis.

Liaj okuloj iris alterne de ŝi al la pordo.

- Mi iras tuj bone sekigi ilin, ŝi diris forirante el la ĉambro kun la vestaĵoj.

Si ĵetis lastan ekrigardon al tiu blanke ĉirkaŭvindita kapo, al tiuj senvivaj okulvitroj; la buŝtuko ankoraŭ kaŝis la vizaĝon. Ŝi iom tremetis kiam ŝi estis ferminta la pordon malantaŭ si, kaj ŝia vizaĝo esprimis ja ŝian tutan surprizon, ŝian tutan perpleksecon.

- Ne, neniam mi..., ŝi mallaŭte flustris.

Ŝi malrapidege revenis al la kuirejo, tro zorgoplena por demandi al Millia tion kion tiu ĉi ĵus umis ĉitiutempe.

La vojaĝanto sidiĝis kaj streĉis la orelon al bruo de

paŝoj kiuj malproksimiĝis. Maltrankvile, li rigardis direkte al la fenestro, antaŭ ol forigi sian buŝtukon; poste li daŭrigi sian manĝadon. Li glutis plenbuŝon, denove ekrigardis malfide al la fenestro, manĝis alian glutaĵon; poste eltabliĝis kaj, mantenante sian buŝtukon, li transiris la ĉambron kaj mallevis la rulkurtenon ĝis la alteco de la muslina kurteno kiu kovris la malaltajn vitrojn. La ĉambro estis ĵetita en duonmallumo. Post kio, li revenis, la mieno pli trankvila, al la tablo kaj al la manĝo.

"La kompatindulo spertis akcidenton aŭ operacion, aŭ ion, diris al si S<sup>ino</sup> Halo. Dio mia, kian timon li faris al mi per ĉiuj liaj bandaĵoj !"

Ŝi revigligis la fajron, malfermis stablon kaj etendis sur ĝi la vestaĵojn de sia gasto.

"Kaj liaj okulvitroj !... Certe, li mienis skafandriston plivole ol ordinaran homon !"

Ŝi pendigis la ŝultrotukon ĉe angulo de la portilo.

"Kaj li senĉese tenas tiun poŝtukon sur sia buŝo ! Li parolas tra ĝi... Eble li ankaŭ havas ion ĉe la buŝo. Kiu scias ?"

Ŝi turniĝis surloke, kvazaŭ trafita de subita rememoro :

- Ke Dio benu min ! Ŝi ekkriis subite ŝanĝante la temon.

Ĉu vi ne ankoraŭ faris tiujn terpomojn, Millia ?

Kiam S<sup>ino</sup> Halo venis por demeti la matenmanĝon de la fremdulo, ŝi estis firmigata en sia ideo ke li nepre havis la buŝon vundita kaj deformita de akcidento. Efektive, li fumis pipon kaj, dum la tuta tempo kiun ŝi restis en la ĉambro, li tute ne forlasis, por alporti la piptubon al siaj lipoj, la silkan koltukon kies li ĉirkaŭvolvis la malsupran parton de lia vizaĝo. Tamen ne estis sinforgeso ĉar ŝi vidis lin atenti la tabakon kiu baldaŭ estingiĝos.

Li estis en angulo, la dorso direktita al la rulkurteno, kaj - estanta bone manĝinta kaj bone trinkinta, estanta bone



revarmiĝinta - li parolis per malpli seka tono. La rebrilo de la flamo atribuis al liaj larĝaj okulvitroj ian ruĝrebrilon kiun ili ne havis ĝis tiam.

- Mi havas pakaĵojn en la stacidomo Bramblehurst, li diris.

Li demandis kiel li povus sendigi ilin al si. Tre ĝentile, li klinis sian ĉirkaŭvinditan kapon por danki S<sup>ino</sup> Halo<sup>n</sup> pro ŝiaj klarigoj.

- Morgaŭ!, li diris. Ĉu ne eblas havi tion pli rapide?

Li ŝajnis ĉagrenata kiam ŝi respondis ne. Ĉu ŝi ja estis tute certa? Ĉu estis neniu viro kiu volus iri tien kun ĉareto?...

S<sup>ino</sup> Halo senhezite klarigis al li la malfacilaĵojn de la lando, kaj la interparolado komenciĝis.

- Ekzistas, sinjoro, tre kruta vojo tra la duno, ŝi diris por forigi la ideon de la veturilo.

Poste, sciigante konfidencan :

- Veturilo tien renversiĝis antaŭ iom pli ol unu jaro.

Viro estis mortigita, ne kalkulante la koĉeron. La akcidentoj, sinjoro, okazas tiel rapidaj, ĉu ne?

Sed la vizitanto ne estis tiel facila por vigligi.

- Jes, efektive! li diris tra sia koltuko, observante trankvile S<sup>ino</sup> Halo<sup>n</sup> ŝirmite de sia nepenetreblaj okulvitroj.

- Ne kalkulante ke bezonas ankoraŭ longan tempon por resaniĝi, ĉu ne? Jen mia nevo, Tomo, li tranĉvundis sian brakon ludante kun falĉilo, falante suren en kampo kie oni fojnis. Dio pardonu min, li restis tri monatojn, sinjoro, sen kapabli fari ion ajn. Estas por ne kredi tion: mi ĉiam, ekde tiam, timegas falĉilojn.

- Mi komprenas tion!

- Ni iam timis ke li devis suferi operacion. Li fartis tiom malbona, sinjoro!

La vizitanto neatendite ekridis per rido kiun li ŝajnis

bridi kaj sufoki en sia buŝo.

- Ha, vere !... li eligis.

- Jes, sinjoro. Kaj estis nenio por ridi, zorgita pri li tiel kiel mi estis, ĉar mia fratino havis sufiĉe da laboro kun ĉiuj siaj infanoj. Estis bandaĵoj por fari, malfari. Tiel ke, se mi aŭdacas diri tion, sinjoro...

- Ĉu vi bonvolas doni al mi alumetojn ? subite faris la fremdulo. Mia pipo estas estingita.

S<sup>ino</sup> Halo estis abrupte haltigita. Tio ja estis malhonesta flanke de tiu ĉi sinjoro, post kiam ŝi ĵus diris al li ĉion kion ŝi ricevis kiel malagrabraĵojn !... Ŝi momente rigardegis lin, ekkonfuzita; poste ŝi rememoris la du suverenojn donitajn ĉe la alveno, kaj tio faris ke ŝi iris preni alumetojn.

- Dankon ! li faris, kiam ŝi alportis ilin al li.

Kaj li ree deturnis sin por rigardi tra la fenestro.

Evidente li estis ofendiĝema pri la temo de operacioj kaj bandaĵoj. Ŝi nenion plu kuraĝis diri, sed tiu maniero bruski ŝin incitis ŝin... Millia povis posttagmeze rimarki la kaŭzojn de tio.

La vojaĝanto restis en la salono ĝis la kvara, sen doni al sia gastigantino pretekston por eniri; li preskaŭ senĉese restis senmova, sendube sidita, en la kreskanta mallumo, fumante ĉe la lumo de la fajrejo, aŭ eble dormante. Unu aŭ du fojojn, iu atenta orelo aŭdintus lin reaktivigi la fajron; post tio, dum kvin minutoj, li paŝegis en la ĉambro. Li ŝajnis paroli al si mem. Poste la brakseĝo kraketis : li ĵus residiĝis.

## 02 \_ La unuaj impresoj de Teĉjo Henfrej.

Je la kvara, estis tute mallume. Ĝuste kiam S<sup>ino</sup> Halo kolektis sian kuraĝon per ambaŭ manoj por iri demandi al sia gasto, ĉu li deziris teon, Teĉjo Henfrej, la malgranda horloĝisto, eniris en la trinkejon.

- Vere, sinjorino Halo, jen aĉa vetero por malfortaj botetoj !

La neĝo falis pli kaj pli forte.

S<sup>ino</sup> Halo konsentis per iu kapskuo kaj rimarkis ke Teĉjo havis sian ilujon kun li.

- Dum vi estas ĉi tie, sinjoro Teĉjo, mi dankoŝuldus al vi bonvoli ĵeti malgrandan ekrigardon al malnova horloĝo en la salono. Ĝi funkcias kaj ĝi bone sonas, sed la hormontrilo obstinas indiki la sesan horon.

Montranta al li la vojon, ŝi aliris al la pordo de la salono; ŝi frapis kaj eniris.

Ŝia gasto - ŝi vidis lin enirante - estis sidinta en la brakseĝo antaŭ la fajro, duondormante laŭ tio kio ŝajnis; lia vindita kapo kliniĝis flanken. Kiel nura lumo en la ĉambro, la ruĝeta lumeto kiu venis de la fajrejo. Ĉio estis aŭ draste lumigita aŭ tute senluma. Ŝi penis des pli nenion distingi ke precize ŝi ĵus ŝaltis la lampon de la trinkejo, kaj ke ŝiaj okuloj estis ankoraŭ blindigitaj. Sed, dum sekundo, ŝajnis al ŝi ke la viro kiun ŝi rigardis, havis enorman buŝon faŭkanta, nekredeblan buŝon kiu "manĝis" la tutan malsupron de lia vizaĝo. Estis momenta bildo : iu kapo envolvita de blankaĵo, dikaj okuloj samnivele kun la frunto, kaj malsupre, iu larĝa forno.

Tiam, li movis, rektiĝis sur sia seĝo, levis la manon. Estante plenlarĝe malferminta la pordon por ke la ĉambro

estu pli bone lumigita, S<sup>ino</sup> Halo vidis lin pli klare : li tenis fulardon sur sia vizaĝo, tiel same kiel ŝi antaŭe vidis lin tenisian buŝtukon. La mallumo, ŝi pensis, trompis ŝin.

- Ĉu vi bonvolus permesi ke sinjoro venas ripari la horloĝon ? ŝi diris, superante sian konfuzon.

- Ripari la horloĝon ? ripetis la vojaĝanto, ĵetante ĉirkaŭ si malviglajn rigardojn kaj parolante super sia mano, poste, tute vekita : "Sed certe !..."

S<sup>ino</sup> Halo eliris por preni lumilon; li stariĝis kaj streĉiĝis. Tiam, la ĉambro prilumita, S<sup>ro</sup> Teĉjo Henfrej trovis sin vidalvide al la viro kun bandaĵoj. Li estis, li diris, "tute konfuzita".

- Saluton ! diris al li la fremdulo, haltigante sur li siajn okulojn de "langusto", laŭ la pitoreska esprimo de S<sup>ro</sup> Henfrej kiu tiel bildigis la okulvitrojn kun koloritaj vitroj.

- Mi esperas, diris tiu ĉi, ke mi ne ĝenas vin.

- Ne, tute ne, respondis la fremdulo. Tamen mi deziras - kaj li direktis sin al S<sup>ino</sup> Halo - ke tiu ĉambro estos ja por mi, por mia aparta agado.

- Mi pensis, sinjoro, ke vi preferus ke la horloĝo...

- Certe, certe... Sed, ĝenerala regulo, mi deziras esti sola kaj ke oni ne distru min.

Li returniĝis, ŝultroj al la kameno, manoj malantaŭ sia dorso.

- Kaj nun, li aldonis, kiam la rebonigo estos plenumita, mi volus havi teon... Sed ne antaŭ ol la riparo estas finita.

S<sup>ino</sup> Halo estis elironta - ĉifoje ŝi ne provis komenci interparoladon, por ne riski sin esti forspitata antaŭ S<sup>ro</sup> Henfrej - kiam la kliento demandis al ŝi ĉu ŝi faris preparojn pri la kofroj restitaj en Bramblehurst. Ŝi respondis ke ŝi parolis al la poŝtisto kaj ke la veturigisto alportus ilin morgaŭon.

- Ĉu vi certas ke tiu estas la plej rapida rimedo ?

Ĝi estis certa, ŝi asertis tion malvarme.

- Estas ke, komprenu..., mi tuj klarigos al vi tion kion mi ne sukcesis diri al vi pli frue ĉar mi estis tro frostiĝinta kaj tro laca : Mi estas laboristo, laboratoria helpanto...

- Ha ! vere, sinjoro ! eligis S<sup>ino</sup> Halo, tre interesata.

- Kaj miaj bagaĝoj enhavas aparatojn, ilaron.

- Ĉiujn tre utilajn aferojn, sendube !

- Nature, mi sopiras daŭrigi miajn esplorojn.

- Kompreneble, sinjoro !

- La kaŭzo por mi veni en Iping, li daŭrigis per sufiĉe decidita tono, estis la deziro de soleco. Mi volegas ne esti perturbita dum mia laboro. Krome, cetere, dum mia laborado, akcidento kiu okazis al mi... (*"Mi bone pensis tion !"* diris al si S<sup>ino</sup> Halo)... postulas ian retiriĝon. Miaj okuloj estas kelkfoje tiom malfortaj kaj tiom doloraj ke mi devas enfermi min en la mallumo dum plenhoroj, enfermiĝi per ŝlosilo. Tio, de tempo al tempo. Tamen ne dum kvaronhoro. En tiaj momentoj, la plej eta perturbo, ekzemple la eniro de iu en mia ĉambro estas por mi kaŭzo de vera turmento... Estas bone ke tio estu komprenita.

- Perfekte, sinjoro. Se mi maltimus permesi al mi demandi...

- Estas ja ĉio, mi opinias, diris la fremdulo, kun tiu trankvila kaj nerefutebla tono kiun li kapablis aŭdigi por tuj ĉesigi demandadojn.

S<sup>ino</sup> Halo devis konservi sian demandon kaj sian kompaton por pli bona cirkonstanco.

Kiam ŝi estis forlasinta la ĉambro, li stare restis antaŭ la fajrujo, atenta - S<sup>ro</sup> Henfrej raportis tion - pri la riparo de la horloĝo.

S<sup>ro</sup> Henfrej laboris, iun lampon metita tute apud li : la verda lampŝirmilo ĵetis pli brilan lumon sur liaj manoj, sur la ciferplato kaj sur la malgrandaj radoj de la horloĝo, lasante

en la ombro la reston de la salono.

Kiam li levis la kapon, lia vidado unue estis malklara pro la buntaj rebriloj. Nature kurioza, li malmuntis la pecojn, tute senutila afero, kun la ideo malfruigi sian foriron kaj tiel eble sukcese komenci interparoladon kun la fremdulo. Sed tiu ĉi restis silenta kaj senmova. Tiel bone senmova ke tio fine nervozigis Henfrejo<sup>n</sup>. Li havis la impreson kvazaŭ esti sola kaj rigardis : griza kaj malmulte lumigita, staris la giganta kapo kun vindoj, kiu ekzamenis lin tra siaj larĝaj mallumaj okulvitroj, obskurigita de verdeta vaporeto. Tio iĝis por Henfrej tiom neeltenebla ke dum minuto ili restis ambaŭ observante unu la alian per konfuza mieno. Poste Henfrej mallevigis la okulojn. Vere tre ĝena situacio ! Li ŝatintus diri ion. Ĉu taŭgis observigi ke la vetero estis tre malvarma laŭ la sezono ? Li rektiĝis kiel por elekti la momenton diri tiun rimarkon.

- La vetero..., li komencis.

- Kial vi ne finas kaj foriras ? diris la rigida vizaĝo, evidente turmentata de malfacile retenebla furiozo. Ĉio kiun vi sukcesis fari, estas reŝtraŭbi la montrilon sur la ciferplato. Vi mokas la mondon !

- Bone, sinjoro... Nur unu minuton pli. Mi zorge reviziis...

S<sup>o</sup> Henfrej finis sian taskon kaj foriris. Sed li foriris ekstreme ĉagrenita.

- Fulmotondro ! li diris al si trapaŝante la vilaĝon meze de neĝventego, estas fojoj kiam necesas ripari horloĝon, tamen !

Poste :

- Ĉu do iu homo ne rajtas rigardi vin ? Fia simio !

Kaj ankoraŭ :

- Ne, laŭ tio kio ŝajnas... La polico estus persekutanta lin ke li ne estus pli bone envolvita, pli bone misterplena !

Ĉe la angulo de la strato, antaŭ ĉe Glison, li vidis Halo<sup>n</sup> kiu de nelonge edziĝis la mastrinon de la gastejo, kaj kiu nun kondukis la "veturilon laŭ bezono" de Iping al la vojforko de Siderponto, kiam okaze iu bezonis; Halo sin direktis al li revenante de la stacidomo. Oni ne povis dubi, "li iom paŭzis" ĉe Siderponto : sufiĉis, por esti certa, vidi lin veturi.

- Kiel vi fartas, li demandis preterpasante.

- Ha ! Vi havas hejme strangan korpon !

Halo, propravole, haltigis sian ĉevalon.

- Kio do ?

- Kliento kiu aspektas tre originale engastiĝis ĉe vi, oĝjo mia !...

Kaj Teĉjo komencis skizi al Halo pitoreskan priskribon de la stranga gasto de sia edzino.

- Li iom aspektas kiel maskovestito. Mi ja vologus vidi la vizaĝon de homo, se mi devus gastigi lin en mia loĝejo. Sed la virinoj estas tiom konfidoplenaj tuj kiam temas pri fremduloj ! Halo, li hejmiĝis ĉe vi, kaj li ankoraŭ ne eĉ konigis nomon !

- Ĉu vere ? respondis Halo kiu havis la inteligentecon sufiĉe malvigla.

- Perfekte ! reparolis Teĉjo. Li luis posemajne, kaj vi ne estos liberigita de li antaŭ ok tagoj. Kaj li trenas amason da pakaĵoj kiuj alvenos morgaŭ, laŭ tio kion li diras. Ni esperu, Halo, ke ne estas nur kestoj plenigitaj per ŝtonoj !

Li rakontis kiel lia onklino, en Hastings, estis friponita de fremdulo kies la valizoj estis malplenaj. Unuvorte, li lasis Halo<sup>n</sup> konfuze malkvieta.

- Ho do ! faris tiu ĉi. Necesas ke mi iru vidi tien.

Teĉjo daŭrigis sian vojon, la spirito tute mildigita.

Anstataŭ "iri vidi tien" Halo, ĉe sia reveno hejmen, estis severe skoldita de sia edzino pro la tempo kiun li pasigis en Siderponto; liaj timemaj demandoj estis akre

ricevitaj, sen tio ke ŝi respondis al la objekto de liaj maltrankviloj. Sed malgraŭ la riproĉadoj, la grajno de malfido semita de Teĉjo ĝermis en lia cerbo.

- Vi ne scias ĉion, vi mem la virinoj ! diris S<sup>ro</sup> Halo, decidita sciigi kiel eble plej baldaŭ pri la karaktero de ŝia gasto.

Tuj kiam la fremdulo kuŝiĝis, ĉirkaŭ la naŭa kaj duono, S<sup>ro</sup> Halo eniris kun atakema mieno en la salonon, kaj li ekzamenis, per suspektema okulo, la meblaron de sia edzino, por bone vidigi ke la fremdulo ne estis mastro en la loko; li okulumis, ne sen iom da spitado, folion kun matematikaj operacioj forgesita de la alia. Retiriĝante, li rekomendis al S<sup>ino</sup> Halo bonege atenti pri la bagaĝoj kiam ili alvenos la morgaŭon.

- Ne zorgu pri fremdaj aferoj, Halo ! replikis tiu ĉi; mi ja zorgos pri la miaj.

Ŝi estis des pli inklina por kvereli kun sia edzo ke la fremdulo estis evidente strangega vojaĝanto, kaj ke, verdire, ŝi tute ne sentis sin trankvila koncerne lin. Meze de la nokto, ŝi eksalte vekigis, songante pri dikaj kapoj, blankaj kiel napoj muntitaj sur senfinaj koloj, kun larĝaj nigraj okuloj, kiuj antaŭeniris al ŝi rampante. Sed, saĝa virino, ŝi bridis siajn terurojn, turnis sin kaj reendormiĝis.



## 03 \_ La mil kaj unu boteloj.

Estis la 29<sup>a</sup> de februaro, ĉe la komenco de la degelo, ke la neordinara ulo alvenis neatendite en Iping. La morgaŭon, oni alportis siajn pakaĵojn tra la pluvneĝo. Estis tre rimarkindaj pakaĵoj. Estis du kofroj, tiel kiel la unua renkontito povas posedi; sed krom tio, estis kesto da libroj - da dikaj kaj pezaj libroj kies kelkaj kovritaj de nekomprenebla manskribita skribaĵo - kaj dekduo aŭ pli da korboj, da skatoloj, da kofroj enhavantaj kelkajn objektojn ĉirkaŭvolvitajn en pajlo, botelojn el vitro, laŭ tio kio ŝajnis al Halo, kiu, sciema, elŝiris la pajlon kvazaŭ hazarde.

La fremdulo, varmege vestita, kun sia ĉapelo, sia supervesto, siaj gantoj, sia koltuko, esprimis la intencon iri renkonten al Ferensido kaj de sia veturilo, dum Halo serĉante la okazon proponi sian helpon, riskis kelkajn vortojn de babilado. Li eliris sen atenti pri la hundo de Ferensido, kiu amatore flaris la krurojn de Halo.

- Ek, alvenu do kun tiuj kestoj ! Vi sufiĉe atendigis min !

Kaj li malsupreniris la peronon, sin direktanta al la malantaŭo de la ĉaro kvazaŭ por ekkapti la plej malgrandan kofron.

La hundo de Ferensido ne jam tute ekvidis lin ke ĝi hirtiĝis kaj komencis sovaĝe graŭli; la alia apenaŭ faris la unuajn paŝojn ke la besto unue saltis minace, poste baldaŭ pafiĝis al la mano.

- Foren ! kriis Halo retroirante ĉar li ne estis brava. Ferensido kriegis "Kuŝu !" kaj ekkaptis sian vipon.

Ili ambaŭ vidis la dentojn de la hundo flugtuŝi la manon, la besto eksaltis flanken kaj ekprenis la kruron de la

fremdulo : la pantalono disŝiriĝis kun seka bruo. Tiam, la maldika pinto de la vipo de Ferensido atingis la kulpulon, kaj tiu ĝi, bojante pro timo, rifuis sub la veturilo. Tio postulis nur duonan minuton. Neniu estis parolinta, ĉiuj estis kriintaj. La fremdulo ekrigardis al sia ŝirita ganto, al sia kruro, ŝajnigis kvazaŭ li volis klini sin, poste abrupte elrektiĝis kaj transiris la peronon por eniri en la gastejon. Oni aŭdis lin rapidege trairi la koridoron kaj surgrimpi ĝis sia ĉambro la sentapiŝan ŝtuparon.

- Ha ! la fia besto ! faris Ferensido, saltante el la veturilo kun sia vipo mane, dum la hundo sub la veturilo, postrigardis lin. "Ĉi tien ! Ĉi tien !..."

Halo restis kun malfermita buŝo.

- Li estintus mordita..., li diris. Saĝe mi mem iras.

Li sekvis la fremdulon. En la koridoro, li renkontis S<sup>inon</sup> Halo<sup>n</sup> kaj sciigis al ŝi la malbonfaron de la hundo. Li rapide supreniris la ŝtuparon. La pordo de la vojaĝanto estanta duon-malfermita, li puŝis ĝin, malfermis ĝin kaj senceremonie eniris : la naturo dotis lin per familiara karaktero. La rulkurteno mallevita, la ĉambro estis malluma. Li nur videtis tute nekutiman aferon : kiel brakon sen mano, svingiĝanta al sia direkto, kaj vizaĝon apenaŭ indikita de tri dikaj nigraj punktoj sur blankaĵo, simile al makuloj markitaj sur flava penso. Samtempe, li ricevis fortegan baton al la brusto, li estis dorsen elpelita, la pordo revenis sur sian nazon, la ŝlosilo turniĝis en la seruro. Tio ĉio estis tiel rapida, ke li povis nenion distingi : Malprecizajn formojn moviĝantajn, retropuŝadon, ekfrapon, nenion pli. Li restis konsternata sur la malluma interŝtuparo, demandante al si kun teruro tion kio okazis.

Du minutojn, kaj li kuniĝis kun la malgranda grupo kiu ariĝis antaŭ la domo. Tie estis Ferensido duafoje rakontanta la incidento de la hundo; tie estis S<sup>ino</sup> Halo plendante ke tiu

ĉi hundo mordis siajn vojaĝantojn; tie estis, kiel scivola, Huster, la butikisto de kontraŭe, kaj kiel arbitraciante, Sandio Vaĝers kiu venis de sia forĝejo; poste virinoj kaj infanoj, ĉiuj parolantaj prave malprave.

- Mi ja ne lasus min mordi, tion al vi mi certigas !

- Devus esti malpermesita havi tiajn bestojn.

- Kial ĝi mordis lin ?

Kaj la cetero tiel same.

S<sup>ro</sup> Halo kiu ekzamenis kaj aŭskultis ilin de la perono, ne plu certis nun esti vidanta tien supren ion tiel strangan. Cetere, lia vortprovizo estis tro limigita por permesi al li traduki liajn impresojn.

- Li asertas bezoni neniun, li respondis al iu demando de sia edzino. Preferinde estus enkolekti liajn bagaĵojn enen.

- Li devintus tuj kaŭterizi la vundon, elbuŝigis S<sup>ro</sup> Huster, ĉefe se ĝi estas senhaŭta.

- Mi ja mortigus la beston, jen tio kion mi farus, diris iu virino en la grupo.

Subite la hundo denove ekgraŭlis.

- Nu venu do ! kriis sub la pordo iu kolera voĉo.

La fremdulo estis tie, bone envolvita, la kolumo malfaldita, la ĉapelrando mallecita super la okulojn.

- Ju pli rapide vi enigis tion ĉion, des pli mi estos kontenta.

Estas konstatita de la universala atesto ke li ŝanĝis pantalonon kaj gantojn.

- Ĉu vi estas vundita, sinjoro ? demandis Ferensido. Mi tute bedaŭras ke tiu besto...

- Ne, tute ne. Ĝi ne atakis la haŭton. Nu, rapide, hastu. Poste li murmuris ion, asertis S<sup>ro</sup> Halo.

Tuj kiam la unua korbego estis laŭ liaj ordonoj, alportita en la salonon, la fremdulo sin ĵetegis sur ĝi kun nekredbla

fervoro kaj komencis la elpakadon, disĵetante pajlon, sen konsidero pri la tapiŝo de S<sup>ino</sup> Halo. Li detiris el ĝi botelojn, malgrandajn kaj tuberajn botelojn enhavantajn pulvorojn; malgrandajn kaj longajn botelojn enhavantajn kolorajn aŭ senkolorajn likvaĵojn; vimentegitajn botelojn, el blua vitro, surskribitajn : veneno; botelojn kun ronda ventro kaj svelta kolo; grandegajn botelojn el verda vitro, grandegajn botelojn el blanka vitro; botelojn kun kristalaj ŝtopiloj kaj etikedoj, botelojn kun korkaj ŝtopiloj, botelojn kun krampfermilo, botelojn kun ligna ingo, botelojn de vino, botelojn de oleo, ktp. Li vicigis ilin sur la ĉifonujon, sur la kamenbreton, sur la tablon antaŭ la fenestro, sur la pargeton, sur librobretojn, ĉien, ĉien. La apotekisto de Bramblehurst ne povintus fanfaroni tiom posedi en sia butikoj. Estis vera vidindaĵo. La korbegoj, unuj post aliaj, ĉiam naskigis botelojn. Fine, kiam ĉio tio estis malplenigita, la pakpajlo atingis la nivelon de la tablo.

La solaj aferoj kiuj eliris el ili, kun boteloj, estis multege da provtuboj, da tuboj kaj iu zorge enpakita pesilo.

La enhavo de tiuj korboj ne estis pli frue elpakita ke la fremdulo venis al la fenestro kaj eklaboris, tute sen zorgi nek pri la pajlo, sur kiu li paŝadis, nek pri la fajro kiu estis estingiĝinta, nek pri la kesto da libroj, nek pri la kofroj, kiujn oni ankaŭ suprenportis.

Kiam S<sup>ino</sup> Halo alportis al li lian vespermanĝon, li jam estis absorbata de sia laboro kaj okupata verŝi kelkajn gutojn de siaj boteloj en tubojn; li aŭdis ŝin nur post kiam ŝi estis balainta la ĉefan parton kaj metinta la pleton sur la tablon, eble ne sen kelka malbona humoro kaŭzita de la stato en kiu ŝi vidis sian plankon. Ĉe tiu momento, li movis la kapon, kaj tuj returniĝis. Ŝi vidis almenaŭ ke li formetis siajn okulvitrojn; ili estis apud li sur la tablo : ŝajnis al ŝi ke liaj okulvokoj estis strange kavaj. Li reprenis siajn okulvitrojn,

turniĝis kaj frontis ŝin. Ŝi estis plendonta pri la pajlo kiu diskovris la plankon kiam li antaŭiĝis al ŝi :

- Mi petas vin neniam eniri sen frapi, li diris al ŝi kun nenormala incitegiĝo kiu ŝajnis karakteriza ĉe li.

- Mi frapis... Probable ke...

- Eble ja. Sed, en mia esploro, vere tre urĝa kaj tre grava esplorado, la plej eta perturbo, bruado de pordo... Mi estas devigita peti vin...

- Absolute, sinjoro !... Se estas tiel, vi povas ŝlosi, ĉu ne ? Kelkfoje...

- Bona ideo, respondis la fremdulo.

- Ĉi tiu pajlo... se mi kuraĝus rimarkigi...

- Neutile. Se tiu ĉi pajlo ĝenas vin, enskribu ĝin sur la noto.

Kaj li murmuris ion inter siaj dentoj - suspektindajn vortojn, kiel malbenojn.

Li troviĝis tie, stare, tiom strange, tiom agreseme, iu botelo en iu mano kaj tubo en la alia, ke S<sup>ino</sup> Halo havis ian timeton. Sed ŝi estis decida virino.

- Tiuokaze, mi dezirus scii, sinjoro, je kiom vi taksas...

- Unu ŝilingon, enskribu unu ŝilingon... Tio sufiĉas, ĉu ne, unu ŝilingo ?

- Estu ! diris S<sup>ino</sup> Halo, prenante la tablotukon kaj komencante etendi ĝin sur la tablon.

Li sidiĝis, kun dorso turnita, montrante nur la kolumon de sia palto. Li laboris ĝis vespero, kun pordo ŝlosita, kaj tiel kiel atestis S<sup>ino</sup> Halo, silente, preskaŭ senĉese. Iam tamen, estis kolizio de boteloj interfrapitaj unujn kontraŭ la aliajn, kvazaŭ la tablo estis skuita, sekvita de frakaso de vitro disrompita sur la plankon; poste paŝadoj tra la ĉambro. Timante ian malbonon, S<sup>ino</sup> Halo venis aŭskulti ĉe la pordo, sen aŭdaci frapi.

"Mi ne povas daŭrigi !" li malespere ripetis. "Ne, mi ne

povas daŭrigi !... Tricent mil ! Kvarcent mil ! Estas la infinito !... Ŝtelita !... Tio povas preni al mi mian tutan vivon... Pacienco ! Do pacienco, malsaĝulo ! malsaĝulo !"

Oni aŭdis malsupren, en la trinkejo, bruegon de najlizitaj ŝuoj, kaj kontraŭvole ja, S<sup>ino</sup> Halo fine rezignis pri daŭrigo de tiu ĉi monologo. Kiam ŝi revenis, la ĉambro estis denove senbrua, krom la malgrava krako de la brakseĝo kaj kelkfoje la bruo de botelo. Ĉio estis finita; la fremdulo redaŭrigis sian laboron.

Alportante al li teon, ŝi vidis vitrerojn en iu angulo, sub la spegulo por razado, kaj oran makulon kiu estis sendetale viŝita. Ŝi rimarkigis ĝin.

- Enskribu ĝin sur la noton ! respondis krude la vojaĝanto. Pro amo de Dio, tute ne ĝenu min ! Se estas ajna difekto, vi aldonos ĝin sur la noton.

Kaj li ree konsultis liston en la kajero malfermita antaŭ li.

- Mi tuj diros al vi ion !... sciigis Ferensido kun mistera mieno.

La posttagmezo fluis kaj ni troviĝis en la malgranda bierejo de Iping.

- Kion ? faris Teĉjo Henfrej.

- Tiu knabego pri kiu vi parolas al mi, kiun mia hundo mordis... Nu ! Li estas Negro. Almenaŭ, liaj gamboj estas nigraj. Mi vidis tion tra la ŝiro de lia pantalono, kiel tra la ŝiro de lia ganto. Vi estus preta, ĉu ne, vidi ion rozkolora ? Nu, tute ne ! Tute nigra ! Mi certigas al vi ke li estas tiel nigra kiel mia ĉapelo.

- Ja kompreneble ! ekkriis Henfrej, li tamen estas stranga kazo ! Kial do lia nazo estas tiel roza kiel se ĝi estis farbata ?

- Prave, replikis Ferensido; mi konsentas tion. Sed mi diras tion kion mi pensas : tiu viro estas dukolora viro, Teĉjo;

nigra ĉi tie kaj blanka tie, laŭ makuloj. Kaj li hontas pro tio. Li estas speco de miksrasulo : la koloro venis al li laŭ regionoj anstataŭ esti miksitaj. Mi jam aŭdis paroli pri tio. Cetere estas tio kio komune okazas ĉe la ĉevaloj, kiel ĉiu scias !...

## 04 \_ Iu intervjuo.

Mi detale revokis la cirkonstancojn de la alveno de la fremdulo en Iping por ke la leganto povu kompreni la scivolemon kiun vekis tiu viro. Sed, krom du strangaj incidentoj, lia restado ĝis la vilaĝa festo, povas esti tre mallonge rakontita. Okazis ja kelkaj kvereloj kun S<sup>ino</sup> Halo pri hejmaj aferoj; tamen, ĉiufoje, ĝis la lasta disputo en aprilo, tuj kiam li vidis ekaperi la unuajn simptomojn de avareco, li silentigis ŝin per la oportuna elturniĝo de speciala kompenso. Halo tute ne ŝatis sian gaston, kaj ĉiufoje kiam li aŭdacis tion, li parolis pri la neceso liberigi sin de li; sed li zorge maskis sian antipation kaj, kiel eble plej ofte, evitis la nekonaton.

- Pacienca ĝis la somero, saĝe ripetis S<sup>ino</sup> Halo, ĝis la momento kiam la artistoj komencas veni. Tiam, ni vidos. Li sendube estas tre aroganta; sed, ne estas por diri, fakturo akurate pagita estas fakturo akurate pagita.

La fremdulo ne ĉeestis ĉe la di-servoj, kaj faris nenian diferencon inter la dimanĉo kaj la semajntagoj. Li laboris, laŭ S<sup>ino</sup> Halo, tre malregule. Kelkfoje li frumatene elĉambriĝis malsupren kaj ŝajnis multokupa. Aliajn tagojn, li ellitiĝis malfrue, paŝadis en sia ĉambro, li brue svingiĝis dum plenaj horoj, fumis, dormis en sia brakseĝo apud la fajro. Pri komunikado kun la mondo ekster la vilaĝo, li havis neniun. Lia humoro restis tre neregula; plej ofte, liaj manieroj estis laŭ preskaŭ neeltenebla incitiĝemo; ofte objektoj estis detruitaj, ŝiritaj, distretitaj, muelitaj en koleratakoj. Lia kutimo mallaŭte paroli al si mem kreskis; sed kvankam S<sup>ino</sup> Halo zorge aŭskultis, ŝi ne kapablis trovi nek kapon nek voston al la paroladoj kiujn ŝi aŭdis.



La vojaĝanto aperis malofte dum tago; sed krepuske, li foriris, bone envolvita, kun kapuĉita vizaĝo, ĉu la vetero estis malvarma aŭ varma, kaj li elektis la plej senhomajn kaj la plej ombrajn aŭ la plej interkrutajn irejojn. Liaj dikaj okuloj, en lia fantoma vizaĝo, sub la ĉapela rando, subite eligis el la mallumo, malagrabla apero por la loĝantoj kiuj revenis al la loĝejo. Teĉjo Henfrej, vikle elirante iun vesperon, je la naŭa kaj duono, el la "Ruĝa Vesto", estis honte timigita de la mortkapo de la vojaĝanto (li promenis ĉapelo en mano) kiun malfermita pordo neatendite metis en plenlumo. Ĉiuj infanoj kiuj vidis lin ĉe noktigo songis pri fantomoj; oni ne sciis ĉu li pli timis la infanojn ol li timigis ilin, aŭ inverse; sed tio kio estas certa, estas ke ekzistis ambaŭflanke profunda antipatio.

Estis neeviteble ke, en vilaĝo kiel Iping, iu ulo kun tiom originala aspekto kaj tiom apartaj moroj ofte estis la temo de konversacio. Pri la uzo de lia tempo, la opinio estis tre dividita, S<sup>ino</sup> Halo estis, tiupunkte, tre ofendiĝema. Al ĉiuj tiuj demandoj, ŝi respondis ke "li estis eksperimentisto", kaj ŝi apenaŭ akcentis la silabojn kiel iu kiu timas kompromitiĝi. Ĉu oni demandis al ŝi kia estis "eksperimentisto" ? Ŝi rebatis, kun ia supereca toneto, ke la kleraj homoj scias tion, kaj ŝi tiam aldonis ke "li malkovris aferojn". Ŝia kliento, ŝi asertis, spertis akcidenton kiu, por tempo, senkolorigis al li vizaĝon kaj manojn; li volegis ke oni tute ne rimarkis tion.

Malgraŭ ĉiaj diraĵoj, estis iu ĝenerale akceptita ideo, nome ke li estis krimulo klopodanta eskapi de justico kaj ĉirkaŭvolvanta sin per mistero por kaŝi sin antaŭ la okulo de la polico. Tiu ideo ĝermis en la cerbo de S<sup>ro</sup> Teĉjo Henfrej. Tamen, je la publika kono, neniu grava krimo okazis ĉirkaŭ la mezo aŭ la fino de februaro.

Perfektigita de la imago de S<sup>ro</sup> Guldo, la asistanta instruisto, tiu kredo akiris alian formon; la fremdulo estis

maskovestita anarkiisto kiu preparis eksplodajn materialojn; kaj S<sup>o</sup> Guldo entreprenis, tiom kiom sia libertempo permesis tion al li, senmaskigi lin. Liaj operacioj ĉefe konsistis rigardegi la "banditon" ĉiufoje kiam ili renkontiĝis, aŭ pridemandi homojn kiuj, estante neniam vidintaj la nekonaton, ne sciis pri kio oni parolis al ili. Li malkovris nenion.

Alia partio sekvis S<sup>o</sup> Ferensido kaj oni akceptis ke la vojaĝanto estis dukolora, aŭ ion samspeca. Tiel ekzemple, Silas Durgan asertis ke "se la apartulo akceptis aperi en foirojn, li rapide riĉiĝus"; estanta iom teologo, li komparis lin al la viro de la parabolo kiu havis nur unu solan talanton.

Tamen, ankoraŭ alia opinio cirkulis : la fremdulo estis sendanĝera maniulo. Tio havis la avantaĝon klarigi ĉion.

Sed inter tiuj ĉi du ĉefaj grupoj, estis hezitemaj spiritoj kaj akordiĝemaj spiritoj. La homoj de **Susekso** havas malmultajn superstiĉojn, kaj estis nur post la okazaĵoj de la unuaj apriltagoj ke la vorto de supernatura estis unuafoje flustrita en la vilaĝo. Eĉ tiam, cetere, estis nur virinoj por akcepti tiun ideon.

Kion ajn oni pensis pri li, ĉiuj en Iping akordiĝis por ne ŝati tiun fremdulon. Lia nervozeco, komprenebla por la urbanoj dediĉitaj al intelektaj laboroj, estis miraĵo por tiuj kvietaj vilaĝanoj de Susekso. Liaj furiozaj gestadoj kiujn ili tempaltempe kaptis; lia trorapida irmaniero kiam la nokto tute disvolvita, invitis lin al trankvilaj promenoj; lia maniero forpuŝi ĉiujn komencojn de scivolemo; lia gusto por la ombro kiu kondukis lin fermi liajn pordojn, mallevi liajn rulkurtenojn, estingi liajn kandelojn kaj liajn lampojn - kiu do ne estus maltrankviligita de tiaj sintenoj ? Oni iom deturnis sin kiam li trairis la vilaĝon, kaj kiam li estis preterpasinta, la mokemaj knaboj malfaldis la kolumon de sia vesto, mallevis la randojn de sia ĉapelo, postpaŝis malantaŭ li, simiante lian

misteran irmanieron. Estis tiuepoke populara kanto titolita "La Infantimigulon" : S<sup>ino</sup> Saĉelo kantis tion ĉe la lerneja koncerto - profite al la lumigado de la templo. De tiam, ĉiuj fojoj kiam pluraj vilaĝanoj kuniĝis, se la fremdulo foriris, la unuaj taktoj de tiu ario eliris el la grupo, fajfitaj pli malpli laŭte. Tial, vespere, la infanoj kriis sur lia vojo : "Infantimigulo" eĉ se prudente necesis tuj forkuri.

Kuss, la empiriulo de la lando, forkonsumiĝis pro scivolemo. La bandaĝoj vigligis sian profesian intereson; la mil kaj unu boteloj vekis sian ĵaluzon. Dum tuta aprilo kaj tuta majo, li deziris okazon paroli kun la fremdulo; fine, ĉirkaŭ Pentekosto, ne plu eltenante, li imagis kiel pretekston, liston da subskriboj favore al komunuma flegistino. Li surprize malkovris tiam ke S<sup>ro</sup> Halo ignoris la nomon de sia gasto.

- Li donis nomon (tute senpruva aserto) sed mi ne bone aŭdis ĝin, konfesis S<sup>ino</sup> Halo, tiom ŝajnis al ŝi stulta ne esti pli bone informita.

Kuss frapis la pordon de la salono kaj eniris. Iu tute klara sakraĵo respondis al li de la interno.

- Pardonu mian sentaktecon, diris Kuss.

Poste la pordo fermiĝis, malhelpante S<sup>inon</sup> Halo<sup>n</sup> kapti la daŭrigon de la konversacio. Dum dek minutoj, ŝi divenis murmuron de voĉoj; poste surprizan krion, piedan moviĝon, falon de seĝo, ekridon, rapidajn paŝojn, kaj Kuss reaperis kun palega vizaĝo, rigardanta super sia ŝultro. Li lasis la pordon malfermita kaj, senatente pasis kurante en la halo kaj malsupreniris la ŝtupojn; ŝi aŭdis la bruon de sia hasta kurado. Li tenis sian ĉapelon enmane. Ŝi restis stare malantaŭ sia vendotablo, la okuloj turnitaj al la salono. La fremdulo kviete ridetis, poste liaj paŝoj trairis la ĉambron; sed ŝi ne povis vidi lian vizaĝon de la loko kie ŝi troviĝis. La salona pordo malmilde klakis kaj la sceno refariĝis silenta.

Kuss rekte iris ĝis ĉe Bunting, la pastoro.

- Ĉu mi estas freneza ? Li abrupte kriis, penetrante en la malgrandan skriboĉambron. Ĉu mi aspektas kiel frenezulo ?

- Kio okazis do ? pridemandis la pastoro metante amoniton sur la malligitajn foliojn de sia sekvonta prediko.

- Tiu individuo de la gastejo...

- Nu ?

- Donu al mi ion por trinki !... Kuss pludiris.

Kaj li sidiĝis.

Kiam liaj nervoj kvietiĝis per glaso da ĉipa ŝereo, la sola drinkaĵo kiun la bonkora pastoro povis proponi, li parolis al li pri la vizito kiun li ĵus faris.

- Mi eniris, li diris anhelante, kaj mi petis al li lian obolon por la flegistino kiun ni volas havi. Li estis enŝovinta siajn manojn en siaj poŝoj. Li peze delasis sin sur sia seĝo, spiris la aeron. "Mi ekaŭdis, mi aldonis, ke li interesiĝis pri 'la sciencaj aferoj'. Li respondis : "Jes", kaj denove snufis. Li cetere daŭrigis senĉese snufi; evidente li ĵus kaptis inferan malvarmumon. Tio ne estis mirinda, vestita kiel li estis... Mi detalis mian rakonton de flegistino, samtempe dum mi observis : ĉie boteloj, kemiaĵoj, pesilo, provtuboj; en la aero,odoro de primolo. Ĉu li konsentis kotizi ? Li respondis ke li pripensus. Tiam sen-transire mi demandis al li ĉu li faris esploradojn. Li diris al mi ke jes. "ĉu longaj, tiuj esploroj ?" Jen li kiu furioziĝas : "Esploradojn ege longajn !" li kriegas kvazaŭ li eksplodis. "Ho !" mi ekkriis. Jen la origino de la sceno. Mia viro estis ĉe la limo de sia pacienco, mia demando eksplodigis lin. Oni donis al li formulon, ekstreme multvaloran formulon. Por kion fari ? Li ne volis diri tion. ĉu estis preskribo ? "La diablo forprenu vin ! Zorgu pri viaj propraj aferoj !" Mi pardonpetas. Li afektas dignan mienon, tudas, snufas kaj kvietiĝas. Li estis legonta

sian formulon : "Kvin elementoj..." Li metas ĝin sur la tablon; li turnas la kapon. Iu trablovo venanta de la fenestro forprenas la paperon. Bloveto, susuro : "Labori en ĉambro kun flamanta fajrejo !" li diris. Mi vidas brileton, kaj jen la preskribo kiu ekbrulas kaj kiu forflugas ! Li rapidegis, ĝuste kiam ĝi trairis en la tubo. Tiam, en lia emocio, jen lia brako kiu eliĝas...

- Hm ? eligis Bunting.

- Neniu mano ! Nur iu malplena maniko, Disinjoro ! Mi pensis : "Estas iu kriplaĵo. Li havas, mi supozas, artefaritan brakon, kaj li estas perdinta ĝin". En tio evidente estis eksterordinaraĵo. Kial diable tiu maniko restas supre, se ene estas nenio ? Kaj estis nenio ene, mi diras al vi. Nenio, nenio, de supre malsupren. Mia rigardo enprofundiĝis ĝis la ŝultro, kaj iom da taglumo trapasis tra ŝiraĵo de la vesto. "Bona Dio !" mi ekkriis. Tiam, li haltis. El siaj larĝaj blankaj okuloj samnivele kun la kapo, li ekrigardis min, poste sian manikon.

- Poste ?

- Estas ĉio. Li ne diris vorton. Liaj okuloj brilis kaj rapide li enŝovis la manikon en sian poŝon. "Mi do diris, li reparolis, ke mia formulo estis brulanta, ĉu ne ?" Li elbuŝigis muĝeton de demando. "Sed kiel diable mi demandis, vi povas movi malplenan manikon - Malplenan manikon ? - Jes, malplenan manikon. - ĉu ĝi estas malplena ?" ĉe la momento mem, li stariĝis. Mi ankaŭ leviĝis. "Ej ! Ĉu malplenan manikon ? Vi vidis ke estis maniko... ?" Tri paŝojn, li estis apud mi. Li malice snufis. Mi tute ne ribelis. Tamen mi volas esti pendigita se tiu dika bulo, kun siaj bandaĝoj kaj siaj okulbaniloj, paŝante trankvile al vi, ne havis ion ajn por perdigi sintenon al iu ajn. "Vi diris, mi kredas, li daŭrigis, ke tio estis malplena maniko ? - Jes, mi diris tion". Mi ja timigita retropaŝas antaŭ ĉi tiu frenezulo, la vizaĝo

malkovrita, sen okulvitroj, fiksrigardanta min. Tute malrapide, li eltiras sian manikon el sia poŝo kaj etendas sian brakon al mi, kvazaŭ por denove montri ĝin al mi. Li faris tion tre, tre malrapide. Mi rigardis. Tio daŭris jarcenton. "Nu, mi ripetis penante paroli, ne estas ion ene". Necesis ja diri ion. Mi komencis timi. Mi povis vidi ĝis la fundo de lia maniko; li antaŭenigi ĝin al mi, malrapide, malrapide, kiel tiel, ĝis ses coloj [ $\pm 15\text{cm}$ ] de mia nazo. Estas stranga afero, ĉu ne, vidi malplanan manikon tiel etendiĝi al vi! Tiam...

- Tiam ?...

- Io... kiel montra kaj dika fingroj pinĉis al mi la nazon. Bunting komencis ridi.

- Nenio estis ene ! ekkriis Kuss, kaj sia voĉo laŭtiĝis laŭ akuta krio ĉe tiu ĉi "ene". Estas facile ridi ! Sed mi asertas al vi, mi estis tiom ekscitita ke mi malmilde frapis tiun manikon. Mi returnis min, forfuĝis el la ĉambro, mi forlasis lin tie.

Kuss haltis. Ne eblis mistaksi pri la sincereco de lia teruriĝo. Li turnis sur si mem en stato de granda malforteco. Li drinkis duan glason da malbona ŝereo de la bonega pastoro.

- Kiam mi frapis la manikon, estis tute kvazaŭ mi tuŝis brakon. Kaj tamen ne estis brako ! Ne la ombro de brako !

Bunting pripensis. Li maltrankvile rigardis Kuss<sup>on</sup>.

- Estas tre stranga rakonto.

Li vidigis tre singardeman kaj tre seriozan mienon.

- Vere, rediris S<sup>o</sup> Bunting kun la patoso de juĝisto, estas tre stranga rakonto !

## 05 \_ Iu ŝtelisto en la pastorejo.

La detaloj de la ŝtelo plenumita ĉe la pastorejo estis al ni grandparte raportitaj de la pastoro kaj lia edzino. Ĝi okazis ĉe la ektagiĝo, dum la Pentekosta lundo, tago dediĉita en Iping al publikaj festoj. S<sup>ino</sup> Bunting subite vekiĝis en la silento kiu antaŭas la ektagiĝo, kun la konvinko ke la pordo de sia dormĉambro estis malfermita, poste fermita. Ŝi ne tuj alvokis sian edzon, sed ŝi sidiĝis sur sia lito kaj streĉis la orelon. Ŝi tiam distingis la obtuzan pum, pum, pum de senŝuigitaj piedoj, elirantaj de la kuntuŝiĝan necesejon kaj sekvantaj la koridoron direkte al la ŝtuparo. Tuj kiam ŝi estis tre certa, ŝi skuis la plej milde kiel eble S<sup>ron</sup> moŝton Bunting. Li ne frotis alumeton. Li surmetis siajn okulvitrojn. Li vestiĝis per la noktosurtuto de sia edzino, li surmetis siajn pantoflojn kaj ekiris sur la placeton por aŭskulti. Li tre bone aŭdis moviĝi malsupren, en sia skribejo. Poste, sonoran terton.

Li revenis al sia ĉambro, provizis sin per la unua armilo kiu tuj troviĝis ĉemane, la fajrostango, kaj malsuprengrimpis la ŝtuparon uzante mil singardojn. S<sup>ino</sup> Bunting restis sur la placeto.

Estis ĉirkaŭ la kvara matene : jam ne plu estis la profunda mallumo de la nokto. Malforta heleco regis en la vestiblo; sed la skriboĉambro, kies la pordo estis malfermetita, estis malluma. Cetere, absoluta silento; nur la apenaŭa krakado de la ŝtupoj sub la paŝoj de S<sup>no</sup> Bunting, kaj en la kabineto, malklaraj bruoj. Tiam tirkesto ekmalfermis, oni ekaŭdis susuron de paperoj. Poste sakraĵon, frotitan alumeton, kaj la ĉambro eklumiĝis per blonda lumo. S<sup>no</sup> Bunting tiumomente estis en la vestiblo kaj, tra la fendo de

la pordo, li povis vidi la malfermitan meblon kaj brulantan kandelon. Sed la ŝtelisto, li tute ne distingis. Li tie staris, en la vestiblo, ne sciante kion fari; S<sup>ino</sup> Bunting, palega kaj timplena, enŝoviĝis ĝis malsupre, malantaŭ li. Iu konsidero kuraĝigis ilin : la konvinko ke la ŝtelisto estis loĝanto de la vilaĝo.

Ili aŭdis tintadon; ili komprenis ke la rabisto estis trovinta la oron rezervitan por la mastrumaj elspezoj, entute du pundoj kaj duono. Tio decidis S<sup>ron</sup> Buntingo<sup>n</sup> hastigi la aferojn; firmigante la fajrostangon en sia mano, li antaŭeniris, de proksime postsekvata de S<sup>ino</sup> Bunting.

- Manoj alten ! li kolere kriis.

Sed li konsternite haltis : la ĉambro ŝajnis tute malplena. Tamen, ili ĵus aŭdi ĉi tie fingrumi ion, ilia certeco estis absoluta. Dum eble duonminuto, ili restis miregigitaj; poste S<sup>ino</sup> Bunting trairis la skribejon kaj rigardis malantaŭen la ekranegon, dum ŝia edzo, pro simila inspiro, rigardis sub la skribotablon. S<sup>ino</sup> Bunting skuis la kurtenojn de la fenestro. S<sup>ro</sup> Bunting ekzamenis la kamenon, esplorante ĝin per la fajrostango; unu priserĉis en la paperkorbo, la alia en la karbujo. Fine ili decidis ĉesi kaj restis konfuzitaj, demandante reciproke per la okuloj.

- Mi tamen ĵurintus..., faris S<sup>ino</sup> Bunting.

- Sed la kandelo ! ekkriis S<sup>ro</sup> Bunting. Kiu lumigis la kandelon ?

- La tirkesto ? rediris S<sup>ino</sup> Bunting. Kaj la mono formalaperis !

Ŝi rapidegis al la pordo.

- Vere estas en tio la plej eksterordinara kazo".

Estis tondra terno en la koridoron. Ili ekkuris tien. Ĉe la sama momento, la kuireja pordo forte klakadis.

- Alportu la kandelon ! ordonis S<sup>ro</sup> Bunting.

Kaj li antaŭeniris.



Okazis bruo de riglilo rapide elŝovita.

Kiam li alvenis al la enirejo de la kuirejo, la pastoro vidis ke la pordo de la provizejo ankaŭ malfermiĝis kaj ke la unuaj aŭroraj lumetoj banis la mallumajn masojn de la ĝardeno. Li certis ke neniu eliris tra tie.

Tamen la pordo malfermiĝis, restis momente malfermita, poste fermiĝis brue. Samtempe, la kandelo kiun S<sup>ino</sup> Bunting kunportis el la skribejo ekremetis kaj elĵetis pli helan brilon.

La kuirejo estis senhoma. Ili ĝisfunde vizitis manĝprovizejon, la servistejon, kaj finfine malsupreniris al la kelo. Ili vane esplorigardis : neniu en la tuta domo.

La tago surprizis la pastoron kaj lian edzinon sur la teretaĝo, ambaŭ strange vestaĉitaj, daŭrigante nenion kompreni, heligitaj de la tute senutila kandellumo kiu fandiĝis.

- Tio ja estas la plej eksterordinara kazo !... dudekfoje rediris la pastoro.

- Mia amiko, diris S<sup>ino</sup> Bunting, jen Suzia kiu ellitiĝas. Ni atendu por resupreniri ke ŝi estu en la kuirejo.

## 06 \_ La meblaro kiu dancas.

Nu, dum la unuaj horoj de tiu sama Pentekosta lundo, antaŭ ol Millia estis eliĝinta el sia litaĉo de la tagiĝo, S<sup>ro</sup> kaj S<sup>ino</sup> Halo malsupreniris al la kelo. Privata afero : temis pri bapti ilian bieron.

Ili apenaŭ troviĝis tie kiam S<sup>ino</sup> Halo ekkonsciis ke ŝi forgesis kunporti botelon da smilako. Ĉar estis ŝi kiu oficis, estis S<sup>ro</sup> Halo kiu resupreniris.

Sur la placeto, li estis surprizita vidi la pordon de la fremdulo duone malfermita. Li eniris en sian propran ĉambron, kaj trovis la botelon ĉe la indikita loko. Sed, reirante, li rimarkis ke la enira pordo ne plu estis riglita. Li tamen memoris, kaj tre klare, esti tenanta la kandelon por lumigi S<sup>inon</sup> Halo<sup>n</sup> kiam vespere ŝi enŝovis la riglilojn. En subita ekbrilo de inteligenteco, li komparis tiun ĉi fakton, la malfermitan ĉambron de la fremdulo, tien supren, kaj la hipotezojn de Teĉjo Henfrej. Li haltis kun plejsupra konsterno; poste, sian botelon enmane, li resupreniris la ŝtuparon. Li frapis ĉe la fremdulo : neniu respondo. Denove frapinte, li eniris.

Kiel li timis tion, malplena la lito, malplena la ĉambro ! Kaj nekredebla afero, sur la seĝo kaj sur la rando de la lito, estis senorde la vestoj de la gasto, la solaj vestaĵoj kiujn oni ĉiam vidis lin surhavi, tiel kiel liaj bandaĝoj. Kaj eĉ lia granda kaj peza ĉapelo kiun oni vidis lasita sur la litofosto !...

Kiam li staris tie, la voĉo de lia edzino eliris el la profundoj de la kelo, kun tiu maniero rapide forgluti la silabojn kaj plilaŭtigi ĝis akuta noto la lastajn vortojn de demando, per kiu la kamparano de la graflando de Susekso kutimas montri lian malpaciencon.

- Georgo ! Ĉu vi trovis ?

Ĉe tiu alvoko, li ekstremis kaj hastege eliris.

- Johana ! li diris al ŝi super la apogrelo de la ŝtuparo, vere estas tio kio Henfregj diris !... Li ne estas en sia ĉambro, li tien ne estas. Kaj la stratpordo ne estas riglita.

Unue S<sup>ino</sup> Halo ne komprenis; sed tuj kiam ŝi ekkomprenis, ŝi volis vidi per si mem la malplenan ĉambron. Halo, ankoraŭ tenante sian botelon, komencis remalsupreniri ĝis la fundo.

- Se li ne estas, liaj vestoj estas tie. Kaj kion li povas fari sen siaj vestoj ? Vere, estas tre stranga.

Ĉar ili ambaŭ resupreniris - tio estis poste akceptita kiel vera - ili kredis aŭdi la stratpordon malfermiĝis kaj refermiĝis; tamen, vidante ĝin fermita (nenio aspektis nenormala), nek iu nek la alia, tiumomente diris eĉ vorton. S<sup>ino</sup> Halo preterpasis sian edzon en la koridoro kaj alvenis unue supren. Iun ternis en la ŝtuparo : Halo, kiu sekvis post ses paŝoj, pensis ke estis sia edzino; ŝi, estanta supre, imagis ke estis li. Ŝi fortege puŝis la pordon kaj ekhaltis ĉe la sojlo de la ĉambro.

- Ha bone ! Jen afero ! Ŝi ekkriis.

ŝajnis al ŝi ke oni snufis tutproksime, malantaŭ sia kapo : sin turnante, ŝi surpriziĝis vidi ke Halo ankoraŭ estis sur la lasta ŝtupo, for de dekduo da paŝoj; sed post sekundo, li rekuniĝis ŝin. Ŝi klinis sin kaj metis sian manon sur la kapkusenon, poste sub la litkovriiloj.

- Malvarma ! Li ellitiĝis ekde almenaŭ unu horo.

Ŝi atingis tiun ŝtupon kiam nekredebla afero okazis : la litkovriiloj mem amasiĝis, leviĝis tiel kiel specon de monto, kaj rapide saltis trans la litpiedo, tute kvazaŭ mano ekkaptis kaj forĵetis ilin flanken. Tuj post, la ĉapelo faris salton, flugis preskaŭ desegnante cirklon kaj pafiĝis rekte al la nazo de S<sup>ino</sup> Halo. Poste la seĝo, delasante vestojn kaj pantalonon,

seke ridante per voĉo tute simila al tiu de la fremdulo, turnis sin kun siaj kvar piedoj direkte al S<sup>ino</sup> Halo, ŝajnis dummomente celumi ŝin kaj sturmis al ŝi. La kompatinda virino eligis kriojn kaj returne iris; tiam la seĝpiedoj, dolĉe sed firme apogiĝante kontraŭ ŝian dorson, devigis ŝin foriri el la ĉambro, kaj ŝia edzo poste. La pordo fortege klakis sur iliajn kalkanojn kaj estis ŝlose refermita. Seĝo kaj lito, dumminute, ŝajnis plenumi triumfan valson, kaj tute subite silentis.

S<sup>ino</sup> Halo svene preskaŭ falis en la brakojn de sia edzo, sur la placeto. Estis kun la plej granda malfacilaĵo ke li kaj Millia kiu estis vekita de alarmkrio, sukcesis porti ŝin malsupren kaj trinkigi al ŝi la refortigilon uzata en tia kazo.

- Estis spiritoj, diris S<sup>ino</sup> Halo. Mi estas certa ke estis spiritoj !... Mi jam legis en la ĵurnaloj, rakontojn pri tabloj kaj seĝoj kiuj leviĝis kaj kiuj dancis...

- Ankoraŭ iun gluton, Johana ! Tio sanigos vin.

- Lasu lin eksteren. Fermu la pordon. Ne plu lasu lin eniri. Mi konjektis tion... Mi devintus scii... Kun liaj larĝaj okuloj, lia kapo kovrita de bandaĝoj... Li neniam iras al preĝejo dimanĉe. Kaj lia kolekto da boteloj !... Li enkondukis spiritojn en la meblaroj ! Miajn bonajn malnovajn meblojn ! Estis ĝuste sur ĉi tiu seĝo ke mia kompatinda kara panjo sidiĝis kiam mi estis malgranda. Pensi ke ĝi povis leviĝi kontraŭ mi !

- Ankoraŭ iun gluton, Johana ! Viaj nervoj estas agacitaj.

Ĉirkaŭ la kvina, sub la oraj radioj de la leviĝanta suno, ili sendis Millia<sup>n</sup> veki S<sup>ron</sup> Sandio<sup>n</sup> Vaĝers<sup>on</sup>, la forĝiston. Ŝi devis prezenti al li la ĝentilaĵojn de S<sup>ro</sup> Halo kaj diri al li ke tien supren, la mebloj agis laŭ la plej nekutima maniero. Ĉu li kompleksus veni ?

Estis lerta viro, tiu S<sup>ro</sup> Vaĝers, kaj trovema. Li

konsideris la aferon kun multa graveco.

- La diablo prenu min, li eldiris, se tio ne estas sorĉo !...  
Iu viro kia tia ne estas kliento por vi.

Li viglege interesiĝis pri la afero. Oni petis lin unue pasi ĝis la ĉambro; sed li ne ŝajnis tre hastema. Li preferis babilu en la koridoro. Intertempe, la lernoknabo de Huster alvenis; li komencis malfermi la montrofenestron de la tabakvendejo. Oni lin invitis partopreni en la diskuto. Kompreneble, S<sup>ro</sup> Huster aperis post kelkaj minutoj. La parlamentaj kutimoj de la anglosaksa raso pliafoje manifestiĝis : oni multe babilis kaj oni prenis nenian decidon.

- Unue, la faktojn ! diris S<sup>ro</sup> Sandio Vaĝers. Certigu ni ĉu ni rajtas cedigi lian pordon... Iu ŝlosita pordo, oni ĉiam povas cedigi ĝin; sed poste, ne estas facile remeti ĝin en bonan staton...

Subite, mirindega aventuro, la dormĉambra pordo puŝiĝis per si mem, kaj dum ili konsideris ĝin mute pro surprizo, ili vidis, malsuprenirante la ŝtuparon, la envolvitan vizaĝon de la fremdulo, kiu ruladis la okulojn, pli nigraj kaj pli blankaj ol antaŭe, malantaŭ la larĝaj lensoj de siaj monstraj okulvitroj. Li paŝis rigide, malrapide, ĉiam homtima. Li trairis la vestiblon kaj haltis.

- Kaj tio ĉi ? li diris.

Ĉiuj okuloj sekvis la direkton de lia engantata fingro : oni malkovris la botelon da smilako tute apud la kela pordo. Tiam la nekonato eniris en la salonon kaj, abrupte, malrespekte, li frapfermis la pordon antaŭ ilia nazo.

Ne unu vorto estis elparolita ĝis ĉiu bruo ĉesis rebrui. Ili fikse rigardis sin unu la alian.

- Nu, ĉi tiu estas eĉ pli forta, ekzemple !... diris S<sup>ro</sup> Vaĝers.

Kaj li ne finis sian frazon. Li pludiris, sin turnante al S<sup>ro</sup> Halo :

- Sur via loko, mi pridemandus lin. Mi demandus al li klarigon.

Necesis kelka tempo por instigi al tiu ideo, la edzon de la mastrino. Fine, li pordfrapis, pasis la kapon kaj ekpovis diri :

- Pardonu min...

- Iru diablen ! kriis la fremdulo per terura voĉo. Kaj fermu la pordon malantaŭ vi !

Tiel finiĝis tiu mallonga vizito.

## 07 \_ La fremdulo senmaskigita.

La fremdulo estis enirinta la malgrandan salonon de la gastejo ĉirkaŭ la kvina kaj duono matene. Li restis tie ĝis tagmezo, la rulkurtenoj mallevitaj, la pordo fermita. Neniu, post la elpelo el Halo, riskis sin apud li.

Dum tiu tempo, li devis fasti. Plurfoje li sonorigis, lastfoje per furioza kaj longdaŭra maniero : oni tute ne respondis al li.

- Kun lia "Iru diablen !", vere... diris S<sup>ino</sup> Halo.

Tiam alvenis nebula onidiro pri ŝtelo farita ĉe la pastorejo kaj oni proksimigis la okazaĵojn, la unujn al la aliaj. Halo, akompanita de Vaĝers, eliris por iri trovi S<sup>ron</sup> Forsuĉo<sup>n</sup>, magistratano, kaj peti al li sian opinion. Neniu, post li, riskis sin en la loko. Per kio la fremdulo pasigis la horojn ? Oni ne konas tion. De tempo al tempo, oni aŭdis lin iri grandpaŝe tien kaj reen; dufoje oni ekkaptis sakraĵojn, bruon de disŝiritaj folietoj, frakason de disrompitaĵoj boteloj.

Tamen ŝveliĝis la malgranda grupo da homoj timigitaj, sed volontaj scii. S<sup>ino</sup> Huster prezentigis. Kelkaj tre gajaj junuloj, kun nigraj konfekciaj vestoj, kolumoj el celuloideo, kravatoj el papero - estis la Pentokosta lundo - kuniĝis al la grupo kun konfuzaj demandoj kiuj kreskigis la malordon. La juna Arŝio Harker montriĝis trairente la korton por enŝovi diskretan rigardon sub la mallevitaj rulkurtenoj de la salono. Li ne sukcesis ion distingi; sed li babilis, lasante kredi ke li estis vidinta, kaj aliaj gejunuloj de Iping formis rondon ĉirkaŭ li.

Estis ja la plej bela Pentokosta lundo kiun eblis imagi. Tute laŭlonge de la strato Granda viciĝis dekduo da budoj : pafbudo; sur la gazono, apud la forĝejo, tri ruldomoj, flava

kaj ĉokolada; kelkaj pitoreskaj foiristoj el du seksoj starigis masakroludon. La viroj surmetis bluajn ĵerzojn, la virinoj, helajn antaŭtukojn kaj ĉapelojn kun pezaj plumoj, tute laŭmode. Vodiero, de la "Ruĝa Cervido", kaj S<sup>ro</sup> Jagero, la ŝuisto kiu ankaŭ vendis brokantajn biciklojn, estis okupataj pendigi tra la strato brilajn flagetojn kiu iam servis en la lando por festi la unuan jubileon de la reĝino Viktoria.

Ene, en la intenca mallumo de la salono kie penetris tiun tagon nur malabunda mizera sunradio, la fremdulo, malsata - ni devas supozi tion, - timema, envolvinta en siaj varmaj kaj maloportunaj vestaĵoj, atente legis sian ĵurnalon tra siaj kolorigitaj okulvitroj, aŭ kunbatis siajn etajn malpurajn botelojn, kaj de tempo al tempo, laŭte grumblis kontraŭ la infanoj kiujn li aŭdis sen vidi ilin, ekster la fenestroj. En la angulo apud la stovo, la pecoj de duondekduo da rompita boteloj; akra klor-odoro venenis la aeron. Jen ĉio kiun ni scias laŭ tio kiun oni unue divenis kaj tio kiun oni pli poste trovis en la ĉambro.

Ĉirkaŭ tagmezo, la fremdulo subite malfermis la pordon de sia salono kaj aperis, fikse rigardanta la tri aŭ kvar uloj kiuj estis en la trinkejo.

- Sinjorino Halo ! li alvokis.

Iu tuje iris timeme sciigi S<sup>inon</sup> Halo<sup>n</sup>.

Post momento, tiu ĉi alvenis, iom senspira sed des pli furioza. Halo estis ankoraŭ for. Ŝi pretigis la scenon kaj kunportis sur malgranda pleto, la kvitigendan noton.

- Ĉu estas via noto kiun vi deziras, sinjoro ?

- Kial oni ne donis al mi tagmanĝon ? Kial oni ne servis al mi mian manĝon, nek respondis al miaj sonorilvokoj ? Ĉu vi kredas ke mi povas vivi sen manĝi ?

- Kaj mia noto, kial ĝi ne estas pagita ? rebatis S<sup>ino</sup> Halo. Jen tio kiun mi ŝatus scii !

- Mi diris al vi, antaŭ tri tagoj, ke mi atendis monon...



- Kaj mi respondis al vi, antaŭ tri tagoj, ke mi ne devis atendi la alvenon de via fonduso. Vi ne rajtas plendi pro tio ke via tagmanĝo iom malfruas ĉar mia noto ja malfruas kvin tagojn, ĉu ne ?

La fremdulo ĵetis mallongan sed energian sakraĵon.

- Ne ! Ne ! oni aŭdis de ekstere.

- Mi estus vere dankega al vi, sinjoro, se vi bonvolus gardi viajn sakraĵojn por vi.

La okuloj de la fremdulo montris pli kaj pli iritantan esprimon. Oni ĝenerale opiniis en la trinkejo, ke S<sup>ino</sup> Halo havis la avantaĝon super li. La daŭrigo de la interparolo montris ke oni ne eraris.

- Diru do, bravulino mia, rebatis la alia...

- Ne temas pri "bravulino".

- Mi diris al vi ke mia mono ne estis alvenita...

- Via mono, vere !

- Sed mi vere kredas ke en mia poŝo...

- Vi diris al mi, antaŭ tri tagoj, ke vi havis ankoraŭ kun vi nur ĉirkaŭ unu suverenon.

- Jes, sed mi retrovis aliajn.

Ironiajn ekkrioj ekstere : "Ha ! Ha !"

- Mi estus scivola scii kien.

La vorto ŝajnis tre malplezurigi la fremdulon. Li piedfrapis.

- Kion vi volas diri ?

- Kie do vi trovis monon ? Kaj cetere, antaŭ ol mi ricevas ion, antaŭ mi servas al vi tagmanĝon aŭ ol mi faras por vi kion ajn, vi devas klarigi al mi unu aŭ du aferojn kiujn mi tute ne komprenas, kiujn neniu ĉi tie komprenas kaj kiujn ĉiuj estas tre dezirantaj kompreni. Mi volas scii tion kion vi faris al mia seĝo tien supren; kaj mi volas scii kiel, via ĉambro estanta senhoma, oni tamen trovis vin tie. Miaj pensionanoj eniras tra la pordoj, estas la domregulo, kaj tio

kion vi ne faras ! Mi volas scii kiel vi reeniris. Kaj mi ankoraŭ volas scii...

Subite la fremdulo levis supren siajn manojn ankoraŭ gantitajn, ankoraŭfoje piedfrapis kaj kriis "Sufiĉe !" per tion da perforto ke li silentigis S<sup>inon</sup> Halo<sup>n</sup>.

- Vi ne komprenas, li diris, kiu mi estas nek tion kio mi estas. Mi tuj montros tion al vi. Certe ! Mi estas montronta tion al vi !

Li tiam metis sian malfermitan manon sur sian vizaĝon, kaj kiam li deprenis ĝin, estis meze de lia vizaĝo, nigra truo !

- Jen vidu !

Kaj faranta du paŝojn antaŭen, li etendis al S<sup>ino</sup> Halo ion kiun, tiu ĉi, la okuloj fiksintaj sur tiu facio transsorĉita, maŝine akceptis. Vidante tion kio estis, ŝi eligis kriegon, lasis fali la objekton kaj retropaŝis ŝanceliĝante. La nazo - estis rozeta kaj brila nazo de la fremdulo - ruliĝis sur la pargeto kun obtuza bruo de malplena kartono.

Li deprenis siajn okulvitrojn, kaj ĉiu en la trinkejo restis gape. Li demetis sian ĉapelon kaj, per bruska gesto, forŝiris siajn vangharojn kaj siajn bandaĝojn. Iu teruriĝo pasis kiel fulmo tra la trinkejo.

- Ho ! Dio mia ! oni kriis.

Kaj ĉiuj forfuĝis.

Estis pli terura ol oni ne povas imagi tion. S<sup>ino</sup> Halo, hororinta, eligis ĝemon kaj turnis sin al la dompordo. Juĝu do ! Oni antaŭvidis cikatrojn, malgraciecojn, realajn hororojn - sed nenio, nenio ! La bandaĝojn kaj la peruko trairis fluge la koridoron kaj iris fali en la trinkejon, kie la homoj saltetis kiel karpojn por ne esti trafitaj. Kaj ĉiuj sin deĵetis tumulte al perono. Fakte, la viro kiu staris tie, krieganta nekoheran klarigon, estis de la piedoj ĝis la kolumo, fortika kaj gestadanta knabego; sed super la kolumo, estis vakuo ! Ventaĵo ! nenio kiun oni povis vidi !

La homoj, ĉe la malsupro de la vilaĝo, aŭdis kriojn, kriaĉojn; rigardante la straton, ili vidis la gastejon vomi eksteren siajn tutajn ĉeestantojn. Ili vidis S<sup>inon</sup> Halo<sup>n</sup> fali kaj Teĉjo Henfrej salti por ne rulfali sur ŝin. Ili aŭdis la ŝrikojn pro teruro de Millia kiu, subite alkurante el la kuirejo al la tumultobruon, albatigis al la senkapa fremdulo. Iu vera panika fuĝo.

Tuĵe ĉiu, de la komenco ĝis la fino de la strato, la vendisto de sukeraĵo, la proprietulo de la masakroludo kaj sia helpanto, la viro de la balancilo, knaboj kaj knabinoj, elegantuloj de la vilaĝo, ŝikaj fraŭlinoj, maljunuloj en kitelo kaj ciganinoj kun antaŭtuko, komencis kuri; en palpebruma daŭro, iu svarmo da eble kvardek individuoj amasiĝis, cetere pliŝvelante ankoraŭ. Kaj estis iroj-reiroj, huadoj, demandoj, ekkrioj, supozoj, ĝis neniam ĉesi, antaŭ la loĝejo de S<sup>ino</sup> Halo. ĉiu ŝajnis hastema paroli samtempe kun la aliaj; rezulto : la Babelturo ! Malgranda grupo subtenis S<sup>inon</sup> Halo<sup>n</sup>, kiun oni relevis sveninta. Estis la plej konfuza diskuto, hakita de la nekredeblaj atestoj de iu bruema vidinto.

"Fantomon !" "Do, kion li faris ?" "Ĉu li ne dolorigis la knabinon, huj ?" "Li kuris al ŝi kun tranĉilo, mi kredas". "Neniun kapon, mi asertas !... Kaj ne estas maniero paroli; mi bone diras : iu senkapa viro !" "Ba ! Tio estas artifiko, fizika trompaĵo". "Li forpuŝis siajn bandaĝojn"...

Interpuŝiĝante por videti lin tra la malfermita pordo, la homamaso formis movantan angulon kies pinto, konsistanta el la plej aventuremaj gapantoj, estis apud la gastejo.

- Li haltis dum momento, mi aŭdis la ekkrion de la knabino, poste li duone turnis sin. Mi vidis subjupojn rapide pasi kaj li postkuris. Tio ne prenis dek sekundojn... Jen li kiu revenas kun tranĉilo enmane kaj pano... Li stariĝas tie kie li estis antaŭ momento, kvazaŭ li rigardis... antaŭ nur unu minuto, li trapasis tra tiu ĉi pordo... Mi diras al vi ke li tute

ne havas kapon ! Vi maltrafis...

Okazis movado dorsen kaj la viro kiu parolis, eksilentis por meti sin flanken kaj lasi pasi malgrandan irantaron kiu senhezite direktis sin al la domo. Paŝante kape, S<sup>ro</sup> Halo, tre ruĝa kaj tre decida; poste S<sup>ro</sup> Roberto Ĵafers, la policisto de la vilaĝo; poste la prudenta S<sup>ro</sup> Vaĝers. Ili nun venis provizitaj per arestordono.

La popolamaso daŭrigis laŭte interŝanĝi kontraŭdirajn informojn pri la freŝdataj faktoj.

- Ke li havas jes aŭ ne kapon, diris Ĵafers, mi devas aresti lin, kaj mi arestos lin.

S<sup>ro</sup> Halo antaŭenpaŝis al perono, direktis sin rekte al salonan pordon kaj trovis ĝin faŭkanta.

- Oficisto, li ordonis, faru vian devon.

Ĵafers eniris, Halo post li, Vaĝers la lasta. En la duonmallumo, ili vidis la senkapan korpon turnintan al ilia flanko, kun pankrusto en gantita mano, en la alia mano, peco de fromaĝo.

- Estas li, diris Halo.

- Diable ! Kion tio ĉio signifas ?

Tia estis la kolerigita demando kiun oni aŭdis eligi de iom pli supre ol la kolo de tiu viro.

- Vere, vi estas stranga homo, sinjoro ! sciigis Ĵafers. Sed, kun aŭ sen kapo, mia mandato diras "areston" (*France* : "korpokapton")... La servo estas la servo kaj...

- Ne tuŝu ! kriis la korpo ĵetante sin dorsen.

Subite li ĵetis grundon panon kaj fromaĝon, kaj S<sup>ro</sup> Halo havis nur tempon ekpreni la tranĉilon kiu estis sur la tablo. Tiam la maldekstra mano de la fremdulo demetis lian ganton kaj ĵetegis ĝin al vizaĝo de Ĵafers. Rapidege, tiu ĉi, tuj ĉesigante la sciigon de sia mandato, kaptis la pojnon sen mano, stringis la nevideblan gorgon. Li ricevis sur la tibio eksterordinaran baton kaj ekkriegis, sed sen rezigni. Halo

glitigis la tranĉilon sur la tablo ĝis Vaĝers kiu, por tiel diri, ludis la rolon de polica reprezentanto; poste li antaŭeniris kelkajn paŝojn ĝuste kiam Ĵafers kaj la fremdulo, kaptante, batante unu la alian, baraktis kaj skuiĝis tute apud li. Iu seĝo estis laŭ ilia irado : ĝi estis bruege puŝegita kaj ili falis kune.

- Ekprenu la piedojn ! kriis Ĵafers inter siaj dentoj.

S<sup>ro</sup> Halo, dum li strebis obei, ricevis en la ripojn bategon kiu senmovigis lin dum minuto. S<sup>ro</sup> Vaĝers vidis ke la senkapigita fremdulo estis, ruliĝanta, superanta super Ĵafers : li retirĝis al la pordo, la tranĉilo ankoraŭ en la mano, kaj tiel batiĝis al S<sup>ro</sup> Huster kaj al ĉaristo de Siderponto kiuj alkuris por helpi la leĝon kaj la ordon. Samtempe falis el la supro de la ĉifonujo, tri aŭ kvar boteloj de kie etendiĝis en la ĉambron, akra kaj fortaodoro.

- Mi kapitulacas ! ekkriis la fremdulo kvankam li tenis Ĵaferso<sup>n</sup> surplanke.

Kaj tuj li restariĝis, anhelanta, pli kaj pli stranga, sen kapo kaj sen manoj, ĉar li demetis sian dekstran ganton, post la maldekstran.

- Tio ne estas peninda..., li aldonis per obtuza voĉo.

Estis ja la plej stranga afero en la mondo, aŭdi tiun parolon kiu ŝajnis eligi el la malpleno; sed la kamparanoj de Susekso eble estas la plej pozitivaj homoj kiuj ekzistas sur la tero. Ĵafers restariĝis, siavice, kaj elmontris mankatendon. Sed li rondokule rigardegis.

- Diru do, vi ! li reparolis, subite afliktita pro la absurdeco de la tuta sceno. Oho ! Mi ne povas uzi ĝin, laŭ tio kion mi vidas...

La fremdulo kurigis sian manikon de supre malsupren de sia veŝto, kaj kiel mirakle, la butonoj kiujn sekvis tiu maniko troviĝis malbutonitaj. Tiam li palpis sian kruron kaj kliniĝis; iu alia ŝajnintus meti la manon al siaj ŝuoj, al siaj ŝtrumpetoj.

- Sed ! ekkriis Huster dum li estis tiel klininta, ne estas viro ! Estas nur vestaĵoj sen korpo ! Rigardu : ni povas vidi tra lia kolumo, la subŝtofon de la vestoj. Mi povus meti mian brakon enen.

Li etendis la manon, sed li kredis renkonti ion en la aero kaj li reprenis ĝin kun akuta kriego.

- Mi petas vin forigi viajn fingrojn el miaj okuloj ! diris la aera voĉo per tono de senindulga peto. La vero estas ke mi ĉeestas tute komplete, kapo, manoj, kruroj, kaj la cetero, sed tio estas ke mi estas nevidebla. Tio estas tre embarasa, sed estas tiel. Ne estas ja kialo, ŝajnas al mi, por ke mi estu disŝirita de ĉiuj stultuloj de Iping !

Nun malbutonitaj, kaj subportitaj de nevidebla korpo, ĉiuj liaj vestaĵoj staris kun la gesto de pugnoj apogintaj sur liaj koksoj.

Pluraj popolhomoj estis enirintaj; la ĉambro estis tute plene.

- Nevidebla, eh ? diris Huster kiu nesciis la malbonagojn de la fremdulo. Kiu iam aŭdis paroli pri simila afero ?

- Tio povas esti stranga, sed ne estas krimo. Kial mi estas atakita tiamaniere de policisto ?

- Ha ! Tio, estas alia afero ! rebatis Ĵafers. Neniu dubo ke vi estas iom malfacila percepti plentaglume. Sed mi estas posedanto de mandato, kaj ĉio estas laŭregula. Tio kion mi celas ne estas nevidebla : estas la ŝtelo efektivigita en la pastrejo. Oni enŝoviĝis en iun domon; oni prenis monon...

- Nu ?...

- Kaj la cirkonstancoj sugestas...

- Malseriozaĵoj, tiuj ĉiuj ! ekkriis la nevidebla viro.

- Mi bonvolas, sinjoro. Sed mi ricevis ordonojn...

- Konsentite ! Mi sekvos vin. Sed neniu mankateno !

- Estas la instrukcio ! sciigis Ĵafers.
- Neniu mankateno ! ripetis la fremdulo.
- Pardonu min.

Subite la fantomo sidiĝis kaj, antaŭ ol iu povintus ekkompreni tion kion okazis, la pantofloj, la ŝtrumpetoj, la pantalono estis ŝovitaj per la piedo sub la tablon. Poste la fremdulo restariĝis kaj forĵetis de si sian jakon.

- Tie ! Baru lin ! kriis Ĵafers subite ekkomprenante tion kio okazis.

Li ekprenis la veŝton : la veŝto baraktis; la ĉemizo eskapante el ĝi lasis ĝin mola kaj malplena en la manoj de la policano.

- Bone tenu lin ! kriis laŭte Ĵafers. Se iam li forlasas siajn vestojn !...

- Bone tenu lin, ĉiu ripetis plengorĝe.

Kaj ĉiuj ĵetis sin al la blanka ĉemizo kiu moviĝadis kaj kiu nun estis ĉiu kiun oni povis vidi de la fremdulo.

Iu maniko de tiu ĉi ĉemizo metis malbonan pugnobaton plenvizaĝe de Halo kiu troviĝis tie; malfermitaj brakoj, li renverse falis sur la maljunan Kelkadento<sup>n</sup>, la sakristianon. La postan momenton, la ĉemizo estis levita kaj ĥaose swingiĝis laŭlonge de la brakoj, kiel ĉemizo kiun viro demetas super sia kapo. Ĵafers ekkaptis ĝin : li sukcesis nur helpi demeti ĝin. Li estis trafita ĉe la buŝo de tia fortego ke li perdis sian spiron. Tuj li eltiris sian bastonon, kaj estis Teĉjo Henfrej kiun li malmilde atingis ĉe la supro de la kapo.

- Atentu ! Atentu !

Ĉiuj kriis, ŝirmis sin kaj frapis en la aero.

- Tenu lin !

- Fermu la pardonon !

- Ne lasu lin eskapi !

- Mi tenas ion.

- Tien !

- Tien !

Ili ĉiuj faris la bruon de vera kakofonio. Ĉiuj, ŝajnis, estis samtempe trafitaj. Sandio Vaĝers, prudenta kiel ĉiam, kaj la sprito aparte akriĝita de terura bato ricevita ĝuste sur nazo, remalfermis la pordon kaj forlasis la lukton. La aliaj, tuj sekvante lin, estis momente amasiĝintaj en la angulo apud la elirejo. La batoj daŭrade pluvis. Iu antaŭa dento de Fips estis frakasita; kaj pri Henfrej, estas la kartilago de lia orelo kiu estis damaĝita. Ĵafers estis frapita sub la makzelo; turnante sin, li frapiĝis kontraŭ io intermetita inter Huster kaj li, kiu detenis ilin fali unu sur la alian; li sentis fortikan bruston. Baldaŭ ĉiuj ekscititaj batalantoj amasiĝis en la ĉambro jam plenigita de homoj.

- Mi tenas lin ! kriegis Ĵafers puŝita, kaj stumblante meze de la homamaso, la vizaĝo karmezina, la vejnoj ŝvelintaj, ankoraŭ batalanta kontraŭ la malamiko kiun li tute ne vidis.

Oni foriĝis de ambaŭ flankoj ĝuste kiam tiuj ĉi malmulte kutimaj kontraŭuloj, pelitaj al la elira pordo, estis baldaŭ turniĝante rulfalontaj la duon-dekduon da ŝtupoj de la gastejo. Ĵafers, per sufokita voĉo, eligis krion; li tamen tute ne cedis kaj svingis la genuon; sed li piruetis sur si mem kaj peze falis, la kapo sur la gruzon. Estas nur tiam ke siaj fingroj cedis.

Okazis furiozaj krioj : "Bone tenu lin !" "Oni ne vidas lin !..." ktp...

Iu juna viro, fremda al la lando, kaj kies la nomo ne estis konata, fulmrapide kuregis, renkontis baron, falŝanceliĝis kaj venis fali sur la sternitan korpon de la policano. Meze de la strato, virino eligis krion kvazaŭ ŝi frapiĝis kontraŭ iu nevidata objekto; iu hundo, verŝajne puŝpelata, blekis kaj fuĝis bojante en la korton de Huster...

Kaj estas tiel ke la nevidebla viro malaperis.



Dum momento, la homoj restis konsternitaj; poste estis subite paniko kiu disigis ilin tra la vilaĝo kiel ventekblovo disĵetas mortintajn foliojn. Nur Ĵafers restis surloke, malsupre de la perono, tute senmova, la genuoj fleksintaj, la vizaĝo turninta al ĉielo.

## 08 \_ Sur la irado de la Nevidebla Viro.

Tiu ĉi ĉapitro estas treege mallonga. Oni legas en ĝi la aventuron de Gibins, la neprofesia pajloŝtopisto de la paroko. Dum li estis kuŝinta, preskaŭ endormiĝanta, sur la grandegaj dunoj, en kompleta izoliteco, li aŭdis tute apud si la bruon de homo tusanta, ternanta kaj furioze grumblanta. Li tremetis kaj vidis nenion. Tamen tiu voĉo sonoritis, estis nenio por dubi. Ĝi daŭrigis grumbladi kun tia abundeco kaj tia diverseco al kiuj rekoniĝas la sakraĵoj de bonedukita viro. Ĝi laŭtiĝis, poste mallaŭtiĝis, poste perdiĝis foren, al la flanko de Aderdino, laŭ tio kion kredis Gibins. Ĝi eksplodis per nervoza ternado kaj komplete mortis.

Gibins sciis ankoraŭ nenion pri la matenaj eventoj; sed la fenomeno estis tiom frapanta, tiom konsternanta ke sia kvieteco de filozofo tute ne eltenis : li hastege restariĝis kaj kurpaŝe supreniris la krutan deklivon de la irejo en la direkto al la vilaĝo, tiel rapide kiel li povis.

## 09 \_ S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel.

Imagu S<sup>ron</sup> Tomaso<sup>n</sup> Marvelo<sup>n</sup> laŭ aspekto de viro kun dika movebla vizaĝo, kun nazo en formo de cilindra protuberanco, kun diklipa kaj molaĉa buŝo, kun bizara kaj hirta barbo. Lia korpo inklinis al ventrodikeco kaj liaj mallongaj membroj ankoraŭ pliigis tiun ĉi staton. Li surhavis kuspe silkan ĉapelon; kaj la butonoj, tro ofte anstataŭigitaj de ŝnuropecoj ĉe la partoj de lia kostumo kiu plej bezonis subtenon, perfidis la rezolutan fraŭlon.

S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel sidis sur la vojrandoj, ĉe la alia flanko de la dunoj, direkte al Aderdino, proksimume unu kaj duonan mejlon de Iping. Liaj sensuigitaj piedoj trapasis tra la truoj de liaj ŝtrumpetoj; oni vidis liajn larĝajn piedfingrojn stariĝi kiel la oreloj de halthundo. Maldiligente - li ĉion faris maldiligente - li pretiĝis por surprovi paron da botoj. Estis fakte la plej bonaj botoj kiujn li posedis ekde multaj jaroj, nur iom tro larĝaj; tiuj kiujn li surhavis, tre taŭgaj dum sekaj veteroj, havis la plandumon vere tro maldikan por pluvaj tagoj. Nu, S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel abomenis la larĝajn ŝuojn; aliparte, li treege timis la malsekecon. Neniam, cetere, li tre zorgis pri siaj preferoj; sed la tago estis bela, kaj nenio estis pli bona por fari. Tial li aranĝis la kvar ŝuojn laŭ harmonia grupo sur la sablo, poste, li ekzamenis ilin. Vidante ilin tie, en la naskiĝanta herbo, prezentiĝis al lia penso ke liaj ambaŭ paroj estis tre malbelaj. Li tute ne estis mirigita aŭdi voĉon malantaŭ li.

- Ĉiaokaze, estas ŝuoj ! diris la voĉo.

- Jes, almozdonitaj ŝuoj, respondis S<sup>ro</sup> Marvel, konsiderante ilin kun kapo malestime klinita. Kiu estas paro la malplej abomena el du ? Per Jovo ! Mi volas esti pendigita

se mi scias tion !

- Hm ! eligis la voĉo.

- Finfine, mi jam surmetis pli malbonajn ol ilin... eĉ okazis al mi tute ne surhavi ilin... sed neniujn pli cinike malbelajn, pardonu mian dirmanieron... Mi memoras ke mi almozis ŝuojn dum tagoj, ĉar mi estis tedita de tiuj kiuj mi havas... Tiuj ĉi, kompreneble, estas en bona stato... Ni, turistoj, ni multe domaĝas niajn ŝuojn... Vi kredos min se vi volas, mi vane serĉis, mi ne trovis aliaĵon en ĉi tiu damna lando !... Vidu ja tion !... Kaj tamen, ĝenerale, bona lando pri la ŝuoj, vere ! Sed tie ja estas mia kutima sorto : jen prosperoj, jen malprosperoj ! Mi provizis min en tiu lando dum dek jaroj aŭ pli. Kaj nun esti tiele traktata !...

- Ĝi estas aĉa lando, diris la voĉo. Kaj pri la loĝantoj : ili estas aĉaj homoj !

- Ĉu ne ? diris Tomaso Marvel. Sinjoro ! Tiuj ĉi botoj, ĝi estas abomenaĵo !

Li turnis la kapon super sia ŝultro, rekten, por taksi la ŝuojn de sia kunparolanto kun la ideo fari komparadon. Ha ! Nu, jeees ! Tie kie devintus esti la piedoj de la kunparolanto, estis nek piedoj nek kruroj. Li turnis sin maldekstren : tien ankaŭ, estis nenio. Iu ekbrilo de miro trairis lian menson.

- Kie vi estas ? li diris, metante sin kvarpiede.

Li vidis ian etendaĵon de la izolita duno. La vento malproksime skuetis la verdajn genistojn.

- Ĉu do mi estas ebria ? demandis al si S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel. Ĉu mi haluciniĝis ? Ĉu estis al mi mem ke mi parolis ? Diable !...

- Ne timu, reparolis la voĉo.

- Sufiĉe da tiela ventroparolo ! diris Marvel vigle stariĝante sur siaj piedoj. Kie vi estas ?... Timo ? Ne plu ofte !...

- Ne timu, ripetis la voĉo.

- Estas vi kiu timos post minuto, idioto ! Kie vi estas ?  
Por ke mi kaptu vin !...

Post intertempo : "Vi do estas mortinta kaj enterigita ?"

Neniu respondo. S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel restis tie senŝuiĝinta, mirigita, sia jako kuŝigita surgrunde.

- Kvivit ! fajfis vanelo en la distanco.

- Kvivit, kvivit ! faris S<sup>ro</sup> Marvel. Ne estas la tempo por ŝerci.

La duno estis dezerta, oriente kaj okcidente, norde kaj sude. La vojo, kun siaj malmulte profundaj fosaĵoj kaj siaj ĉerande blankaj fostoj, iris glata kaj soleca, al sudo kaj al nordo; kaj, krom tiu ĉi vanelo, la ĉielo blua, ĝi ankaŭ, estis malplena.

- Dio helpu min ! faris S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel, resurmetante sian jakon. Estas tio kion mi trinkis... Mi devintus malfidi tion.

- Ne, ne estas tio kion vi trinkis, rebatis la voĉo, trankviligu viajn nervojn.

- Ho ! ekkriis Marvel.

Kaj lia vizaĝo paliĝis sub la sunbruno.

- Estas tio kion mi trinkis, ripetis liaj lipoj sen bruigi. Kaj li diŝjetis mirigitajn rigardojn ĉirkaŭ si. Kaj li retroiris, per hezitemaj paŝoj.

- Mi certe asertus ke mi aŭdis voĉon, li murmuris.

- Efektive !

- Jen ĝi denove ! eligis S<sup>ro</sup> Marvel, fermante la okulojn kaj, pasigante la manon sur sian frunton, per tragika gesto.

Li subite estis kaptita ĉe la kolo, fortege skuita, kaj restis pli ŝtonigita ol neniam.

- Ne faru la stultulon ! aldonis la voĉo.

- Estas bone, bravulo mia, ni tuj iros... ĉio tio estas senutila. Ne estas por diskuti pri tiuj ĉi eluzitaj botoj. Mi

foriros... Sed... eble estas fantomoj !

- Ne. Aŭskultu.

- Kion, bravulo mia ?

- Minuton ! eligis la voĉo vibranta pro energio...

- Do..., demandis Marvel kiu ĵus havis la senton esti tuŝita ĉe la brusto de fingro.

- Ĉu vi ja kredas ke mi estas spirito, nur spirito ?

- Kio vi alie estus ? diris Marvel gratante al si la nukon.

- Bonege ! eligis la voĉo per kvietiga tono. Nun, mi baldaŭ ĵetos al vi ŝtonojn ĝis kiam vi ŝanĝos vian opinion.

- Kie vi do estas ?

La voĉo ne respondis, kaj iu ŝtono, kvazaŭ venanta el la ĉielo, preterpasis sibilante : mankis nur la dikeco de haro por ke ĝi trafus la ŝultron de S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel. Ĉi tiu turnante sin ekvidis alian ŝtonon sekvi nekompreneblan vojlinion, resti dum momento pendanta, poste fali al grundo per tiom rapida moviĝo ke ĝi preskaŭ estis neperceptebla. La stuporo malhelpis lin eltiriĝi. Tria ŝtono ŝiris la aeron, resaltis de iu el liaj nudaj piedfingroj al fosaĵo. S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel eksaltis unupiede kaj kriis laŭtege. Li volis kuri, stumblis kontraŭ obstaklon kiun li tute ne vidis kaj, post farinte transkapiĝon, retroviĝis sidanta surteren.

"Nun", daŭrigis la voĉo, dum iu lasta ŝtono, desegnante kurbon en la aero, restis pendanta super la trampo, "ĉu mi ankoraŭ estas halucino ?"

S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel, anstataŭ ĉia respondo, penis reakirisian ekvilibron : denove ruliĝinta, li senmove tenis sin dum minuto.

- Se vi faras unu movon, tiu ĉi ŝtono frakasos al vi la kapon.

- Estas brila faro ! eligis S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel sidiĝinta, tenanta en sia mano sian vunditan piedon kaj suprenrigardanta al la lasta ĵetaĵo. Mi ne komprenas !

Ŝtonoj kiuj flugas tute sole ! Ŝtonoj kiuj parolas ! Do sobiru, nu rapide. Mi kapitulacas.

La ŝtono ekfalas.

- Estas tre simple. Mi estas nevidebla viro.

- Diru ion al mi, respondis S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel, anhelante, kie vi estas kaŝinta ? Kiel vi faris ? Mi tion nekonas...

- Mi estas nevidebla. Jen ĉio. Jen tio kion mi petegas vin kompreni...

- Neniu kaplablos kredi tion ! Vi ne bezonas, sinjoro, esti furioze senpacienca. Vere, donu al ni ideon : kiel vi kaŝiĝis ?

- Mi estas nevidebla, tio estas la grava afero. Kaj jen tio kion mi petas al vi kompreni...

- Sed kie vi estas ? intermetis Marvel.

- Ĉi tie je ses metroj de vi.

- Nu do ! Mi ne estas blinda. Vi baldaŭ diros al mi ke vi estas vento. Mi ne estas el tiuj malkleraj trampo...

- Konsentite ! Mi estas subtila aero : estas tra mi ke vi vidas.

- Tiel, vi havas nenion materialan ? Iun voĉon kaj, kiel mi dirus ? frazojn... vortojn... ĉu tio estas ?

- Mi estas homo, solida, bezonanta nutraĵojn, trinkaĵojn, vestaĵojn. Sed mi estas nevidebla. Ĉu vi komprenas ? Nevidebla ! Nevidebla !

- Kio ? Ĉu vere ?

- Jes, iu tre reala estulo.

- Do, diris Marvel, donu al mi iun el viaj manoj, se vi estas reala. Mi ne estas ĉifonulo tiel stranga ke vi ne povus... Disinjoro!, li aldonis, vi eksplodigas min tiel manpremanante min !

Tuj kiam siaj fingroj liberiĝis, li palpis la manon kiu ĉirkaŭtenis sian pojon, li timeme sekvis la brakon, frapetis

fortan bruston, distingis vizaĝon kun barbo - kun kia stuporo !

- Mi estas konfuzita ! Estas nekredebla ! Do, je distanco de unu mejlo [ $\pm 1,6\text{km}$ ], mi povus vidi kuniklon tra vi ! Ne estas peco de via individuo kiu estas videbla, krom...

Kaj li zorge ekzamenis la ŝajne malplenan spacon.

- Ĉu vi ne manĝis antaŭnelonge panon kaj fromaĝon ? li demandis.

- Jes, vi pravas : tio ne ankoraŭ asimiliĝis.

- Ha ! Jen kiu vere estas supernatura !

- Ĉio ĉi ne estas tiom timiga kiom vi kredas.

- Ĝi ja jam sufiĉas por mi... Ne bezonas tiom al mi !...

Sed kiel pri tio vi elturniĝis ? Kiel diable tio okazas ?

- Estas tro longa rakonto. Kaj cetere...

- Mi ripetas al vi, tio ĉio estas tre mirindega !

- Aŭskultu tion kion mi volas diri al vi. Mi bezonas helpon. Mi rakontis al vi. Mi neatendite falis sur vin. Mi estas perdiĝinta, freneza pro kolerego, nuda, senpova... Mi farintus murdon... Kaj mi vidis vin...

- Disinjoro !

- Mi proksimiĝis al vi, hezitis, mi daŭrigis mian vojiradon.

La fizionomio de Marvel esprimis teruron.

- Poste mi haltis. Li estas, mi diris al mi, kompatinda diablo, kiel mi mem. Li estas la viro kiun mi bezonas. Tiam mi ŝanĝis mian opinion, mi venis al vi, kaj...

- Disinjoro ! denove ĝemis Marvel. Mi estas tute konfuzita. Ĉu mi povas meti al vi demandon ? Kiel okazis ?... Kion vi ja povas, vi nevidebla, demandi al mi kiel helpon ?

- Mi petegas vin helpi min trovi vestaĵojn, ŝirmejon, la aliajn necesegajn aferojn. Mi forlasis ĉion kio estis al mi... Se vi ne volas, bone !... Sed vi helpos min, tio necesas.

- Mi estas tro mirkonsternita, eligis Marvel. Ne skuu

min pli. Lasu min. Necesas ke mi regajnas iom da kvieteco. Vi preskaŭ dispremis al mi iun piedfingron... Tio ĉio estas freneza ! Neniu sur la duno. Nenio tien supren ! Nenio estas videbla sur pluraj mejloj, nur la naturo ! Jen iu voĉo kiu alvenas en mian orelon, voĉo venanta el la ĉielo, poste ŝtonoj, poste pugnofrapo... Dio mia !

- Rekolektu vian spiriton ĉar nepras fari la laboron kiun mi destinis al vi.

S<sup>ro</sup> Marvel ŝvelis siajn vangojn; liaj okuloj iĝis tute rondaj.

- Jes, mi elektis vin, insistis la voĉo. Vi estas la sola homo, esceptinte la kelkajn stultulojn de tie, kiu scias la ekziston de ĉi tiu nekredebla afero : iu nevidebla viro. Necesas ke vi helpu min. Helpu min, mi faros por vi tion kion mi povos : iu nevidebla viro estas potenca viro.

Li eksilentis por terni laŭte.

- Sed se vi perfidas min, se vi neglektas sekvi miajn instrukciojn...

Li paŭzis kaj fortege frapis sur la ŝultro de S<sup>ro</sup> Marvel.

Tiu ĉi aŭdigis ĝemon de teruro kaj, malproksimiĝante la timindan pugnon :

- Mi ne intencas perfidi vin. Tion ja ne kredu. Kion ajn vi farus, mi deziras helpi vin. Sed, diru al mi tion kion mi devos fari... Disinjoro !... Ĉio kion vi volos, mi pretas fari tion.



## 10 \_ Vizito de S<sup>ro</sup> Tomaso Marvel al Iping.

Post kiam la unua paniko disflugiĝis, Iping komencis diskuti. La skeptikeco subite levis la kapon, iu skeptikeco iom maltrankvila, tute ne maltima, iu skeptikeco tamen. Nenio estas pli facila ol ne kredi pri nevidebla viro. Entute, tiuj kiuj vidis nian heroon sveni en la spaco aŭ kiuj spertis la fortikecon de sia brako oni povis nombri ilin sur la fingroj. El tiuj ĉi atestantoj, S<sup>ro</sup> Vaĝers mankis nune, ĉar li singarde metis sin en sekureco malantaŭ la riglilojn, kaj la stangojn de sia propra loĝejo; Ĵafers, li, estis kuŝinta, senatenta, en la salono de la gastejo. Kaj grandaj strangaj ideoj kiuj transpasas la sperton, kelkafoje havas malpli da efiko sur la viroj kaj la virinoj ol malgrandaj pli proksimaj konsideroj.

Iping estis gaja kaj elegante vestinta. Ĉiu surmetis siajn festajn vestaĵojn. La festadoj de tiu Pentekosta lundo estis atenditaj ekde unu monato kaj duono. Posttagmeze, la homoj mem kiuj kredis al la nevidebla viro komencis repreni siajn etajn amuzojn aŭ almenaŭ provis reveni al ili, supozante ke li estis definitive forlasita. Pri la skeptikuloj, la tuta okazaĵo estis por ili nur ŝerco. Tio kio estas certa, estas ke ĉiuj, kredemuloj kaj nekredemuloj ankaŭ, estis ekstreme gajaj tiun tagon.

La herbejo de Hajsman estis provizita per tendo kie S<sup>ino</sup> Bunting kaj aliaj virinoj preparis teon, dum la infanoj partoprenis kur-konkursojn kaj ludis diversajn ludojn sub la propravola kaj brua gvidado de Fr<sup>inoj</sup> Kuss kaj Sakbuto. Sendube, estis en la etoso ia maltrankvilo; sed la homoj, plejparte, havis bonan saĝecon maski ĉion kion ilia imagpovo sentigis al ili konfuziĝon. Sur la placo de la vilaĝo estis alte ŝatata, speciale ĉe la junuloj, iu klina kablo laŭ kiu,

pendigante sin sur pulio provizita per teniloj, oni rapide glitis ĝis dikan sakon lokita ĉe la alia fino. Granda sukceso ankaŭ por la balanciloj kaj masakroludoj. Estis ankoraŭ vapororgeno ligita al malgranda karuselo de lignaj ĉevaloj, kaj kiu plenigis la aeron per akraodoro de varma graso kaj per malpli malagrable muziko. La klubanoj, kiuj matene ĉeestis ĉe la diservo, estis belegaj kun siaj rozaj kaj verdaj insignoj : la plej ĝojaj estis ornamintaj sian ĉapelon per rubandoj kun brilaj koloroj. La maljuna Fleĉer ja havis pri la maniero celebri la festojn nur sufiĉe neŝercajn ideojn : aŭ tra la jasmeno, aŭ tra la malfermita pordo de lia ĝardeno, oni povis vidi lin, apud la fenestro, gardeme staranta sur tabulo kiun subtenis du seĝoj, kaj kalkanta la plafonon de lia ĉambro.

Ĉirkaŭ la kvara, fremdulo eniris en la vilaĝon, venanta flanke de la dunoj, malgranda homo, malalta, vivoplena, sub ĉapelo tute fadenmontra. Li ŝajnis senspira, liaj vangoj ŝveliĝis fortege. Lia kolora vizaĝo ŝajnis timema. Li turniĝadis kun la vivardeco de iu kiu baraktas. Li turnis laŭ la angulo de la preĝejo kaj direktis sin al la gastejo kiun ni konas. Parenteze, la maljuna Fleĉer memoras esti vidanta lin : li eĉ estis tiom miregita pro tiu nenormala ekscitiĝo ke, senintence, dum li rigardis, li lasis iun kvanton de sia kalkolakto elflui al li laŭ la peniko ĝis en la maniko.

La fremdulo, laŭ la observo de la mastro de masakroludo, ŝajnis paroli al si mem; S<sup>ro</sup> Huster tuj rimarkigis tion. Li haltis antaŭ la perono de la gastejo kaj, laŭ S<sup>ro</sup> Huster, aspektis turmentata de interna lukto antaŭ povi decidiĝi eniri. Fine, li grimpis la ŝtupojn; S<sup>ro</sup> Huster vidis lin turni maldekstren kaj malfermi la salonpordon. S<sup>ro</sup> Huster eĉ aŭdis voĉojn kiuj, de ene de la ĉambro kaj la trinkejo, informis la viron pri lia eraro.

- Rezervita ĉambro ! kriis Halo.

La fremdulo mallerte refermis la pordon kaj eniris en la trinkejon.

Post kelkaj minutoj, li reaperis ĉe la sojlo de la gastejo, viŝanta siajn lipojn per la mandorso kaj kun mieno de kontentiĝo kaj de kvieteco kiu, laŭ S<sup>ro</sup> Huster, estis afliktita. Li restis momenton rigardante ĉirkaŭ li; poste S<sup>ro</sup> Huster vidis lin paŝi kaŝe kaj suspekto al la krado de la korto, al kiu rigardis la fenestro de la salono. Post iom da hezito, li apogis sin kontraŭ unu el la fostoj de la krado, eliris el sia poŝo pipeton el argilo kaj komencis plenkŝtopi ĝin. Liaj fingroj tremis. Li mallerte ekbruligis ĝin, kaj, krucigante la brakojn, komencis fumi kun malvigla sinteno kiun cetere malpruvis la rapidaj ekrigardoj ekĵetitaj de tempo al tempo al la korto.

Ĉion ĉi, S<sup>ro</sup> Huster sekvis super sia butikfenestro de tabakejo : la strangeco de tiuj agmanieroj instigis lin daŭrigi siajn observadojn.

Subite, la fremdulo restarante sin enŝovis sian pipon en sian poŝon, poste li malaperis en la korto. Tuj S<sup>ro</sup> Huster, imagante al si esti la atestanto de iu bagatela ŝteteleto, ĉirkaŭiris rapide sian vendotablon kaj ĵetegis sin sur la straton por bari la retiriĝon al la ŝtelisto. Sammomente, S<sup>ro</sup> Marvel reaperis, sian ĉapelon oblikve, kun dika pakaĵo envolvita de blua tablotuko en iu mano kaj kun, en la alia mano, tri volumoj ligitaj kune, kiel oni akceptis tion pli poste, per la ŝelkoj de la pastoro. Tuj kiam li ekvidis Huster<sup>on</sup>, li eligis ian spasman suspiron kaj, vigle turnanta maldekstren, li tuj kuris.

- Ŝtel ! Arestu lin ! kriis Huster, ekpostkurante lin.

La sentoj de S<sup>ro</sup> Huster estis viva sed efemera. Li vidis la viron, ĝuste antaŭ li, lerte eksalti al la angulo de la preĝejo, en la direkton de la dunoj; li vidis lin preteriri la flagojn kaj la flagrubandojn de la festa vilaĝo : nur du aŭ tri vizaĝoj turniĝis al li. Denove S<sup>ro</sup> Huster kriegis : "Arestu

lin !... Ŝtel !..." kaj kuraĝe persekutadis lin. Sed li ne faris dek paŝolongojn kiam lia maleolo estis ekkaptita de malklara ĉirkaŭpremo : Li ne pli kuris, fendis la spacon per nekredebla rapideco; subite lia kapo proksimiĝis al la grundo, kaj al la ĉeestantoj; li nur vidis mil stelojn, indiferenta de tiam pri ĉio kio povis okazi.

## 11 \_ En la gastejo.

Por bone kompreni tion kio okazis en la gastejo, necesas malantaŭeniĝi ĝis la momento kiam S<sup>ro</sup> Marvel estis vidita de S<sup>ro</sup> Huster, tra lia fenestro.

Ĝuste tiu momente, S<sup>ro</sup> Kuss kaj S<sup>ro</sup> Bunting troviĝis en la salono. Ili estis detale ekzamenantaj la strangajn okazaĵojn de la mateno kaj, kun la permeso de S<sup>ro</sup> Halo, ili sin fordonis al detalega esploro de la aferoj de la nevidebla viro. Ĵafers estis preskaŭ resaniĝinta post sia falo; li estis rehejmeniĝanta, helpita de siaj amikoj. La disĵetitaj vestaĵoj de la fremdulo estis forprenitaj de S<sup>ino</sup> Halo; oni estis reordiginta la dormĉambron. Sur la tablo antaŭ la fenestro kie la fremdulo estis kutime laboranta, Kuss trovis tri dikajn manskribitajn librojn titolitajn "Taglibro".

"Taglibro !" ripetis Kuss, sidiĝante kaj metante du el la volumoj por subteni la tria kiun li malfermis. "Hem ! neniu nomo sur la ŝirmopaĝo; estas embarasa !... Ciferoj... kaj figuroj..."

La pastoro alvenis rigardi super lian ŝultron; Kuss turnis la paĝojn, la vizaĝo subite seniluziigita.

- Ve ! Nur ciferoj, Bunting.

- Ĉu ne estas figuroj, desegnoj kiu iom klarigas ?...

- Vidu mem... Estas unuflanke, matematikaj signoj kaj aliflanke, hieroglifoj, el rusa aŭ kelkalia lingvo el tiu speco... Estas ankaŭ grekaj literoj. Koncerne la grekan, mi pensas ke vi...

- Sendube, sendube ... eligis Bunting demetante kaj viŝpurigante siajn okulvitrojn.

Li estis subite tre embarasita; ĉar pro tio el la greka kiu restis al li en la kapo, ne indis paroli.

- Jes, la greka, kompreneble, povas liveri al ni fadenon, spuron...

- Mi tuj trovos por vi ekstrakton.

- Mi pli bone ŝatus antaŭe alĵeti rigardon al la tri volumoj, rebatis S<sup>ro</sup> Bunting, ankoraŭ viŝante siajn okulvitrojn. Unue iun ĝeneralan impreson, Kuss, kaj tiam, vi komprenas, ni povos serĉi la fadenon...

Li tuis, surmetis siajn okulvitrojn, zorge alfiksis ilin, denove tuis... kaj esprimis bondeziron por ke ajna incidento venus malhelpi la ĝenan dornon kiu ŝajnis neevitebla. Li prenis per malrapidaj antaŭzorgoj la volumon kiun Kuss prezentis al li. Ĉe tiu momento, la dezirata incidento okazis.

La pordo subite malfermiĝis. Ambaŭ viroj ekstremis, rigardis ĉirkaŭ ili... Ili preskaŭ havis plezuron vidi vizaĝon el korala rozkoloro sub ĉapelo el kuspita silko.

- Ĉu ne estas la trinkejo, ĉi tie ? demandis la ulo, senmove, la okuloj fiksj.

- Ne, kune respondis tiuj du sinjorojn.

- Ĉe la alia flanko, ulo mia ! aldonis S<sup>ro</sup> Bunting.

- Kaj bonvolu fermi tiun ĉi pordon ! kriis S<sup>ro</sup> Kuss per kolera tono

- Perfekte ! diris la entrudulo per profunda voĉo, tute malsimila, ŝajnis, kompare kun la raŭka voĉo de sia unua demando.

Poste, per lia voĉo de la unua fojo, "estas bone !...", li eligis... "Malferlu !"

Li foriris kaj fermis la pordon malantaŭ si.

- Iu maristo, mi pensas ! diris Bunting. Ili estas bravaj homoj. "Malferlu..." ja, estas mara termino aplikiginta, mi pensas, al lia foriro el tiu ĉi ĉambro.

- Sendube ! eligis Kuss. Mi havas la nervojn tute skuitaj hodiaŭ. Tio saltigis min, tiu pordo tiel malfermiĝanta.

S<sup>ro</sup> Bunting ridetis kvazaŭ ankaŭ li mem ne saltis.

- Kaj nun, li reparolis suspirante, al niaj libroj !  
- Minuton ! eligis Kuss kiu iris ŝlosi la pordon. Tiel ni estos ŝirmitaj kontraŭ ajna invado.

Li alvenis tien kiam estis snufbruo.

- Unu afero estas nediskutebla, konfesis Bunting altirante seĝon apud tiun de Kuss. Certe okazis strangaj aferoj en Iping dum tiuj lastaj tagoj, tre strangaj aferoj. Mi evidente ne povas kredi tiun absurdan rakonton de nevidebla viro...

- Estas nekredebla, fakte, vere nekredinda. Sed tiu fakto restas, ke mi vidis, mi certe vidis ĝis la fundo de lia maniko...

- Sed ĉu vi vidis ? Ĉu vi estas tute certa ? Supozu, ekzemple, spegulon... La halucinoj okazas tiel facile ! Mi nescias ĉu vi iam vidis vere lertan fizikiston...

- Mi ne volas denove rediskuti. Ni elĉerpis tiun aferon; Bunting. Nun temas pri tiuj ĉi volumoj... Ha ! Jen kelkaj linioj el tio kio ŝajnas al mi greka. Certe estas grekaj literoj.

S<sup>ro</sup> Kuss havis sian fingron meze de la paĝo. S<sup>ro</sup> Bunting iomete kliniĝis por rigardi pli proksime : tiu greka estis skribita el la plej maldikaj litertipoj. Li pensis ke ĉiuj liaj paroĥanoj kredis je lia scio pri la grekaj kaj hebreaj tekstoj : ĉu do necesus konfesi ? aŭ ĉu li retrovus restaĵojn de scio ?... Subite li suferis strangan senton ĉe la nuko; li provis movi la kapon, li renkontis nevenkeblan reziston. Estis eksterordinara kunpremo, la stringo de iu firma kaj peza mano kiu instige alpuŝis al li la mentonon al la tablo.

- Neniun movon, sinĉoj miaj, flustris voĉon, aŭ mi frakasos la kapon al vi ambaŭ !

Bunting rigardis la vizaĝon de Kuss, tiam tute alproksimigita al la sia : li vidis la speguliĝon de sia propra teroro.

- Mi ĉagreniĝas trakti vin krude, reparolis la voĉo, sed mi ne povas fari alie... Ekde kiam vi lernis traserĉi en la sekretaj notoj de sciencisto ?

Du mentonoj samtempe albatigis la tablon, kaj du makzeloj interfrapiĝis.

- Ekde kiam vi lernis invadi la privatan hejmon de viro en malfeliĉo ?

Kaj la ekbato ripetiĝis.

- Kien oni metis miajn vestaĵojn ?... Aŭskultu ! La fenestro estas fermita, kaj mi prenis la ŝlosilon de la pordo. Mi estas sufiĉe forta, kaj mi havas la fajrostangon ĉemane... kaj mi estas nevidebla. Ne estas por dubi, mi povus, se mi volus, mortigi vin ambaŭ kaj foriri tute kiel eble plej senpene. Ĉu vi aŭdas min ? Perfekte. Nu, se mi forliberigas vin, ĉu vi promesas al mi ne fari stultaĵojn kaj plenumi tion kion mi diros al vi ?

La pastoro kaj la kuracisto rigardis unu la alian, kaj la kuracisto grimacis.

- Jes, diris S<sup>ro</sup> Bunting.

Kaj la kuracisto ripetis : Jes !

Tiam ilia kolo eskapis la stringon; ili restaris, la vizaĝon tre ruĝan, svingante sian kapon de dekstre maldekstren kaj de maldekstre dekstren.

- Bonvolu resti sidintaj kie vi estas, diris la nevidebla viro. Tie mi havas fajrostangon, vi scias... Kiam mi eniris en tiu ĉambro, li daŭrigis post esti metinta la fajrostangon sub la nazo de ĉiu el siaj vizitantoj, mi ne atendis trovi ĝin okupitan, kaj kontraŭe mi atendis trovi, kun miaj notlibroj, mian tutan vestaĵaron... Kie troviĝas mia vestaĵaro ?... Ne, ne starigu vin. Mi tre bone vidas ke ĝi ne plu estas ĉi tie. Sed ĉimomente, kvankam la tagoj estas sufiĉe varmaj por ke nevidebla viro povu iri kaj reiri, la vesperoj estas malvarmaj : Mi bezonas vestojn kaj kelkajn aliajn aferojn.



Necesas ankaŭ al mi tiuj ĉi tri libroj.

## 12 \_ La Nevidebla Viro furioziĝas.

Estas neeviteble ke, alvenante al tiu punkto, la rakonto denove interrompiĝas, pro ia tre dolora kialo kiun oni scios post momento.

Dum tio okazis en la salono, dum S<sup>ro</sup> Huster gvatis S<sup>ron</sup> Marvelon fumantan sian pipon kontraŭ la barilo de la korto, S<sup>ro</sup> Henfrej kaj S<sup>ro</sup> Halo, en la trinkejo, daŭrigis diskuti pri la sola ebla temo tiun tagon en Iping.

Subite oni aŭdis brutalan baton kontraŭ la salonpordo, iun akran krion, poste nenion pli.

- Hej tien ! eligis Teĉjo Henfrej.

- Hej tien ! oni ankaŭ eligis malantaŭ la verŝtablo.

S<sup>ro</sup> Halo ordometis ĉion per malrapida sed sperta mano.

- Io okazas ! li diris forlasante la verŝtablon por direkti sin al la salono.

Teĉjo kaj li kune alproksimiĝis al la pordo, atentemaj, la okuloj malfermegitaj.

- Estas io ! Halo rediris.

Kaj Henfrej jesis per konsenta signo.

Malagrablaj ekblovoj el kemiaodoro ekvenis ĝis ili, poste la konfuzan bruon de tre rapida parolado, tre mallaŭte.

- Diru do, ĉu vi bezonas ion ? demandis Halo frapante sur la pordo.

La flustradoj ĉesis, estis momento de silento, poste ankoraŭ flustradoj, poste denove krio : "Ne, ne, vi ne faros tion !..." Tiam oni aŭdis movadojn, iun seĝon renversitan, iun mallongan lukton. Poste refoje silento.

- Diable !..., ekkriis Henfrej inter siaj dentoj.

- Ĉu vi ne bezonas ion ? Halo ankoraŭ demandis per pli laŭta voĉo.

La pastro respondis per strange hakata voĉo :

- Ne... dankon ... Ne ĝenu... nin.
- Strange ! diris Henfrej.
- Strange ! ripetis S<sup>ro</sup> Halo.
- Li diris : "Ne ĝenu nin !...
- Mi ne aŭdis.
- Poste li snufis.

Ili restis tie, la orelo streĉita. Ĉe la alia flanko, la babilado estis rapida kaj obtuza :

- Mi ne volas, diris S<sup>ro</sup> Bunting, laŭtigante la voĉon. Mi diras al vi, sinjoro, ke mi ne faros tion...

- Kion tio signifas ? demandis Henfrej.  
- Li diras ke li ne volas. Ne estas al ni ke li parolas, ĉu ne ?

- Estas hontinde ! kriis S<sup>ro</sup> Bunting enĉambre.

- Hontinde ! ripetis S<sup>ro</sup> Henfrej. Mi klare aŭdis tion...

Kiu parolas nun ?

- S<sup>ro</sup> Kuss, mi pensas, respondis S<sup>ro</sup> Halo. Ĉu vi aŭdas ion ?

Silento. La bruoj, interne, estis konfuzaj kaj malklaraj.

- Ŝajnas ke ili skuas la tablotapiŝon ! diris Halo.

S<sup>ino</sup> Halo aperis malantaŭ la verŝtablo. Ŝia edzo faris signojn al ŝi por instigi ŝin silenti. Tio vekis en ŝi edzecan kontraŭdiremon.

- Kion vi aŭskultas tien ? Ĉu vi ne havas ion pli bonan por fari, iun festan tagon kiel hodiaŭ ?

Halo provis komprenigi sin per grimacoj kaj mutaj gestoj; sed lia edzino estis obstina, ŝi laŭtigis la voĉon. Halo kaj Henfrej, malinstigitaj, retiriĝis sur la fingroj de la piedoj en la trinkejo daŭrigante gestadi por priinformi ŝin.

Unue ŝi rifuzis kredi tion kion ili aŭdis. Poste ŝi postulis ke Halo eksilentu dum Henfrej raportis al ŝi la aferon. En tiu tuto, ŝi inklinis konsideri nur sensencaĵojn, oni sendube

estis movinta la meblaron...

- Mi aŭdis lin krei "Estas hontinde!". Mi certas tion, diris Halo.

- Mi ankaŭ aŭdis tion, asertis Henfrej.

- Tio pruvas nenion.

- Ŝŝ! eligis S<sup>ro</sup> Teĉjo Henfrej. Ŝajnas al mi ke mi aŭdis la fenestron!...

- Kiun fenestron?

- La salonfenestron.

Ĉiu tenis sin atentema, la orelo akriĝita. La okuloj de S<sup>ino</sup> Halo, direktitaj rekte antaŭ ŝi, vidis sen vidi la luman rektangulon de la enireja pordo, la blankan kaj movoplenan straton, la fasadon de la butikoj de Huster, varmigita de la junia suno. Subite ĉe la sojlo de sia butikoj, Huster aperis, kun la okuloj pligrandigitaj pro emocio, kun la brakoj skuataj en aero.

"Helpon!" li kriis. "Ŝtel!"

Li trapasis kurante tra la luma rektangulo, iranta al la krado de la korto, kaj malaperis.

Samtempe venis el la salono agitoplena tumulto, iu bruo de fenestro kiun oni fermas.

Halo, Henfrej kaj ĉiuj la klientoj de la trinkejo interpuŝiĝante kuregis sur la straton. Ili vidis iun rapide turniri la angulon, irantan al la dunoj, kaj S<sup>ro</sup> Huster fari eksalton kiu finiĝis damaĝe por lia nazo kaj lia ŝultro. Ĉe la malsupro de la strato, la homoj staris senmovaj pro miro aŭ alkuris.

S<sup>ro</sup> Huster kuŝis tie, svenigita pro sia falo; Henfrej haltis por rigardi; sed Halo kaj du laboristoj elirintaj el la trinkejo daŭrigis kune ĝis la angulo, eligante senartikulaciajn kriojn kaj vidis S<sup>ron</sup> "Marvelo" malaperi malantaŭ la preĝejo. Venis al ili en la kapon tiu kurioza ideo ke tiu viro estis la nevidebla viro subite iĝinta videbla, kaj rapide ĉiuj kune

postkuris lin. Sed Halo apenaŭ transpasis dekduon da metroj ke li eligis surprizkriegon kaj falis flanken, kapantaŭen, alkroĉante sin al iu el la laboristoj kaj kuntirante lin surgrunden en sia falo. Li estis puŝpelita tute kiel ĉe futbalo. La alia laboristo returniĝis, rigardis kaj, kredante ke Halo akcidente falis, li rekomencis la persekutadon : estis nur por suferi stumbligon, tute kiel Huster. Poste, dum sia kamarado baraktis ĉe siaj piedoj, li flanke ricevis baton por faligi virbovon.

Ĝuste kiam li falis, la homamaso alfluis de la placo kaj turniris la angulon. La unua ulo kiu aperis estis la mastro de la masakroludo, iu granda kaj dika viro vestita de blua ĵerzo. Li miris vidi, en tiu malplena strato, tri viroj kuŝintaj sur grundo laŭ ilia tuta longeco, sen videbla kialo. Sed io frapis la piedon kiun li havis malantaŭe : kaj refalis kapantaŭen, kaj flanken rulis, ĝuste por embarasi la krurojn de sia frato kaj partnero, kiu sekvis lin en la polvon. Kaj ambaŭ estis batitaj, piedpremitaj, superŝutitaj per insultoj de multe da tro hastemaj uloj.

Kiam Halo, Henfrej, kaj la du laboristoj estis haste elirintaj el la domo, S<sup>ino</sup> Halo, instruita de jaroj de sperto, estis restinta en la trinkejo apud la kaso. Subite la salonpordo malfermiĝis, S<sup>ro</sup> Kuss aperis, kaj, sen rigardi ŝin, malsuprenkuris la ŝtupojn de la perono, rapide al la angulo de la strato.

- Haltigu lin ! li kriis. Ne lasu lin ĵeti lian pakaĵon ! Vi povos vidi lin tiel longe kiel li tenos tiun pakaĵon !

Li ne suspektis pri la ekzisto de Marvel : La nevidebla viro kaptis la librojn kaj la pakaĵon, kaj ĵetegis ilin en la korton. La okuloj de S<sup>ro</sup> Kuss esprimis koleron kaj firmecon; sed lia kostumo estis nesufiĉa : ia eta blanka subjupo, ĉifita, apenaŭ deca ĉe la lando de Evzon-oj (Soldato de la greka armeo).

- Haltigu lin ! li kriis. Li ŝtelis mian pantalonon. Kaj li senvestigis la pastoron de la kapo ĝis piedoj !

- Tuj postkuru lin, li ordonis al Henfrej, pasante apud Huster etendita, vizaĝaltere.

Sed dum li turniris la angulon por rekuniĝi kun la superekscitita homamaso, iu neatendita bato faligis ankaŭ lin laŭ maldeca sinteno. Iu plenkure tretis peze sur iu fingro. Li kriegis, penis por restari sin sur la piedoj, estis denove batita kaj ĵetita kvarpiede : li ja estis trudita kompreni ke li estis ne la ĉasanto sed la ĉasato. Ĉiuj reiris kurante al la vilaĝo. Li denove releviĝis kaj estis forte trafita malantaŭ la orelo. Li ŝanceliĝis poste, seninsiste, retiriĝis al la gastejo, saltante super la senhelpa Huster kiun li nun trovis sidinta tra sia vojo.

Jam li estis sur la ŝtupoj de la gastejo kiam li aŭdis, malantaŭ si, krion de furiozo superantan la tutan zumadon, kaj sonoratan vangofrapon kiu atakis ies vangon. Tiu ĉi voĉo, li rekonis ĝin, estis tiu de la nevidebla viro.

Unu sekundon poste, S<sup>ro</sup> Kuss estis reveninta en la salono.

- Jen li kiu revenas, Bunting ! li diris, ekĵetiĝante enen. Gardu vin !

S<sup>ro</sup> Bunting staris en la embrazuro de la fenestro streĉe okupita pri la entreprenitan taskon konsistigi al si decan kostumon per la tapiŝo de la fajrejo kaj iu numero de la graflanda gazeto.

- Kiu revenas ? li demandis, ekstremante tiel forte ke sia kostumo preskaŭ demetiĝis.

- La nevidebla viro ! respondis Kuss sin pelante al la fenestro. Pli bone estus ke ni liberigus la lokon. Li batalas kiel frenezulo !

Post unu sekundo, S<sup>ro</sup> Kuss estis en la korto.

- Bona ĉielo ! ekkriis S<sup>ro</sup> Bunting, hezitante antaŭ

terura alternativo.

Li tiam aŭdis teruran lukton en la koridoro de la gastejo. Lia decido estis tuj prenita. Li saltis tra la fenestro, haste ĝustigis sian kostumon, kaj forkuris tra la vilaĝo tiel rapide kiel permesis tion al li liaj malgrandaj grasaj kruroj.

Ekde la kolerkrio eligita de la nevidebla viro kaj la memorinda fuĝo de S<sup>ro</sup> Bunting, neblas doni pluhaveblan raporton pri la okazaĵoj. Eblas ke la unua intenco de la nevidebla viro estis simple kovri la retiriĝon de Marvel, portanto de la vestoj kaj libroj. Sed lia karaktero, kiu neniam estis tre konstanta, ŝajnis esti suferita ian ventoturniĝon : li komencis frapi, faligi ĉiujn, por plezuro, pro amo de la arto.

Imagu la straton plenan da homoj kiuj kuras; la pordoj forte fermiĝas; oni batalas por trovi rifuĝon. Imagu la invadantoj kiuj renkontas la skafaldo, en malstabila ekvilibro, de la tabulo kaj la seĝoj de la maljuna Fleĉer : ĉu vi imagas la katastrofon ! Aliloke, estas terurita paro, kruele surprizita sur balancilo.

La tumulta fluo estis pasinta : la strato Granda de Iping, kun siaj ludoj kaj sia dekoracio, estas dezerta : Nur la nevidebla malbena almenaŭ daŭrigas turmentadi ilin. Tie kaj tie ĉi, restaĵoj de la masakroludo, fragmentoj de ŝirita tolo, disĵetitaj varoj de iu butikoj de dolĉaĵoj. Ĉie la bruoj de ŝutoj kiuj fermiĝas, de seruroj kiuj rigliĝas; pri la homa specio oni videtis nur, tie kaj tie ĉi, iun okulon sub tremetanta palpebro, en la angulo de la fenestra vitro.

La nevidebla viro kelktempe amuziĝis frakasi ĉiujn fenestrajn vitrojn de la gastejo; poste li ĵetis iun el la stratlanternoj en la fenestron de la salono de S<sup>ino</sup> Grogram. Estis ankoraŭ li, sendube, kiu distranĉis la draton de la telegrafo de Aderdino, iom post la dometo de Higgin, sur la

vojo al Aderdino. Post tio, surbaze de lia aparta naturo, li tute eskapis el la percepto de la homoj, li neniam plu estis nek vidita, nek aŭdita, eĉ nek tuŝita en Iping. Li tute disbloviĝis.

Preskaŭ du horoj ja fluis antaŭ ol iu maltimas riski sin inter ĉagrenaĵo kies la strato Granda proponis kiel spektaklaĵo.



## 13 \_ S<sup>ro</sup> Marvel diskutas sian submetiĝon.

Ĉe krepuska horo, Iping apenaŭ komencis malfermi timeme la okulojn sur tio kio restis de la festo.

Iu viro, malgranda, malsvelta, kapvestita per eluzita ĉapelo el silko, pene paŝis en la duonlumo, inter la fagoj, sur la vojo al Bramblehurst. Li kunportis tri volumojn kune ĉirkaŭligitajn per ia eleganta elasta ligilo, kaj pakaĵon envolvitan en blua tablotapiŝo. Lia kuperoza vizaĝo esprimis konsternon kaj lacecon; Li senspirige paŝadis per hastema paŝo. Li estis akompanita de alia voĉo ol la sia kaj, de tempo al tempo, li ekskuiĝis sub la trafo de manoj kiujn oni ne vidis.

- Se vi ankoraŭfoje forlasas min, diris la voĉo, se vi ankoraŭ provas forlasi min...

- Disinjoro ! ekkriis S<sup>ro</sup> Marvel, mia ŝultro iĝas nur vundo !

- Mian vorton, mi mortigos vin !

- Sed mi ne provis forlasi vin ! respondis Marvel per tono en kiu oni sentis ke la larmoj estis proksimaj. Mi ne konis tiun damnindan vojturnon, kaj jen ĉio ! Kiel diable mi konintus ĝin, tiun vojturnon ? La vera vero, estas ke oni puŝpelis min...

- Mi puŝpelos vin multe pli se vi ne gardas vin !

S<sup>ro</sup> Marvel subite resilientis. Li plenblovis la vangojn, kaj liaj okuloj montris iun malesperan esprimon.

- Jam estas sufiĉe ja lasi tiujn krudulojn tuŝi mian malgrandan sekreton, sen ke vi forpafiĝu kun miaj verkoj. Estas bonsorte por kelkaj el ĉi tiuj malsprituloj esti forfuĝantaj, esti forkurantaj kiel ili faris. Ĉi tie mi estas... Neniu sciis min nevideblan. Kaj nun kion mi faros ?

- Kaj mi, do ? Marvel demandis inter siaj dentoj.

- Ĉio estas perdita. La okazo baldaŭ troviĝos en la ĵurnaloj. Ĉiuj subobservos min. Ĉiuj estos singardemaj.

Tiu parolado daŭris per fortegaj malbenojn, poste la voĉo eksilentis. La malespero plikreskis sur la vizaĝo de S<sup>ro</sup> Marvel, kaj lia paŝo malrapidiĝis.

- Antaŭenpaŝu, do !

La vizaĝo de la kompatinda Marvel koloriĝis grize inter du ruĝaj makuloj.

- Bone tenu tiujn ĉi librojn, stultulo ! eligis krude la voĉo. La fakto estas ke mi devos uzi vin... Vi estas mizera instrumento, sed kio !, manke de pli bone, necesas ke mi itiligas ĝin.

- Ho ! Mi estas mizera instrumento ! ĝemis Marvel.

- Certe ja !

- Mi fakte estas la plej malbona instrumento kiun vi povus havi... ĉar mi ne estas forta, li aldonis post senkuraĝa silento, mi ne estas tre forta.

- Ĉu vere ?

- Poste, mi malfortiĝos. Ĉi tiu malgranda afero, Dio mia, mi sendube eskapis, sed, senkulpigu min, mi povintus superi.

- Kion vi diras ?

- Mi ne havas la nervojn, mi ne havas la energion kiujn necesus por tio kion vi deziras.

- Mi revigligos vin, mi !

- Mi pli bone preferus ke vi ne devus fari tion... Mi ne volus malutili viajn projektojn, kedu min; sed tio povus okazi... pro timo kaj senkapableco.

- Mi ne konsilas tion al vi ! la voĉo diris per trankvila memfido.

- Ha ! Mi volus esti mortinta !... Vere estas nenia justeco... Vi tamen devus bone akcepti... Ŝajnas al mi ke mi tute rajtas...

- Paŝu do !

S<sup>ro</sup> Marvel rapidigis siajn paŝojn, kaj dum tempo, ili resilientis.

- Estas diable malfacile ! sciigis Marvel.

Ricevinte nenian sukceson, li modifas siajn projektojn.

- Kion mi gajnus ? li daŭrigis per tonon de homo kiun oni netolereble traktas senjustece.

- Ho ! Silentu, kriis la voĉo per subita kaj miriga forto. Mi prizorgos viajn bezonojn. Kontentiĝu fari tion kion oni diras al vi. Vi povas tre bone fari tion. Vi estas sencerbulo, sed vi tre bone faros tion.

- Mi diras al vi, sinjoro, ke mi ne estas la homo kiun vi bezonas. Mi diras tion respektoplene, sed tio estas.

- Se vi ne silentas, mi tuj ankoraŭ premegos al vi la pojnnon ! diris la nevidebla viro. Mi bezonas pripensi.

Baldaŭ du kvadratoj de flava lumo aperis tra la arboj, kaj la turo de spajro siluetiĝis kontraŭ la mallumo.

- Mi metos la manon sur vian ŝultron dum la tuta transiro trans la vilaĝo, diris la voĉo. Provu obeeme iri; ne provu fari azenaĵojn. Se necese, estus des pli malbone por vi...

- Mi scias, suspiris Marvel, mi scias tion ĉion.

La viro kun tiom malfeliĉa mieno sub sia preteruzita ĉapelo supreniris kun siaj pakaĵoj la tutan straton de la vilaĝeto kaj sinkis en la nokto preter la lastaj lumigitaj fenestroj.

## 14 \_ En Stoŭe-Haveno.

Je la deka, la morgaŭon matene, S<sup>ro</sup> Marvel troviĝis, kun distaŭzita barbo, malpura, kovrita de polvo, manoj enŝovitaj en la poŝoj, lacege aspektanta, ĝenata, malkvieta, ŝvelanta ĉiumomente la vangojn, sidinta sur benko antaŭ malgranda gastejo de la ĉirkaŭurbo de Stoŭe-Haveno. Apud li estis la gravaj libroj, sed nun kunligitaj per ŝnuro. Koncerne la pakaĵon, ĝi estis forlasita en la arbaroj, ĉe la elirejo post Bramblehurst : estis la konsekvenco de ŝanĝo okazigita en la planoj de la nevidebla viro. Neniu turnis sian atenton al S<sup>ro</sup> Marvel sidinta sur tiu ĉi benko; tamen lia malkvieteco daŭris same kiel febro; liaj manoj ne ĉesis direktiĝi sinsekve al liaj diversaj poŝoj kiujn ili fosis per nervoza esploremo.

Li tie restis dum ja preskaŭ unu horo, kiam iu jam neĵuna maristo eliris el la gastejo kun ĵurnalo enmane kaj venis sidi sin apud li.

- Estas bela vetero, hodiaŭ ! diris la noveveninto.

S<sup>ro</sup> Marvel ĵetis al li rigardon kiu ŝajnis timegoplena.

- Jes, tre bela.

- La vera sezonvetero ! aldonis la alia per tono kiu ne permesis kontraŭdiro.

- Jes, fakte...

La maristo elprenis dentopinglon el sia poŝo kaj komencis metodeme uzi ĝin. Liaj okuloj, tamen, havis plenan liberecon por ekzameni la polvoplenajn vestojn de sia najbaro kaj la librojn metitajn apud li. Kiam li proksimiĝis al S<sup>ro</sup> Marvel, li aŭdis kvazaŭ sonon de moneroj falantaj en poŝon, kaj li estis mirfrapita pro la kontrasto inter la aspekto de S<sup>ro</sup> Marvel kaj tiu indikaĵo de relativa abundeco. Tial li obstine revenis al iu ideo kiu strange atakis unue lian

fantazion.

- Vi havas librojn !... li diris subite ĉesante la manipuladon de la dentopingo.

S<sup>ro</sup> Marvel ekstremis kaj rigardis lin.

- Jes, jes, li eligis... librojn.

- Ĉu estas eksterordinara aferoj en la libroj.

- Mi vere pensas !

- Sed ekzistas ankaŭ eksterordinaraj aferoj aliloke ol en la libroj.

- Estas ankoraŭ vere !

S<sup>ro</sup> Marvel suprenrigardis al sia kunparolanto kaj observis lin.

- Estas, ekzemple, eksterordinaraj aferoj en la gazetoj.

- Sendube !

- Kaj eĉ en tiu ĉi ĵurnalo.

- Ha !

- Estas iu afero, diris la maristo fiksante al S<sup>ro</sup> Marvel iun memfidan okulon, estas, ekzemple, iu babilaĵo pri nevidebla viro...

S<sup>ro</sup> Marvel havis malŝatan paŭton, gratis sian vangon kaj sentis siajn orelojn brulajn.

- Kion ili baldaŭ rakontos ! Li suspiris per milda voĉo.

Ĉu en Aŭstrio aŭ en Ameriko, tiu nevidebla viro ?

- Ne, ne... ĉi tie.

- Disinjoro ! ekkriis S<sup>ro</sup> Marvel, vigle stariĝante.

- Kiam mi diras ĉi tie, daŭrigis la maristo, por la kvietigeo de Marvel, mi ne volas diri ĉi tie, en la loko kie ni estas, mi volas diri apud ĉi tie.

- Iu nevidebla viro ! Kaj kion li sukcesis fari ?...

- Ĉiaspecajn aferojn ! diris la maristo kiu strabe rigardis sian apudulon. Jes ja, ĉiajn aferojn !

- Mi legis nenian ĵurnalon ekde kvar tagoj.

- Estas de Iping ke li deiris.

- Vere !

- Estas tie kie li komencis. De kie li tiam venas ? Neniu ŝajnas tion scii. Vidu, tien : Iu stranga afero en Iping. Kaj estas dirita, en la artikolo, ke la pruvoj estas ekstreme solidaj, treege.

- Dio mia.

- Estas vere neverŝajna rakonto. Estas pastoro kaj kuracisto kiel atestantoj. Ili mem vidis lin... aŭ pli ĝuste, ne, ili ne vidis lin !... Li estis, diras la ĵurnalo, loĝanta en la gastejo de la loko, kaj neniu ŝajnas esti informiganta pri lia kriplesco ĝis la tago kiam, en kverelo - estas la ĵurnalo kiu diras tion - la bandaĵoj kiuj li havis sur la kapo trovis sin ŝiritaj. Oni tiam rimarkis ke lia kapo estis nevidebla. Tuj oni provis ekkapti lin. Forĵetante siajn vestaĵojn, ankoraŭ diras la gazeto, li sukcesis forfuĝi, sed nur post senespera lukto en kiu li sentigis gravajn vundojn al nia inda kaj bonega oficisto, S<sup>ro</sup> J. A. Ĵafers... La rakonto estas sufiĉe preciza, ĉu ne ? La nomoj kaj ĉio.

- Dio mia, ripetis S<sup>ro</sup> Marvel, vagigante ĉirkaŭ si konsternitajn rigardojn, provante fingropinte, blindopalpe, kalkuli sian moneron en sia poŝo, kaj plena de nova stranga ideo.

- Estas tute miriga rakonto.

- Ĉu ne ? Eksterordinara, mi maltimas diri tion.

Neniam antaŭe mi aŭdis paroli pri nevidebla viro; sed, kiel iras nun la mondo, oni aŭdas aferojn tiel neverŝajnajn ke...

- Kaj tio estas ĉio kion li faris ? demandis Marvel, kun senĝena mieno.

- Nu, eble tio ne sufiĉas !

- Kaj ĉu li ne okaze eskapis ? Jes, li eskapis, kaj estas ĉio, ĉu ne ?

- Jen ĉio, fakte... Ĉu tio ne sufiĉas ?

- Ho ! Jes !

- Mi ja kredas, diris la maristo, mi vere kredas !
- Ĉu li ne havis komplicojn... ? La ĵurnalo tute ne diras ke estis komplicoj, ĉu ne ? demandis S<sup>ro</sup> Marvel, malserena.
- Ĉu do ne sufiĉas al vi iu ulo el tiu speco ? Ne, dank'al Dio, ni povas diri, li ne havis tion.

Kaj la maristo malrapide klinis la kapon.

- Tio vere ĝenas min, la ideon ke tiu knabego trakuras la landon... Nuntempe, li estas libera, kaj, laŭ certaj atestantoj, oni supozas ke li ekvojiris al Stoŭe-Haveno. Vi komprenas ke ni estas tutĝuste en la regiono. Tio ne estas ĉarlatanaj petolaĵoj. Pensu pri ĉio kion li povus fari ! Kion vi fariĝus se li iom tro drinkus kaj se li pro fantazio surfalus sur vi ? Supozu ke li volas ŝteli, kiu kapablus malhelpi lin ? Li povas eniri, li povas cediĝi la ĉirkaŭbarilojn, li povas trapasi tra kordono da policanoj tiel facile kiel vi kaj mi, ni povas diskrete malkuniĝi kun blindulo. Eĉ pli facile : ĉar la blinduloj, laŭ tio kion oni diris al mi, havas tre kaj tre akrajn orelojn...

- Li certe havas teruran avantaĝon ! kapjesis S<sup>ro</sup> Marvel. Kaj poste...

- Ho ! jes, ian avantaĝon !...

Dum tiu tempo, S<sup>ro</sup> Marvel ne ĉesis rigardi ĉirkaŭ si, streĉante la orelon al plej malgrandaj bruoj, klopodante sensi nesentebajn movojn. Li ŝajnis prenonta gravan decidon. Li tuis malantaŭ sia mano; li denove subobservis ĉirkaŭe, akrigis la orelon, kliniĝis al la maristo kaj, mallaŭtigante la voĉon :

- Hazarde okazis al mi scii, pri la nevidebla viro, unu aŭ du detalojn. Tio de aparta fonto.

- Nu do ! vi ?

- Jes, mi.

- Ĉu vere ? Kaj ĉu mi povas demandi al vi ?...

- Vi estos mirata, diris Marvel malantaŭ sia mano.

Estas terura afero.

- Vere !

- Bedaŭrinde ! Jes, avide komencis Marvel per tono de konfidenco.

Subite lia fizionomio ŝanĝiĝis :

- Ho ! li eligis, ekrektigante sin rigide sur sia sidloko.

Kaj lia vizaĝo klare esprimis fizikan doloron.

- Ho, li denove diris.

- Kio okazas ? eligis la maristo, tre interesiĝanta.

- Mi havas dentodoloron, respondis Marvel, metante sian manon al sia orelo !.

Li reprenis siajn librojn kaj ŝajnigi ke li devis daŭrigi sian vojon. Li stariĝis kaj laŭiris strangmaniere la benkon, malproksimiĝante iom post iom de sia interparolanto.

- Sed vi estis ĵus rakontonta al mi ion pri tiu nevidebla viro ?

S<sup>ro</sup> Marvel ŝajnis primediti.

- Kia ŝerco ! diris iu voĉo.

- Estas ŝerco ! rediris S<sup>ro</sup> Marvel.

- Sed estas en la gazeto ! rimarkigis la maristo.

- Tamen estas ŝerco. Mi konas la knabegon kiu elpensis la rakonton. Ne ekzistas nevidebla viro en la mondo...

- Sed kiel klarigi ke ĉi tiu ĵurnalo ?... Ĉu vi diras al mi ?...

- Absolute nenion, eligis S<sup>ro</sup> Marvel kun insisto.

La maristo rondokule rigardis, sian ĵurnalon enmane. S<sup>ro</sup> Marvel vidalvide rigardis lin.

- Atendu do, diris la alia, levigante sin siavice.

Kaj per malrapida voĉo :

- Vi tuj subtenos al mi... ?

- Jes, eligis Marvel.

- Kial do vi lasis min tutsimple rakonti al vi ĉiujn ĉi vanaĵojn, ja ? Kion tio signifas lasi homon alpreni stultan



ŝajnon ?

S<sup>ro</sup> Marvel ŝvelis siajn vangojn. La maristo karmeziniĝis kaj kunpremis la pugnojn.

- Jen dek minutoj ke mi paroladas. Kaj vi, eta tabakpoto, kun via sunbrunigita vizaĝo, vi ne kapablis havi la bazan ĝentilecon de...

- Vi ne volus serĉi kverelon, kun mi ?

- Serĉi kverelon ! Mi vere sentas bonan deziron.

- Ĉu vi venas ? diris iu voĉo.

Subite iu irigis returne S<sup>ron</sup> Marvel<sup>n</sup>, kiu malproksimiĝis vere per stranga irmaniero, per hakita paŝado.

- Vi bone pravas fortroti ! kriis la maristo.

- Fortroti ! Kiu ? Mi ? diris Marvel.

Kaj li foriris oblikve, per grandaj paŝlongoj, kun de tempo al tempo, fortegaj antaŭenpuŝadoj. Tuj post ia distanco, li komencis grumbleti tutsole protestojn, plendmotivojn.

- Malsaĝa besto ! grumblis la maristo, pugnojn ĉe la koksoj, krurojn dismetitajn, postrigardanta la individuon kiu foriris. Mi lernigos al vi, triobla ŝtipkapulo, tion kio estas moki min... kiam ĝi estas tie, en la gazeto !

Li tute ne klare perceptis la respondon de Marvel kiu ankoraŭ malproksimiĝanta, baldaŭ estis kaŝita de la vojkurbiĝo. Sed li restis majesta, plenmeze de la vojo, ĝis la momento kiam la alveno de iu veturilo de buŝisto devigis lin moviĝi. Tiam li reiris al Stoŭe-Haveno. Li grumblis tutsole : "Kian frenezulon oni renkontas !... Li kredis moktrompi min. Tiu ĉi stultaĵo !... Tial ke ĝi estas en la gazeto..."

Iom pli poste, li sciigis ke alia eksterordinara fakto okazis ne for de tie. Estis la apero de "manpleno da mono" - nenio pli, nenio malpli - mono pasanta tutsole, kaj sen ke oni vidas kiu tenis ĝin, laŭlonge de la muro, ĉe la angulo de la strateto Sankta- Mikaelo.

Unu el liaj kamaradoj vidis tiun mirindaĵon, ĝuste ĉimatene. Li tuj volis preni la monon : la stranga papilio malaperis. Nia maristo "ne petis pli bone, li diris, ol kredi ion ajn : sed tio, tamen estis iom tro sufoka !..." Tamen, li komencis pripensi pri tio.

Nu, la rakonto pri la fluganta monero estis ĝusta. Ĉie en la ĉirkaŭaĵo, de la fama Banko de Londono kaj de la Graflandoj ĝis la vendotabloj de la butikoj kaj gastejoj - la pordoj volonte restantaj malfermitaj pro tiu bela suno - mono estis kviete kaj lerte ŝtelmalaperigita, po manplenoj, po ruloj; oni vidis kelkajn senhaste flosi laŭlonge de muroj, en la ombrejoj, poste rapide eskapi el la rigardoj de tiuj kiuj alproksimiĝis. Cetere, kvankam neniu signalizis al ĝi la vojon, ĝi senvarie finiĝis sian misteran kurson en la poŝon de tiu ekscitita viro kun la eluzita silka ĉapelo, kiu sidiĝis antaŭ la eta gastejo de la ĉirkaŭurbo.

Estis dek tagojn pli poste - kaj nur kiam la rakonto de Arkteo jam estis malnova - ke nia maristo alproksimigis la faktojn kaj komprenis kun teruro ke li estis la najbaro de la nevidebla viro.

## 15 \_ La viro kiu kuris.

Je la horo kiam ekvesperiĝis, la kuracisto Kempo estis sidanta en sia kabineto en la belvedero kiu, de la supro de la monteto, superstaris Arkteo<sup>n</sup>. Estis agrabla ĉambreto : tri fenestroj ĉe la nordo, la oriento kaj la sudo; bretoj kovritaj de libroj kaj de sciencaj publikaĵoj; granda labortablo; antaŭ la norda fenestro, mikroskopo, vitraj lamenoj, etaj instrumentoj, kelkaj kulturaĵoj kaj, dise, flakonoj de reakciiloj. La lampo de la kuracisto jam lumis, kvankam la ĉielo ankoraŭ brilegis pro la subiranta suno, kaj la rulkurtenoj estis levitaj : ne estis por timi ke iuj uloj el ekstere povu rigardi internen.

La kuracisto Kempo estis juna viro, kun alta staturo, svelta, blondhara, kun preskaŭ blanka lipharo. La laboro, al kiu li diligentis, devis, li vere esperis tion, valori al li sian elekton ĉe la Reĝa Akademio.

Liaj okuloj, tiumomente deprenita de lia verko, kontemplan la sunon kiu subiris malantaŭ la alia monteto, fronte al li. Ekde eble unu minuto, li estis restanta, la plumon al la lipoj, admirante la belegan oran lumon kiam sia atento estis altirita de la malgranda makulo kiun estigis viro, nigra kiel inko, alkuranta siaflanke super la monteta supro. Tiu ĉi individuo, tute malgranda, portis grandegan cilindran ĉapelon, kaj li kuris tiel rapide ke oni apenaŭ distingis la movadon de siaj kruroj.

"Ankoraŭ iu el tiuj azenoj, pensis la kuracisto Kempo, kiel tiu kiu ĵetis sin tiumatene kontraŭ min ĉe la angulo de la strato, kun lia : '*S'njoro, la nevidebla viro alvenas...*' Mi ne povas koncepti tion kiu konfuzas la kapon de tiuj homoj. Oni kredus sin ankoraŭ dum la XIIIa jarcento !"

Li stariĝis, proksimiĝis al la fenestro kaj rigardis ĉe la malluma flanko de la monteto, la malgrandan nigrulon kiu galopege malsupreniris.

"Li ŝajnas furioze hastema... Sed li ne ŝajnas antaŭeniri ! Certe li ne kurus pli peze se siaj poŝoj estis plenplenaj de plumbo... Vi do estas postkurita, bonulo mia !"

Baldaŭ la plej alta el la vilaoj kiujn iom post iom, pluigante Arkteo<sup>n</sup>, estis grim pantaj la monteton, kaŝis la kuranton. Li reaperis dum momento, poste eklipsiĝis por refariĝi videbla trifoje inter la izolitaj domoj kiuj sekvis; fine la teraso kovris lin.

- Kiaj azenoj ! ekkriis la kuracisto Kempo turniĝante sur la kalkanoj por reveni al sia skribotablo.

La uloj kiuj, mem estantaj sur la vojo, pliproksime vidis la fuĝanton kaj povis observi la kruelegan teruron dissemitan sur lia ŝvita vizaĝo, ne havis la saman indiferentecon ol la kuracisto Kempo. Ĉe pasado, kurante, la viro aŭdigis monbruon, kiel plena monsako kiu oni skuas. Li ne rigardis nek dekstren nek maldekstren; liaj dilatitaj okuloj serĉis funde de la monteto nur la domojn kie la lampoj lumis, la lokojn, sur la strato, kie la homoj grupiĝis. Lia misfendita buŝo falis ĉe iu flanko; li havis bavon ĉe la lipoj; lia spirado estis raŭka kaj brua. Ĉiuj tiuj kiujn li flugtuŝetis, haltis kaj postrigardis lin laŭlonge de la vojo, demandante al si kun ia konfuziĝo, la kialon de lia hastego.

Tamen, tien supren sur la monteto, iu hundo kiu ludis, subite ekhurlis kaj kuris rifuĝi sub pordegon; oni estis ankoraŭ mirigita kiam pasis ion ie, tutproksime, kvazaŭ ventoblovo, kun la anhelanta spirbruo : hu !... hu !... hu !...

La homoj eligis kriojn, oni haste forlasis la pavimojn de la strato. Tio fariĝis ĝenerala bruego kiu nature malvolviĝis ĝis malsupre de la monteto. Oni kriis en la strato antaŭ ol Marvel estis nur duonvoje; kaj oni barikadis sin en la domoj,

kaj oni frapfermis la pordon malantaŭ si... Marvel aŭdis ĉion;  
li faris lastan senesperan strebon. La teruro superis lin,  
antaŭiĝis al li, invadis la urbon.

"La nevidebla viro ! La nevidebla viro !... Li alvenas".

## 16 \_ "Al Ĝojaj Ludantoj de Kriketo".

"Al ĝojaj Ludantoj de Kriketo" ! La gastejo estas tute ĝuste malsupre de la monteto, ĉe la kapstacio de la tramvojo. La kelnero, kun siaj dikaj ruĝaj brakoj apogitaj sur la verŝtablo, parolis pri ĉevaloj kun anemia koĉero, dum nigrabarbulo manĝis biskvitojn kaj fromaĝon, trinkis bieron de Burton kaj uson-angle babilis kun policano kiu ne deĵoris.

- Kial do oni krias tiel ? demandis la anemia koĉero, ŝanĝante la konversacion kaj klopodante ekrigardi ĉe la altaĵon, super la malpura flava kurteno de la malalta fenestro. Iu ĵus pasis tie, eksteren, kurante.

- Eble, estas fajro ? diris la kelnero.

Paŝoj alproksimiĝis, rapidaj kaj pezaj; perforte pelita, la pordo malfermiĝis kaj Marvel eniris, ploranta, hartaŭzita, sen ĉapelo, la kolumo de sia vesto ŝirita; li turnis sin per spasma movo kaj provis fermi la pordon, ĝi estis retenata de rimeno.

- Li venas ! li ekkriis kun teruro, per ŝrika voĉo. Li alvenas ! La nevidebla viro ! Malantaŭ mi ! Kompatu ! Helpon, helpon !

- Fermu la pordojn ! diris la policano. Kio okazas ? Kial tiu ĉi tumulto ?

Li iris forpreni la rimenon kiu retenis la pordon; tiu ĉi brue refermiĝis. La usono fermis la alian pordon.

- Lasu min eniri tien, enen, eligis S<sup>ro</sup> Marvel ŝanceliĝante kaj petegante, sed ankoraŭ ĉirkaŭpremante siajn librojn. Lasu min eniri enen ! Enŝlosu min ien. Mi diras al vi ke li kursekvas min ! Mi liberigis min de li. Li promesis mortigi min kaj mortigos min.

- Vi estas en sendanĝera loko, diris la nigrabarbulo. La

pordo estas fermita. Pri kio temas ?

- Lasu min eniri tien !, rediris Marvel.

Li eligis akran krion kiam la pordo ekskuiĝis sub forta albato, baldaŭ sekvita per hastegaj batoj kaj per krioj kraŝitaj elekstere.

- He ! eligis la policisto, kiu estas tie ?

S<sup>ro</sup> Marvel kiel frenezulo komencis frapi la kapon kontraŭ la tabuloj kiujn li konsideris kiel la pordoj.

- Li mortigos min ! Li prenis tranĉilon aŭ ion...

Kompatu...

- Jen vidu ! diris la kelnero. Eniru tien.

Kaj li levis la tabulon de la verŝtablo. S<sup>ro</sup> Marvel impetegis malantaŭ, ĝuste kiam la ekstera alvoko estis ripetata.

- Ne malfermu ! li ĝemis. Mi petegas vin, ne malfermu ! Kie mi tuj kaŝos min ?

- Ĉu do estas la nevidebla viro ? demandis la individuo kun la nigra barbo kun iu mano malantaŭ la dorso. Tempas ke ni vidus lin !

Subite la fenestraj vitroj displitiĝis, kaj estis en la strato krioj kaj kuroj ĉiudirekten. La policano stariĝinta sur la kanapon, rigardis eksteren kaj streĉis la kolon por vidi kiu estis antaŭ la pordo. Li malsupreniris, kun la brovoj hirtaj.

- Prave, li simple diris.

La kelnero staris antaŭ la salonpordo kiu nun estis ŝlosita malantaŭ S<sup>ro</sup> Marvel; konfuzita, li turnis la okulojn al la fenestro, kaj ĉirkaŭiris la verŝtablon por rekuniĝi kun la aliaj. Subite ĉio kvietiĝis.

- Mi ŝategus havi mian klabon, diris la policano, sin heziteme direktante al la pordo. Tuj kiam ni malfermos, li eniros, kaj ne eblas haltigi lin !

- Ne do rapidu malfermi ! diris maltrankvile la anemia koĉero.

- Malriglu, diris la nigrabarbulo. Kaj, se li eniras...

Li montris revolveron kiun li havis enmane.

- Ha ne ! Ne tion ! eligis la policano. Tio estus murdo.

- Mi scias en kiu lando mi estas : mi celpafos la krurojn.

Deŝovu la riglilojn.

- Ne, ne pafu malantaŭ mi ! eligis la kelnero kiu penis vidi super la kurteno.

- Tute konsentite, respondis la viro kun la nigra barbo.

Kaj kliniĝinte antaŭen, la revolveron tute preta, li deŝovis mem la riglilojn. La kelnero, la koĉero kaj la policano esti singardemaj.

- Eniru ! Li duonvoĉe diris, retropaŝante, ĉiam fronte al la malriglita pordo, kun sia pistolo malantaŭ li.

Neniu eniris, la pordo restis fermita. Kiam, kvin minutojn pli poste, alia koĉero, de ekstere, transpasis singarde la kapon, ili ankoraŭ estis tie, vigloplenaj. Iu malkvieta vizaĝo eliris el la salonon:

- Ĉu ĉiuj pordoj de la domo estas fermitaj ? demandis Marvel. Li ĉirkaŭiras, li skolte ĉirkaŭvagas... Li estas ruza kiel diablo !

- Ho ! Disinjoro ! ekkriis la kelnero. Estas malantaŭe... Atentu pri la pordoj, Dio mia !

Li rigardis ĉirkaŭ si kun deprimita mieno. La salonpordo brue refermiĝis kaj oni aŭdis la ŝlosilon turniĝi.

- Estas la kortopordo kaj la privata enirejo. Tiu de la korto...

Li haste eliris el la trinkejo. Post minuto, li reaperis, tenante grandan distranĉilon.

- La pordo al la korto estis malfermita ! li diris.

Kaj lia dika malsupra lipo malleviĝas.

- Eble li jam estas en la domo, observigis la anemia koĉero.

- Ĉiaokaze, li ne estas en la kuirejo, respondis la



kelnero. Estas du virinoj kiuj aŭdis nenion; kaj cetere, mi disĵetadis batojn ĉiudirekten per tiu ĉi malgranda lardotranĉilo. Ili ne pensas ke li estas enirinta. Ili rimarkis...

- Ĉu vi bone riglis la kuirejon ? demandis la koĉero.

- Mi ne estas infano ! eligis la kelnero.

La barbulo reingigis sian revolveron. ĝuste tiam, la verŝtabla tabulo reen falis, kaj per furioza bato, la salona pordo estis disrompita. Oni aŭdis krii Marvel kiel kato kiun oni strangolas; tuj oni transiris super la verŝtablon por defendi lin. La revolvero de la granda barbulo ekpafis, la spegulo apogita en la salono estis fendetita kaj displitiĝis surplanke kun bruego.

Enirante en la ĉambro, la kelnero vidis Marvel<sup>on</sup>, strange kaŭranta, lukti kontraŭ la pordo kiu konduki al la kuirejo kaj al la korto. Dum la kelnero hezitis, la pordo subite malfermiĝis, kaj Marvel ŝajnis esti trenita ĝis en la kuirejo. Oni aŭdis terurkrion, gravan frapbruon de kaseroloj. Marvel, kapon klinitan, obstine rezistanta, estis perforte puŝata ĝis la alia pordo de la kuirejo, kiu rigardis al la korto, kaj kies la rigiloj estis malriglataj.

La policano, kiu klopodis pasi antaŭ la kelnero, sin ĵetegis sekvata de unu el la koĉeroj, ekkaptis la pojnon de la nevidebla mano kiu strangolis Marvel<sup>on</sup>, ricevis pugnobaton trafe al la vizaĝo kaj preskaŭ renversiĝis. La pordo malfermiĝis kaj Marvel realigis impetegan fortostreĉon por rifuĝi malantaŭen. Kaj la koĉero tiam kaptis iun ĉe la kolo.

- Mi tenas lin ! li kriis.

La ruĝaj manoj de la kelnero tenegis la malamikon kiun oni tute ne vidis.

- Tie ĉi ! Jen li !

S<sup>o</sup> Marvel, liberigita, lasis sin fali kaj provis ŝteliri inter la kruroj de iuj kaj aliaj. La grupo de batalantoj

pelmele svingiĝis ĉirkaŭ la malfermita pordo. Tiam, unuafoje, oni aŭdis la voĉon de la nevidebla viro, iu akra ĝemo... La policano tretis al li la piedon, li furioze kriegis, kaj liaj pugnoj batadis la aeron kiel draŝilo. La koĉero, ankaŭ li, eligis dolorkrion kaj subite duonkurbiĝis : li estis trafita ĉe la kavo de la stomako. La pordo rigardanta de la kuirejo al la salono refermiĝis kaj kovris la retiriĝon de Marvel, dum en tiu ĉi kuirejo, la homoj brakumis la aeron kaj batalis kun la vakuo.

- Kien li pasis ? demandis la barbulo. Ĉu eksteren ?

- Ĉi tie ! diris la policano, paŝante unu paŝon en la korton kaj haltante.

Iu peco de tegolo flugis siblante tute proksime de lia kapo kaj iris frakasiĝi meze de la vazaron sur la tablo de la kuirejo.

- Mi tuj vidigos al li !... kriis la barbulo.

Subite iu ŝtala pafiltubo brilis super ŝultro de la policano, kaj kvin kugloj sekvis unu la alian, pafo post pafo, en la mallumo el kie venis la ĵetaĵo. Pafante, la viro strekis per sia mano horizontalan cirklan movon, tiel ke siaj kugloj radiis en la mallarĝa korto, kiel la spokoj de rado.

Poste sekvis silento.

- Kvin kartoĉoj, diris la nigrabarbulo, estas ankoraŭ tio kio estas la plej bona. Kvar asoj kaj unu reĝo ! Alportu lanternon, iu ajn, kaj ni blindopalpe ekserĉu la kadavron.

## 17 \_ La gasto de la kuracisto Kempo.

La kuracisto Kempo daŭrigis skribi en sia kabineto ĝis la momento kiam la pafadoj de revolvero saltigis lin. Paf! Paf! Paf! Ili sinsekvis unu la alian laŭ regulaj intertempoj.

"Ho! Ho!" li eligis, metante denove sian plumon inter siaj dentoj kaj streĉante la orelon. "Kiu tiel pafadas en Arkteo?... Kion nun faras tiuj azenoj?"

Li direktis sin al la suda fenestro, levis la ŝovofenestron kaj, klininta eksteren, trarigardis la reton kiun estigis la urbo en la nokto, per siaj nigraj spacoj, kortoj aŭ tegmentoj, pikitaj de lumo, fenestroj, butikoj kaj stratlanternoj.

"Oni kredus homamason ĉe la piedo de la monteto, apud la Ludantoj de Kriketo."

Li daŭrigis observi. Liaj okuloj direktiĝis preter la urbo ĝis la fora loko kie brilis lumoj de la ŝipoj kaj de la ĝetolanternoj, ĝis la signalflago kiu finis ĝin kiel luma topazo en la nokto. La luno, en sia unua kvarono, pendiĝis super la monteto, okcidente; tre klaraj, la steloj estis preskaŭ same brilantaj kiel sub la tropikoj.

Post kvin minutoj, dum kiuj sia menso allasis sin al malklaraj meditadoj pri la sociaj kondiĉoj de la estonteco kaj perdiĝis en la vasteco de la spaco kaj de la tempo, la kuracisto Kempo suspirante sin ree regis, fermis la fenestron kaj revenis al sia pupitro.

Estas proksimume unu horo pli poste ke ekbruis la sonorilon de la pordo. Ekde la eksplodbruoj, li neglekteme skribis, kun la menso ofte senatenta. Aŭdinte, li aŭskultis la servistino respondi al la sonorilvoko kaj atendis la bruon de ĉiaj paŝoj en la ŝtuparo; sed ŝi ne venis.

"Mi estus scivolema scii tion kio estis !" diris al si la kuracisto.

Li provis denove labori; poste, ne sukcesante, li leviĝis, malsupreniris el sia kabineto ĝis la interŝtuparon, sonoris, kaj super la apogrelo, krude alparolis la ĉambristinon, ĝuste kiam ŝi alvenis en la vestiblo, malsupren.

- Ĉu estis letero ?

- Ne, sinjoro. Iu pasanto kiu sonoris, poste kiu forkuris.

"Mi estas malkvieta, tiun vesperon !" diris Kempo al si mem.

Li resupreniris al sia kabineto kaj ĉifoje, rezolute rekomencis labori. Post momento, li estis tute absorbita de ĝi, kaj la solaj bruoj en la ĉambro estis la tiktakado de la horloĝo kaj la klara knarado de lia plumo, hastanta ĉe la centro de la lumcirklo kiun ĵetis la lampŝirmilo sur la tablo.

La kuracisto ne finis sian taskon antaŭ la dua nokte. Li leviĝis, oscedis kaj iris enlitiĝi. Jam li demetis sian jakon kaj sian veŝton, kiam li sentis sin soifa. Li prenis kandelingon kaj malsupreniris al la manĝoĉambron serĉanta sodakvon kaj viskion.

La sciencaj studoj kreskigis liajn observokapablojn. Reen trairante la vestiblon, li rimarkis nigran makulon sur la linoleumo, tute proksime de la piedmato, piede de la ŝtuparo. Resuprenirante, li subite demandis al si kion ja povis esti tiu ĉi makulo. Estanta denove malsuprenirinta, li ekrimarkis, sen surprizego, ke ĝi havis la koloron kaj la viskozecon de la sango kiu sekiĝas.

Li reprenis siajn botelojn kaj denove supreniris rigardante ĉirkaŭ si, provante klarigi al si tiun ĉi makulon. Sur la interŝtuparo novan rimarkon; li haltis mireginta : la manilo de lia ĉambropordo estis makulita per sango.

Li rigardis sian manon : estis pura. Cetere, li memoris

ke la pordo de sia ĉambro estis malfermita kiam li malsupreniris el sia kabineto; do li ne devis tuŝi la manilon. Li eniris tute rekten, kun perfekte trankvila vizaĝo, eble nur iom pli firma ol kutime. Lia rigardo, scivole vaganta, falis sur la lito: la piedkovrilo estis makulita per sango, la littukoj estis ŝiritaj... Kempo ne rimarkis ĉion enirante je la unua fojo, ĉar li rekte iris al la necesejo. Aliflanke, littukoj kaj litkovriloj estis enprimitaj kvazaŭ iu estis tutfreŝdate sidiĝinta surpris.

Tiam la kuracisto spertis strangan senton esti aŭdinta voĉon kiu mallaŭte diris: "Dia boneco... Kempo!"

Sed la kuracisto Kempo ne kredis al voĉoj.

Li stare restis, la okuloj fiksintaj sur siaj ĉifitaj littukoj. Ĉu vere estis voĉo? Denove li rigardis ĉirkaŭ si, sed sen rimarki ion alian, ol la lito malaranĝita kaj makulita de sango. Tiumomente, li tre klare aŭdis ion kiu moviĝis ĉe la alia flanko de la ĉambro, direkte al la lavabo. Ĉiuj viroj, eĉ la plej kleraj, konservadas kelkajn superstiĉajn ideojn: Kempo estis invadita de tiu sento kiu nomiĝas la timo de fantomoj. Li fermis la pordon, antaŭeniris ĝis la sinlavejo, kaj metis tie siajn flakonojn. Subite, li ekvidis, ne sen ekstremitoj, iun volvitajn bandaĝon farita de ŝirpeco de sanga tolaĵo, kiu floris en la aero inter li kaj la lavabo.

Li restis tie, mirigita, kontempli ĝin. Estis malplena bandaĝo, taŭge kunpremita bandaĝo, sed vere malplena. Li estis tuj faronta paŝon por kapti ĝin, kiam malforta bato haltigis lin; samtempe, iu voĉo parolis tutapud li:

- Kempo!
- He? li eligis, kun malfermita buŝo.
- Regu viajn nervojn... mi estas nevidebla viro.

Dum momento, la okulojn fiksintajn sur la bandaĝo, Kempo ne respondis. Fine:

- ... Iu nevidebla viro? li ripetis.

- Jes, mi estas nevidebla viro.

La rakonto kiun li ja unue mokis, tiun matenon mem, revenis al la spirito de Kempo. Oni ne kapablus diri ĉu li estis tiumomente, pli timigita aŭ pli mirigita. Estas nur pli poste ke li kapablis ekkompreni.

- Mi kredis ke tio ĉio estis nur fikcio ! (Tio kio ĉefis en li, estis ankoraŭ siaj rezonadoj dum la mateno). Ĉu vi havas pansaĵon ?

- Jes, respondis la nevidebla viro.

- Ho ! eligis Kempo.

Li reakiris sian memregadon:

- Nu, tio estas sensenca ! Estas ia magiaĵo...

Li subite antaŭenpaŝis, kaj sia etendita mano al la bandaĝo renkontis nevideblajn fingrojn. Li retropaŝis pro la kontakto, kaj sia vizaĝkoloro ŝanĝiĝis.

- Trankviliĝu, Kempo, pro la Dia amo !... Mi bezonas helpon, urĝan bezonon. Atendu !

Iu mano ekkaptis al li la brakon. Li frapis la manon.

- Kempo, kriis la voĉo, Kempo, trankviligu vin !

Kaj la ĉirkaŭpremo restreĉiĝis. Iu furioza deziro sin liberigi kaptis lin. Sed la mano de la bandaĝita brako kaptis lin ĉe la ŝultro; li estis skuita ĝis perdi la ekvilibron kaj dorsen ĵetita sur la liton. Apenaŭ li malfermis la buŝon por krei, ke la angulo de la littuko estis enpremata inter la dentoj. La nevidebla viro retenis lin sub si per maltrankviliga maniero; sed almenaŭ Kempo havis la brakojn liberaj kaj per la piedoj kiel la manoj, li provis doni batojn.

- Estu saĝa, ĉu ne ? diris la nevidebla viro alkroĉante sin al li, sen zorgi pri la frapegoj kiujn li ricevis en la ripoj.

- Damnado ! Vi baldaŭ frenezigos min !

- Restu tie, ŝtipkapulo, kriegis la nevidebla viro en la orelon de Kempo.

Tiu ĉi ankoraŭ momenton baraktis, poste kvietiĝis.

- Se vi krias, mi dispremos vian vizaĝon... Mi estas nevidebla. Estas en tio nek stultaĵo nek magiaĵo. Mi ja vere estas nevidebla viro. Kaj mi bezonas vian helpon. Mi ne volas suferigi vin, sed se vi kondutas kiel krudan furiozulo, mi estos devigata. Ĉu vi ne gardis memoron de mi, Kempo... Grifino, el la Universitata kolegio.?

- Lasu min restariĝi... Mi restos tie kie mi estas... Lasu min trankvila minuton.

Kempo sidiĝis kaj palpis al si la kolon.

- Mi estas Grifino el la Universitata kolegio. Mi fariĝis mem nevidebla. Mi estas nur homo kiel la aliaj, viro kiun vi konis, iĝinta nevidebla.

- Grifino ?

- Jes, Grifino !... respondis la voĉo, studento pli juna ol vi, preskaŭ albina, ses futoj alta [ $\pm 1,95m$ ], kun forta staturato kaj ruĝaj okuloj en roza kaj blanka vizaĝo... kiu ricevis la kemian medalon.

- Mi estas konsternita... Mia kapo eksplodas... Kio en ĉio ci koncernas Grifino<sup>n</sup> ?

- Sed... estas mi kiu estas Grifino.

Kempo pripensis.

- Estas abomena ! li eligis. Sed per kiu sorĉado, viro povas fariĝi nevidebla ?

- Ne estas sorĉado. Estas scienca procedo, kaj sufiĉe facile por kompreni.

- Estas horora !... Kiel diable...

- Horora, se vi volas. Sed mi estas vundita, mi suferas, mi estas elĉerpita... Bona Dio ! Kempo, vi estas viro. Iom da trankvilon. Donu al mi por trinki kaj manĝi, kaj lasu min eksidi tien.

Kempo rigardis la bandaĝon moviĝi tra la ĉambro; li vidis brakseĝon el vimeno, trenita sur la pargeto, alveni lokiĝi apud la lito. La brakseĝo krakis sub la pezo de homo kaj la sidilo

estis malaltigita je ĉirkaŭ kvaroncolo [ $\pm 6.3mm$ ]. La kuracisto frotis al si la okulojn kaj denove palpis sian kolon.

- Estas pli impresa ol la rakontoj de fantomoj ! li diris.  
Kaj li maŝine ekridis.

- Tio fartas pli bone, dank'al Dio ! Jen vi fariĝis saĝa.

- Aŭ idiota ! respondis Kempo.

Kaj li ankoraŭ frotis al si la okulojn.

- Donu al mi viskion. Mi estas preskaŭ morta.

- Damne ! Tio ne ŝajnis antaŭ momento... Kie vi estas ?

Se mi leviĝas, ĉu mi ne falos sur vin ? Jen !... Bonege. La viskion ? Prenu ! Kien necesas doni ĝin al vi ?

La brakseĝo knaris kaj Kempo sentis ke oni prenis la glason el liaj manoj. Li devis peneti por malteni ĝin : lia instinkto ribelis. La glaso malproksimiĝis kaj restis ekvilibre, je dudek coloj [ $\pm 50cm$ ] super la antaŭa rando de la brakseĝo. Kempo rigardis ĝin kun senfina embarasiĝo.

- Tio estas, tio povas nur esti tiu hipnotismo ! li diris.

Vi devis sugestis al mi, ke vi estas nevidebla.

- Nu do !

- Sed tio estas fantazia !

- Aŭskultu min.

- Mi pruvis, ĉimatene mem, laŭ konkludiga maniero, ke la nevidebleco...

- Ne gravas tio kion vi montris ! Mi malsategas, kaj la nokto estas malvarma por homo kiu ne havas vestaĵon.

- Ĉu vi volas manĝi ? demandis Kempo.

La glaso da viskio mem klinis sin.

- Jes, respondis la nevidebla viro, remetante ĝin kun seka bruo. Ĉu vi havas noktosurtuton ?

Kempo aŭdigis obtuzan ekkriion. Li direktis sin al sia vestoŝranko kaj eltiris el ĝi vestaĵon el malhelruĝa ŝtofo.

- Ĉu tio konvenas al vi ?

La vesto estis prenita el la manoj; ĝi floris en la aero,



mola dum momento; poste ĝi turniĝadis laŭ stranga maniero, stariĝis videbligante korpon, butonis sin mem kaj sidiĝis en la brakseĝon.

- Kalsono, ŝtrumpetoj, pantofloj, ĉio tio tre plezurigus al mi, diris seke la nevidebla viro.

- Kaj ion por manĝi !

- Jes, ion... Estas ja la plej malprudenta aventuro kiu neniam okazis al mi !

Kempo serĉfosi tra siaj tirkestoj por trovi tion kion oni petis al li; poste estante malsuprenirinta serĉi en la servistejon, li revenis kun pano kaj malvarmajn kotletojn kaj metis la tuton sur malsolidan tablon antaŭ sia gasto.

- Ne bezonas tranĉilon", diris tiu ĉi.

Kaj iu kotleto troviĝis pendata en la aero; oni aŭdis maĉadan bruon.

- Mi ĉiam ŝatas esti vestinta por manĝi, diris la nevidebla viro, buŝon plenan, kaj avide vorante. Stranga manio !

- Tiu ĉi manumo tute bone ta?gas, mi pensas ?

- Fidu vin al mi.

- Tamen, ĝi estas stranga...

- Mi ne diras ne. Sed estas ankaŭ nekutima ke mi ĝuste ĵetis min en via hejmo, de vi, por ricevi mian bandaĝon : tio estas mia unua bonfortuno !... Ĉiaokaze, mi intencis ĉinokte dormi tie ĉi : necesas ke vi konsentus tion. Estas tre bedaŭrinde ke sango vidigis mian ĉeeston, ĉu ne ? Ekzistas koagulaĵo tien. Mia sango iĝas videbla koaguliĝante. Estas nur mia viva histo kiun mi ŝanĝis, kaj nur dum la daŭro de mia ekzistado... Mi estis jam dum tri horoj en via hejmo.

- Kiel tio okazis ? demandis Kempo per kolera tono. Diable, se... En tiu afero, ĉio estas ekstravaganca de la komenco ĝis la fino.

- Ĉio estas logika, perfekte logika ! rebatis la nevidebla

viro, etendante la manon por preni la botelon da viskio.

Kempo rigardis kun mirego tiun ĉi noktosurtuton formanĝi. Iu kandelradio, oblikve eniĝante tra ŝiraĵo en la dekstra ŝultrumo, ŝprucis lumtriangulon sub la maldekstrajn ripojn.

- Kioj estis tiuj pafadoj ? Kiel la batalo komencis ?

- Estas ia stultulo, iu kvazaŭa partnero de mi...

malbenita li estu !... kiu provis ŝteli mian monon. Kaj li sukcesis.

- Ĉu li ankaŭ estas nevidebla ?

- Ne.

- Do ?

- Ĉu mi ne povus ricevi aliaĵon por manĝi antaŭ ol diri al vi ĉion ĉi ?... Mi malsategas, mi suferas, kaj vi petas al mi rakonti la okazaĵojn !

Kempo leviĝis :

- Sed vi, vi ne pafis ?

- Mi, ne. Iu idioto kiun mi neniam vidis, pafis ieletrapele. Ili ĉiuj timiĝis ĉe mia alveno. La diablo prenu ilin !... Diru do, mi volus aliaĵon por manĝi, Kempo.

- Mi tuj vidis tion kio ankoraŭ estas malsupren. Ne multe, mi timas tion !

Post kiam li finis sian vespermanĝon, iun abundan manĝadon, la nevidebla viro postulis cigaron. Li mordis la pinton kun malpacienco antaŭ ol la kuracisto sukcesus trovi tranĉilon; kaj la ekstera folio estanta ŝiriĝinta, li blasfemis.

Estis tre stranga afero vidi lin fumi : lia buŝo, lia gorĝofundo, lia faringo, liaj naztruoj fariĝis videblaj laŭ la formo de kirla fumkolumno.

- Estas donaco de la ĉielo, la tabako ! li diris, ellasante dikan elspiraĵon. Mi ŝance renkontis vin, Kempo : vi helpas min. Kia ĝojo esti precize renkontinta vin.! Mi estas en iu diabla embaraso; mi estis freneza, mi kredas. Kiaj aventuroj

mi travivis ! Sed, kredis min, ni faros ion, ni ambaŭ, nun !"

Li mem donis al si iom pli da viskio kaj sodakvo. Kempo stariĝis, rigardis ĉirkaŭ li kaj iris serĉi glason en la apuda ĉambro.

- Estas sensenca... Sed ĉu vi permesas ke mi trinkas ?...

- Vi ne multe ŝanĝis, Kempo, ekde dekduo da jaroj. Vi mem, blonduloj, vi tute ne ŝanĝas. Senemociaj kaj metodemaj... Mi tuj sciigos al vi : ni baldaŭ laboros kune.

- Sed kiel ĉio ci okazis ? Kiel vi finfine devis spertion ?

- Pro Dio, lasu min pace fumi dum minuto ! Poste mi tion diros al vi.

La raporto tamen ne estis rakontita tiun nokton. La pojno de la nevidebla viro fariĝis dolora. Li havis febron, li estis elĉerpita. Lia menso senĉese reiris al la ĉaskurado kiun li suferis de supre malsupren la monteton, al la vigla lukto en la gastejo. Li komencis sian rakonton, kaj rezignis ĝin. Temp' al tempe, li parolis pri Marvel : tiam li fumis pli rapide, kaj sia voĉo aperigis sian koleron. Kempo kolektis tion kion li povis.

- Li timis min, mi bone vidis ke li timis min, plurfoje ripetis la nevidebla viro. Li volis forlasi min; li senĉese ŝtelume observis ĉirkaŭ si... Kiel mi estis stulta ! La maliculo !... Mi voluntus mortigi lin...

- Sed kien vi akiris tiun monon ? subite demandis Kempo.

La nevidebla viro restis silenta dum momento.

- Mi ne povas diri tion al vi tiun ĉi vesperon.

Li subite ĝemis kaj kliniĝis antaŭen, sia nevidebla kapo subtenita de nevideblaj manoj.

- Kempo, li diris, mi ne dormis ekde baldaŭ tri tagoj. Mi nur ekdormetis dum unu aŭ du horoj. Nepras ke mi dormu.

- Bone, prenu mian dormĉambron, prenu tiun ĉi ĉambron.
- Sed kiel mi povas dormi ? Se mi dormas, li foriros...

Ba ! Kion tio okazigos ?

- Kaj via vundo ? Kio tio estas ?
- Nenio, iu grataĵo. Ho ! Dio, kiom mi estas dormema !
- Nu, kial ne dormi ?

La nevidebla viro ŝajnis konsideri Kempon.

- Ĉar mi havas apartajn kaŭzojn por voli ne esti kaptita de miaj samspeculoj.

Kempo rondokule rigardis.

- Stultulo kiun mi estas ! ekkriis la nevidebla viro, frapante fortege la tablon. Mi neniam devintus enbati tiun ideon en vian kapon !

## 18 \_ La nevidebla viro dormas.

Elĉerpita kaj vundita kiel li estis, la nevidebla viro ne volis fidi al la parolo de Kempo, certigante lin ke sia libereco estus respektita. Li ekzamenis la du fenestrojn de la dormoĉambro, levis la rulkurtenojn kaj malfermis la vitrokadron por kontroli ĉu li povus, se necese, elŝteliĝi de tie, kiel diris Kempo. Ekstere la nokto estis kvietaj kaj silenta; la novluno subiris ĉe la alia flanko de la dunoj. Grifino detale ekzamenis la serurojn de sia ĉambro; li esploris la du tualetejojn por konvinki sin ke ankoraŭ estis tie iu duobla savvojo; finfine, li deklaris sin kontenta. Li estis tiam staranta sur la tapiŝo de la kameno; Kempo aŭdis bruon de oscedo.

- Mi bedaŭras, diris al li lia gasto, ne povi rakonti al vi ekde tiu ĉi vespero, ĉion kion mi faris, sed mi estas ellaciĝinta. Sendube estas ridinde !... KREDU min, Kempo, malgraŭ viaj ĉimatenaj rezonadoj, la afero perfekte eblas. Mi faris eltrovon. Mi intencis konservi ĝin por mi. Mi ne povas. Necesas ke mi havu partneron. Kaj vi... Ni povas fari aferojn... Sed ĝis morgaŭ ! Ĉi tiun momenton, por mi, estas la dormado aŭ la morto.

Kempo staris meze de la ĉambro, la okuloj alkroĉintaj al tiun ĉi senkapan manekanon.

- Mi tuj lasos vin, ĉu ne ?... Estas nekredeble... Ha ! Ne bezonus tri aventurojn el tiu speco, skuantaj ĉiujn miajn ideojn, por frenezigi min. Kaj tamen estas vere !... Ĉu ekzistas ankoraŭ io kiun mi povas fari por vi ?

- Nenion, nur diri bonan vesperon al mi.

- Nu, bonan vesperon ! respondis Kempo, manpremante iun nevideblan manon.

Li direktis sin oblikven al la pordo, kiam subite la noktosurtuto venis al li per grandaj paŝoj :

- Aŭskultu min bone. Neniu provo por ligi min, por ekkapti min, aŭ...

La vizaĝo de Kempo prenis apartan esprimon :

- Mi kredis, li rebatis, esti doninta al vi mian parolon.

Poste li milde fermis la pordon malantaŭ si, kaj tuj li aŭdis la ŝlosilon turniĝi de ene.

Rapidaj paŝoj iris al la pordo de la tualetejo, kaj tiu ĉi ankaŭ estis ŝlosita.

Kempo frapis al si la frunton :

- Ĉu mi revas ? Ĉu estas la mondo kiu freneziĝas, aŭ mi ?

Li eksplodis per rido, kaj metante la manon sur la ŝlositan pordon :

- Esti elpelita el sia propra ĉambro de evidenta absurdaĵo !

Estante suprenirinta ĝis la supro de la ŝtuparo, li turnis sin por rigardi ĉiujn tiujn fermitajn pordojn.

- Tamen, estas vere ! li eligis.

Li metis la fingrojn al sia kolo iomete kontuzita.

- Jes, tio estas nekontestebla fakto, sed...

Li skuis la kapon pro senespero, retropaŝis kaj malsupreniris la ŝtuparon. Li ŝaltis la lampon de la manĝoĉambro, prenis cigaron kaj komencis paŝadi tien kaj reen, parolante al si mem. De tempo al tempo, li diskutis :

"Li diris, 'nevidebla' ! Tio do ekzistas, iu nevidebla besto ? En la maro, jes. Miliardoj, milionoj ! Ĉiuj larvoj, la malgrandaj naŭplioj, ĉiuj specioj de tornarioj<sup>(\*)</sup>, la mikroskopaj bestoj..., la meduzoj. En la maro, estas pli da umoj nevideblaj ol videblaj ! Mi neniam pripensis tion... Kaj

\* Mi ne trovis tradukon. Estas larvoj de hemiforduloj kiuj naĝas pivotante sur si mem (de tio, ĝia nomo).

ankaŭ en la lagetoj ! Ĉiuj tiuj bestetoj kiuj tie vivas, simplaj etaj punktoj el travidebla, senkolora gelateno. Sed en aero, ne. Tio ne povas esti !... Finfine, kial ne ?... Sed kio ? Se iu viro estus el vitro, li ankoraŭ estus videbla".

Lia meditado fariĝis profunda. Tri cigaroj disŝutiĝis laŭforme de blanka cindro sur la tapiŝo antaŭ ol li denove parolis. Sed tiam, estis simple ekkrii. Li eliris el la ĉambro, eniris en sian konsultejon, ekflamigis la gason. Tiu ĉi kabineto estis tute malgranda : la kuracisto ne vivis per sia scienco. La ĵurnaloj estis tie. Senzorge ĵetita sur la tablo kaj malfaldita, la matengazeto. Kempo ekprenis ĝin, vikle turnis ĝin kaj komencis legi. Stranga okazo en Iping - tiu mem kiun la maristo, en Stoŭe-Haveno, tiel pene balbutis al Marvel. Kempo rapide tralegis ĝin.

- Envolvinta ! li diris. Maskovestinta ! Kaŝinte sin !... Neniu ŝajnas esti informita pri lia kazo... En kiu stranga ludo li do rolas ?

Li lasis fali la ĵurnalon kaj lia rigardo vagis tien kaj tien ĉi. Li prenis la Sankta<sup>n</sup> Ĵakvo<sup>n</sup> Gazeto<sup>n</sup>, kiu estis tie, faldita, kiel ĝi alvenis.

- Ha !, fine ni baldaŭ havos la veron !

Li malfermis la gazeton. Du kolumnoj ĵetiĝis en la okulojn, per tiu ĉi titolo : iu kompleta vilaĝo de Susekso atingita de frenezo. "Ha ĉielo !" ekkriis Kempo avide legante la skeptikan raporton pri la eventoj okazintaj dum la antaŭtago en Iping.

Sur la alia flanko de la paĝo, la matena raporto estis reproduktita. Kempo relegis ĝin : "Li kuris tra la stratoj, frapante dekstren kaj maldekstren... Ĵafers sen konscio... S<sup>o</sup> Huster multe suferis... ankoraŭ nekapabla diri tion kion li vidis... Dolora humiliĝo... la pastoro... Iu virino malsana pro ektimego... la fenestroj dissplititaj... Tiu eksterordinara rakonto estas sendube blago, sed tro ŝerca por ke oni ne

presu ĝin... Por ĉiu preni kaj lasi pri ĝi.

Kempo forĵetis la paperon kaj restis plantita antaŭe, tute pala.

"Sendube falsaĵo !"

Li reprenis la gazeton kaj relegis ankoraŭ la tutan aferon.

"Sed kiam tiu trampo aperis scenejen ? Kial diable li postkuris tiun trampon ?"

Li lasis sin fali sur la lito por operacioj.

"Li ne estas nur nevidebla. Li estas frenezulo ! Iu danĝera stultulo !..."

Kiam la mateniĝo venis miksi siajn unuajn briletojn en la manĝoĉambro, kun la lampolumo kaj kun la cigarofumo, Kempo estis ankoraŭ trapaŝanta la ĉambron serĉante la solvon al la enigmo.

Li estis tro superekscitita por provi dormi. Liaj geservantoj, malsuprenirante, la okuloj ankoraŭ pezaj pro dormemo, trovis lin tie kaj emis opinii ke estis pro la laboro, la trolaborado kiun necesis kulpigi. Li donis al ili la eksterordinaran sed tute nepran ordonon servi matenmanĝon por du uloj en la kabineto de la belvedero kaj poste limi sin en la subteretaĝo kaj la teretaĝo. Poste li daŭris paŝadi en la manĝoĉambro ĝis la alveno de la matena gazeto.

Tiu ĉi havis multe da aferoj por rakonti; sed malmulte novaj : ĝi simple konfirmis la rakonton de la antaŭtago kaj donis la raporton, tre malbone skribita, pri alia stranga aventuro okazinta en Arkteo. La kuracisto tiel sciigis la plej gravan pri tio kio okazis ĉe la Ĝojaj Ludantoj de Kriketo kaj la nomon de S<sup>ro</sup> Marvel.

"Li devigis min travivi kun li dudek kvar horojn", sciigis S<sup>ro</sup> Marvel. Kelkaj novaj detaloj estis aldonitaj al la okazintaĵo de Iping, interalie la rompon de la telegrafa drato. Sed nenio kiu povas ĵeti iom da lumo sur la rilatojn de



la nevidebla viro kaj de la trampo ĉar Marvel donis neniun informon nek pri la tri libroj kiujn li portis, nek pri la mono per kiu siaj poŝoj estis plenaj. La skeptika tono malaperis, kaj svarmo da raportistoj kaj da enketistoj jam laboris, diligente prilaborante la temon.

Kempo legi ĉiun kiu rilatis al la afero kaj sendis la ĉambristino serĉi por li ĉiujn ĵurnalojn kiujn ŝi trovas. Li ankaŭ voris tiujn.

"Li estas nevidebla ! Kaj li havas kolerojn kiuj ŝanĝiĝas al la furioza frenezo !... Kiujn farojn li povas fari !... Kaj scii ke li estas tie supre, libera kiel birdo en aero !.. Kiun decidon elekti ?... Ekzemple, ĉu estus rompi sian parolon se... Ne !"

Li iris al malgranda senorda skribotablo, en la angulo, kaj komencis noton. Duone skribita, li ŝiris ĝin kaj skribis alian. Li relegis tiun ĉi, rigardis ĝin pripensante, poste li prenis koverton kaj adresis ĝin al "Kolonelo Adai en Arkteo-Haveno". La nevidebla viro vekigis ĝuste kiam Kempo atingis tiun punkton. Li vekigis kun aĉaj inklinoj : Kempo, atenta pri la plej eta bruo super sia kapo, subite aŭdis pezajn paŝojn rapidegi tra la dormoĉambro. Poste iu seĝo estis renversita, la glaso de la lavabo estis rompita : Kempo hastis suprengrimpi la ŝtuparon kaj vigle frapis sur la pordon.

## 19 \_ Unuaj principoj.

- Nu, kio do estas ? demandis Kempo kiam lia gasto malfermis al li.

- Nenion...

- Sed diable ! Kial tiun ĉi bruegon.

- Simpla atako de malbona humoro, respondis la nevidebla viro. Mi ne plu pensis pri mia brako, kaj ĝi doloras min.

Kempo trairis la ĉambron kaj ekkolektis la pecojn de la frakasita glaso; poste staranta kun la rompaĵoj en la mano :

- Oni eldonis en la ĵurnaloj vian tutan aferon, li diris, ĉion kio okazis, jen en Ĥping, jen malsupre de la monteto. La mondo estas avertita ke ekzistas nevidebla civitano. Sed neniu scias ke vi estas ĉi tie.

La alia eligis sakraĵon.

- Jes, reparolis la kuracisto, la sekreto estas malkovrita. Mi komprenas ke estis sekreto... Mi ne scias kiujn estas viaj projektoj, sed kompreneble, mi estas deziranta servi vin.

La nevidebla viro sidiĝis sur sian liton.

- La matenmanĝo estas servita tien supren, aldonis Kempo per tono tiel milda kiel eble.

Li ĝojis vidi ke sia stranga gasto volonte leviĝis, kaj li supreniris la mallarĝan ŝtuparon kiu kondukis al la belvedero.

- Unue, diris Kempo, mi ŝatus scii iom pli pri via nevidebleco.

Li sidiĝis, post iu malpacienca rigardo ĵetita tra la fenestro, kun la mieno de homo kiu volas babili. La dubojn kiujn li antaŭtage havis pri la realeco de la aventuro, revenis al li nur por denove malaperi kiam li ekrigardis la lokon kie

Grifino sidiĝis; antaŭ la tablo, iu noktosurtuto sen kapo viŝis lipojn kiujn oni ne vidis, per buŝtuko mirakle subtenata.

- Estas tutsimple, respondis Grifino, kuŝante sian buŝtukon apude si.

- Por vi, sendube; sed...

Kaj Kempo ekridis.

- Jes, certe, por mi mem, tio unue ŝajnis al mi mirinda. Nun, bona Dio !... Sed ni baldaŭ faros famajn aferojn !... Mi zorgis pri la demando, unuafoje en Ŝesilstoŭe.

- En Ŝesilstoŭe ?

- Mi estis tie forlasante Londonon. Vi scias ke mi forlasis la kuracarton por dediĉi min al fiziko ? Ne, vi ne scias tion. Nu, estas tiel. La studo de lumo altiris min.

- Ha !

- La optika denseco !... Estas interplekto de enigmoj, serio de problemoj, kun solvoj kiujn oni komprenetas nur malprecize... Mi estis nur dudekdujara. Mi estis plena de entuziasmo. Mi diris al mi : "Mi dediĉos mian vivon al tiu demando, ĝi valoras la penon". Vi bone scias kiel oni estas stulta je dudek du jaroj !

- Stulta tiam aŭ stulta pli poste...

- Kvazaŭ koni, scii, tio povus havigi kelkan kontentiĝon al homo !... Mi ŝvitege eklaboris. Kaj mi laboris kaj pripensis apenaŭ ses monatojn kiam lumo okazis kaj trapasis tra iu maŝo de la reto, blindiga. Mi malkovris ĝeneralan principon pri la pigmentoj kaj la refrakto, iun formulon, iun geometrian esprimon enhavanta kvar dimensiojn. La stultuloj, la ordinaraj mortemuloj kaj eĉ la vulgaraj matematikistoj ne scias tion kion ĝenerala esprimo povas signifi por tiu kiu studas la molekulan fizikon. En miaj libroj - la libroj kiujn tiu stratulaĉo rabis al mi - estas mirindaĵoj, mirakloj. Ne estis metodo, estis ideo taŭge kondukema al iu metodo per kiu eblus, sen ŝanĝi iun ajn el la proprecoj de la materio

(krom, en kelkaj kazoj, la koloron), malpliigi la refrakt-indicon de solida aŭ likva korpo al tiu de la aero, tiom kiom povas postuli ĉiuj praktikaj celoj.

- Diable ! diris Kempo, tio estas tre kurioza. Tamen mi ne ankoraŭ tute komprenas... Mi bone komprenas ke, per tiu rimedo, vi povas forigi ĝian brilon al juvelŝtono; sed multe mankas por nevidebligi individuon, multege.

- Ĝuste. Sed konsideru ke la videbleco dependas de la ago de la videblaj korpoj sur la lumo. Lasu min sciigi al vi la bazajn nociojn kvazaŭ vi tute ne sciis ilin. Pro tio, mia klarigo fariĝos pli klara.

"Vi tre bone scias ke iu korpo sorbas la lumradiojn, aŭ ĝi reflektas, aŭ ĝi refraktas ilin - aŭ ĝi sorbas, reflektas, kaj refraktas, ĉiu kune. Supozu ke iu korpo nek reflektas, nek refraktas, nek sorbas ajnan radion, tiu korpo ne povas esti videbla de si mem. Ekzemple, vi vidas maldiafanan skatolon ruĝa ĉar la koloro sorbas parton de la lumradioj kaj reflektas la aliajn, tio signifas, resendas ĉiujn ruĝajn radiojn. Se vi ne sorbas parton de la lumradioj, se ĝi reflektus ilin ĉiujn, estus iu skatolo brila pro blankeco kiun vi vidus, iu arĝenta skatolo !... Iu skatolo el diamanto sorbus ne multe da radioj kaj reflektus ankaŭ ne multe per sia surfaco, sed nur ie kaj tie, ĉe lokoj kie la surfacoj estas favoraj, la lumo estus reflektata kaj refraktata, tiel ke vi havus la impreson de brilaj reflektadoj kaj de travideblecoj : iu skatolo el vitro estus nek tiel brila, nek tiel videbla kiel skatolo el diamanto, ĉar estus malpli de reflektado kaj de refraktado. Ĉu vi komprenas ? Laŭ iu angulo, vi perfekte vidus tra ĝi...

"Iuj vitraj specoj estus pli travideblaj ol aliaj : iu skatolo el kristalo estus pli diafana ol iu alia el ordinara domvitro. Iu skatolo el komuna vitro, tre maldika, estus malfacila por distingi en malbona lumo, ĉar ĝi sorbus apenaŭ kelkajn radiojn, refraktus kaj reflektus tre malmulte el ili.

Se vi mergas en akvo iun platon el komuna blanka vitro - des pli bone ! se vi mergas ĝin en ia likvo pli densa ol akvo, ĝi preskaŭ tute malaperas, ĉar la radio kiu trapasas de la akvo en la vitron estas nur iomete refraktata aŭ reflektata, do ŝanĝita en ĝia direkto. Ĝi estas preskaŭ tiel nevidebla kiel ŝpruco da karbono aŭ hidrogeno en la aeron; kaj precize pro la sama kialo !

- Jes, diris Kempo, tio tute glatas. Ne ekzistas hodiaŭ iu lernanto kiu ne scias ĉiun tiun.

- Jen nun alia fakto kiun ĉiuj lernantoj bone konas. Se oni dispecigas vitran platon, se oni dispistas ĝin al pulvoro, ĝi fariĝas multe pli facila por vidi en la aero; ĝi fariĝas almenaŭ maldiafana kaj blanka pulvoro. Tio ĉi ĉar la pulvorigado multigas la surfacojn sur kiuj aplikiĝas reflekon kaj refrakton. En vitra plato estas nur du surfacoj; en la pulvorigita vitro, la lumo estas refractata aŭ reflektata de ĉiuj eroj kiujn ĝi trapasas, kaj tre malmulte da radioj pasas rekte. Sed tiu pulvorigita blanka vitro, se vi tuj metas ĝin en la akvon, ĝi ĉesas esti videbla. Estas ĉar la pulvorigita vitro kaj la akvo havas proksimume la saman refrakt-indicon; tiel do la lumo apenaŭ ricevas malgravan refrakton aŭ reflekon transpasante de unu al la alia.

"Do trasidebla korpo, vitro, ekzemple, estas nevidebligita se vi metas ĝin en likvon kiu proksimume havas la saman refraktan indicon. Rezonu nur sekundon, vi komprenos ke la pulvorigita vitro povus nevidebliĝi eĉ en la aero, se sia refrakt-indico povus fariĝi egala al tiu de la aero : ĉar tiam ne plu estus aŭ refrakto aŭ refleko dum la transirado de la lumradioj de la vitro al la aero kaj inverse.

- Jes, sendube. Sed homo ne estas pulvorigita vitro !

- Ne, fakte, respondis Grifino. Li estas multe pli trasidebla !

- Nu do !

- Kaj estas doktoro kiu parolas... Kiel oni perdas memoron !... Ĉu vi jam forgesis vian fizikon, post dek jaroj ?... Pensu pri ĉiuj aĵoj kiuj estas travideblaj kaj komence ne ŝajnis esti tiel. La papero estas farita per travideblaj fibroj : se ĝi estas blanka kaj maldiafana, estas pro la sama kialo kiu faras ke la pulvorigita vitro estas maldiafana, kaj blanka ! Oleu blankan paperon; ke la oleo bone penetrigas en ĉiujn malplenaĵojn, inter la molekulojn, tiel ke ne plu estu refrakto aŭ reflektado nur sur la surfacoj : ĝi iĝas travidebla kiel vitro ! Kaj tio ne estas vera nur pri la papero, sed pri la fibroj de koton, lino, lano, pri ligno, ankaŭ pri ostoj, Kempo, pri karno, Kempo, pri haroj, Kempo, pri ungoj kaj pri muskoloj, Kempo ! Reale, la tuta organismo de homo - krom la ruĝaj ĉeloj de lia sango kaj la malhelaj pigmentoj de liaj haroj - estas farita de travidebla histo, senkolora : Tio necesas ne multe da aĵo por nin videbligi unuj la aliajn ! Pri la plej granda parto, la fibroj de iu vivulo ne estas pli maldiafanaj ol la akvo.

- Evidente ! Kompreneble ! ekkriis Kempo. Mi konsideris tiun nokton nur la marlarvojn kaj la meduzojn.

- Nun vi komprenas min ! Vi estas informita pri ĉio kion mi sciis, pri ĉio kion mi havis en menso unu jaron post esti forlasinta Londono<sup>n</sup> - antaŭ ses jaroj. Sed mi gardis ĉion por mi. Necesis al mi daŭrigi mian laboron en malfavoraj kaj timigaj kondiĉoj. Olivero, mia docento, estis el tiuj sciencistoj kiuj fiksis al vi limon en la scienco; kaj plie, ŝtelisto de ideoj, senĉese scivolante la penson de aliaj... Vi konas la kutiman tromporuzon de la scienca mondo ! Mi volis diskonigi nenion; mi ne volis ke tiu ĉi homo venu kunhavigi mian gloron... Mi plulaboris. Komence de mia formulo, mi proksimiĝis iom post iom al la eksperimento de la realaĵo. Mi eĉ ne parolis al unu homo ĉar mi volis lanĉi mian elkovron al la mondo per peza forto kaj famiĝis senprokraste. Mi reviziis

la teorion de la pigmentoj por plenigi kelkajn mankojn, kaj subite - sen certa intenco, neatendite - mi faris maltrovon pri fiziologio.

- Vere ?

- Vi konas la koloran materion de la sango, ĝi estas ruĝa. Nu, oni povas blankigi ĝin, senkolorigi ĝin, sen ĝeni ĝiajn normalajn funkciojn.

Kempo eligis krion pro surprizo kaj nekredemo. La nevidebla viro ekstaris kaj komencis paŝadi en la kabineto.

- Ho, vi povas grumbli ! Mi memoras tiun tagon. Estis malfrue, dum vespero (tage, oni estis tedegita de studentoj malsaĝaj kaj pigraj), mi tie laboris kelkfoje ĝis la matenruĝo. La lumo subite okazis en mia cerbo, kompleta kaj belega. Mi estis sola. La laboratorio estis trankvila, lumigata en silento de siaj altaj brilaj lampoj... Oni povis travidebligi histon, beston ! Escepte la pigmentoj, oni povis nevidebligi ĝin ! 'Mi povus nevidebliĝi !' mi diris al mi mem. Kaj subite mi ekkomprenis tion kion kapablas iu albino posedanta similan sekreton. Estis stuporiga ! Mi lasis la likvaĵon kiun mi estis filtranta kaj iris rigardi la ĉielon kaj la stelojn tra la granda fenestro. 'Mi povus esti nevidebla !' mi ripetis al mi.

"Realigi tion, estus superi la magion. Mi jam divenis, liberigita de la nebuloj de la dubo, la belegan bildon de ĉiu kiun nevidebleco povis signifi por homo : la misteron, la potencon, la liberecon. Pri malavantaĝoj, mi vidis neniun. Imagu do ! Mi, kompatinda senvalora fizikisto, instruisto de junaj stultuloj en provinca gimnazio, mi kapablus tujtuje fariĝi tiu fenomeno ! Mi demandas al vi, Kempo, se vi... iu ajn, mi certigas al vi, ĵetintus sin impetege en tiun ĉi studon... Mi laboris dum tri jaroj kaj ne stariĝis monto da malfacilaĝoj kiu, formovita, ne lasis min vidi alian. La senfina zorgemo pri la detaloj ! Kaj la incitegiĝo ! Kaj iu kolego, unu el tiuj provinculoj, ĉiam traserĉanta : 'Nu, kiam vi finfine aperigos

vian verkon ?' Tio estis lia ĉiama demando. Kaj la studentoj !  
Kaj la ŝarĝo ! Mil malhelpoj ! Mi eltenis tri jarojn de tiu  
reĝimo... Kaj post tri jaroj de sindetenemo kaj angoro, mi  
akceptis ke, iri ĝis la fino de mia afero, estis neeble, neeble.

- Kial ? demandis Kempo.

- La mono ! la mono ! respondis la nevidebla viro...

Kaj li stariĝis por rigardi tra la fenestro. Poste li  
abrupte turnis sin :

- Tiam, mi ŝtelis la maljunulon, mi ŝtelis mian patron...

Sed la mono ne estis al li... Li mortigis sin.



## 20 \_ La loĝejo de Granda Portlando Strato.

Kempo, dum momento, silentis; li fikse rigardis la dorson de tiu ĉi senkapa korpo kiu ŝajnis apogi la frunton sur la fenestrovitro. Poste li ekstrems, kvazaŭ trafita de subita penso; leviĝis, kaptis la brakon de la nevidebla viro kaj trudis lin turniĝi.

- Vi estas laca, li diris al li, kaj dum mi restas sidanta, vi paŝadas... Prenu mian brakseĝon...

Li metis mem inter Grifino kaj la plej proksima fenestro. Grifino eksidis; post iu minuto li abrupte reparolis :

- Mi jam forlasis la gimnazon de Ŝesilstoŭe kiam tio okazis. Estis la lasta tago de decembro. Mi luprenis ĉambron en Londono, grandan senmeblan ĉambron en dika ludomo, malbone prizorgita, en iu sakstrato de la strato Granda Portlando. La ĉambro estis baldaŭ plenigita de ĉiuj materialoj aĉetitaj per la mono de la maljunulo. Mia tasko ankoraŭ daŭrigis, kun logiko, kun sukceso, proksimiĝanta pli kaj pli al la fino. Mi estis kiel homo kiu, ĉe la eliro de la arbaro, subite alvenus en iun absurdan tragedion. Mi iris entombigi mian patron. La menso ĉiam okupata pro miaj esploroj, mi ne faris la plej etan provon por savi lian reputacion. Mi memorigas la entombigon, la ĉerkoveturilon de la malriĉuloj, la faraĉitan servon, la deklivon de la monteto balaita de frosta vento, kaj lia maljuna kamarado de gimnazio kiu legis super lia tombo la preĝojn por la mortintoj, iu mizera maljunulo, nigra, rompita, kun malvarmumo kiu fluis.

"Mi memoras mian revenon al la senhoma hejmo, la trairon de tiu kiu iam estis vilaĝo kaj kiun entreprenistoj nun aranĝis laŭ la malbela bildo de urbo. En ĉiuj direktoj, la

stratoj finatingis vakejojn kaj finis en amasojn da ruboj aŭ herboj. Mi ankoraŭ vidas min, malgrasan kaj nigran fantomon, paŝanta laŭlonge de la brila kaj glitiga trotuaro, kun stranga seninteresiĝo kiu venis al mi de tiuj malnoblaj burĝaj domoj, de tiuj naŭzaj butikoj.

"Mi tute ne sentis min malĝojan pro la morto de mia patro. Ŝajnis al mi kvazaŭ li estis viktimo de absurda sentimentaleco. La decreguloj, la kutimo postulis mian ĉeeston dum la enterigo, sed la koro ne partoprenis.

"Tamen, kiam mi laŭiris laŭ la strato Granda, mia pasinta vivo prezentiĝis al mia menso, momenton. Mi renkontis fraŭlinon kiun mi estis koninta dek jarojn pli frue; niaj rigardoj kruciĝis... Io instigis min returne iri kaj paroli kun ŝi. Estis tre ordinara virino.

"Tiu vizito al iamaj lokoj ŝajnis al mi sonĝo. Mi tiam ne sentis ke mi estis izolita, ke mi estis elirinta el la mondo por ĵeti min en dezerton. Mi tamen rimarkis la mankon de simpatio ĉirkaŭ mi, sed mi atribuis tion al la ordinara vanteco de vivo. Enirante en mian ĉambron, mi kredis esti revenanta al realeco : tie estis ĉio kion mi konis, ĉio kion mi amis; tie atendis min miaj aparatoj, miaj eksperimentoj tute pretaj. Nun apenaŭ restis iuj malfacilaĵoj nur por la detalo.

"Iun tagon aŭ alian, Kempo, mi diros al vi ĉiujn miajn komplikajn procedojn. Senutile nun. Pri la pli granda parto, krom kelkaj mankoj kiujn mi preferas laŭmemore ŝtopi, ili estas notitaj per ciferoj en tiuj libroj kiujn la trampo ŝtelis al mi. Necesos ke ni rekomencu lian postkuradon. Necesos ke ni reekposedu tiujn librojn... La gravega punkto estis meti la travidebla korpo al kiu necesis redukti la refrakt-indicon, inter du centrojn de kie radiis iaj vibradoj de la etero... pri kiu mi parolos al vi pli poste... Ne, ne temas pri Rentgenaj radioj [R<sub>x</sub>] : Mi ne scias ĉu la miaj estis jam priskribitaj, tamen ilia ekzisto sufiĉe evidentas !... Mi ĉefe

bezonis malgrandajn dinamojn kaj mi funkciigis ilin per gasmotoro, malmultekosta...

"Mia unua eksperimento koncernis pecon de ŝtofo, tukpecon el blanka lano. Estis ja la plej stranga afero en la mondo vidi ĝin, unue fleksebla kaj blanka sub la lumradioj, poste vidi ĝin estingiĝi iom post iom, kiel floko de fumo, malaperi... Mi preskaŭ ne kredis ke mi ricevus tion. Mi etendis la manon en la ŝajnman malplenon : la objekto fakte estis tie, same firma kiel antaŭe. Kaptinte ĝin mallerte, mi lasis ĝin fali teren : mi ne retrovis ĝin sen embaraso.

"Tiam okazis pli stranga eksperimento. Mi aŭdis miaŭon malantaŭ mi; mi turnis min kaj ekvidis ĉe la alia flanko de la fenestro, tre malpuran blankan katon kuŝinta sur la kovrilo de la rezervujo. Iu ideo ekstaris al mi. 'Ho ! Vi, vi alvenas ĝustatempe !' mi pensis, kaj la fenestro malfermita, mi alvokis la katon tre milde. Ĝi eniris ronronante, la kompatinda besto malsatmortis. Mi donis al li iom da lakto. Ĉiuj miaj proviantoj estis entenitaj en iu ŝranko en angulo de la ĉambro.

"Kiam ĝi estis manĝinta, la kato rondiris flarante laŭ la tutan ĉambro, kun la evidenta intenco ekloĝiĝi ĉe mi. La nevidebla tukpeco iom maltrankviligis ĝin. Necesis vidi ĝin kraŭi antaŭe ! Mi komforte kuŝigis ĝin sur la kapkusenon de mia litaĵo, kaj mi donis al ĝi buteron por fari ĝian sinlavadon.

- Kaj ĉu vi agis sur ĝi ?

- Tutcerte. Sed drogi katon, ne estas facila afero, Kempo... La traktado malsukcesis.

- Fiaskis ?

- Jes, pri du punktoj, nome la ungoj kaj la pigmenta materio... kiel tio sin nomas ? Funde de la okulo de la kato... vi ja scias...

- Okul-tapeto (=brilanta tapiŝo).

- Ja estas, la tapeto. Tiu ne taŭgis. Post esti

preniginta al ĝi drogon por blankigi la sangon, post esti suferiginta al ĝi diversajn preparadojn, mi donis al la besto opion, kaj mi metis ĝin, kun la kapkuseno kie ĝi dormis, sur la aparaton. Nu, la tuta cetero estingiĝis, malaperis; sed restis la du etaj flamoj de la okuloj.

- Stranga !

- Mi ne povas kompreni ion. Kompreneble, la kato estis bone fiksita, ĝi ne povis fuĝi. Sed ĝi vekigis, ankoraŭ senkonscia kaj dolĉe miaŭis... Oni frapis ĉe la pordo... Estis maljunulino kiu loĝis malsupre, kaj kiu suspektis min fari vivosekcon, maljunulino ruinigita far alkoholismo kaj kiu havis nenion pli en la mondo ol sian katon. Mi vigle ekprenis kloroformon, faris kompreson kun ĝi, kaj iris respondi ĉe la pordon. 'Ĉu mi ne aŭdis katon, ŝi demandis, mian katon ?' 'Ne estas ĉi tie, mi eligis ĝentile'. Ŝi ne havis fortan konfidon, kaj ŝi provis trarigardi malantaŭ mi en la ĉambron. Ĉio, fakte, estis tre stranga laŭ ŝi, la nudaj muregoj, la fenestroj sen kurtenoj, la litaĵo, la trepidanta gasmotoro, la brilo de radiantaj punktoj, kaj tiu ĉi kloroformodoro en la aero. Fine ŝi devis kontentiĝi per mia respondo, kaj ŝi reiris hejmen.

- Kiom da tempo tio prenis ? demandis Kempo.

- La kato ?... Tri aŭ kvar horoj. La ostoj, la nervoj, la grasaĵo estis la lastaj por malaperi, same kiel la ekstremo de la koloraj haroj. Kaj, kiel mi diris al vi, la okulfundo - viskoza kaj muara materio - tute ne foriĝis.

"Jam noktiĝis ekstere longe antaŭ ol la afero estis finita. Oni vidis nenion pli ol la senbrilajn okulojn kaj la ungojn. Mi haltis la gasmotoron, palpe serĉis, karesis la beston kiu ankoraŭ estis sensentigita, malligis ĉiajn ligilojn, poste sentante min laca, mi lasis ĝin dormi sur la nevidebla kapkuseno, kaj enlitiĝis. Mi malfacile endormiĝis; mi restis sendorma, konfuzo pensanta pri senkoheraj aferoj, ĉiam

rekomencanta mian eksperimenton, malkvieste imaganta ke ĉiuj objektoj mallumiĝis iom post iom, estingiĝis, ĝis la grundo mem kie mi staris, estingiĝis. Mi tiel alvenis al malsana inkubsonĝo kaj al kapturino. Ĉirkaŭ la dua, la kato ekmiaŭis en la ĉambro, mi unue provis silentigi ĝin, parolante al ĝi; poste mi decidis meti ĝin eksteren. Mi memoras la impreson kiun mi eksentis bruligante la fajrilon, tie estis nur du okuloj rondaj, brilaj, verdaj, kaj nenio ĉirkaŭ. Mi ja donintus al ĝi lakton, sed mi ne plu havis tion. Ĝi ne volis gardi sin trankvile; ĝi sidiĝis kaj denove miaŭis ĝis la pordo. Mi provis kapti ĝin kun la ideo de forĵeti ĝin tra la fenestro, sed ĝi ne lasis sin kapti, li malaperis, daŭrigante miaŭi dekstren kaj maldekstren en la ĉambro. Fine, mi malfermis la fenestron, kaj faris gravan agitadon. Sendube ĝi fine eliris : mi neniam plu vidis ĝin, aŭdis ĝin.

"Tiam, Dio scias kial ! Mi pensis pri la entombigo de mia patro, pri la senĝoja monteto skuegita de la vento, ĝis kiam la tago heliĝis. Mi komprenis, ke necesis rezigni dormi kaj fermante mian pordon malantaŭ mi, mi vagis tra la stratoj, en la matena lumo.

- Vi ne volas diri ke ekzistas nevidebla kato forlasita tra la mondo, ĉu ? demandis Kempo.

- Krom se oni mortigis ĝin... Kial ne ? eligis la nevidebla viro.

- Kial ne ?... Sed mi ne intencis interrompi vin.

- Estas tre probable ke oni mortigis ĝin, reparolis Grifino. Tamen, kvar tagojn poste, li estis ankoraŭ viva, estas ĉio kion mi scias; ĝi estis piede de krado, en la strato Granda Tiĉkampo. Mi vidis arigitajn homojn kiuj serĉis de kie venis miaŭadojn.

Grifino silentis dum preskaŭ unu minuto. Poste li daŭrigis kun seka tono :

- Mi memoras tiun matenon kiuj antaŭis mian

metamorfozon... Mi devis esti resuprenirinta la straton Granda<sup>n</sup> Portlando<sup>n</sup>, ĉar mi ankoraŭ vidas la kazernon de la strato Albanjo kaj la eliron de la ĉevalgardistoj; fine, mi troviĝis sidanta sub la suno, suferanta, malkomforta supre de la monteto Primolo. Estis sunbrila tago de januaro, unu el tiuj brilaj kaj malvarmaj tagoj kiujn ni havis tiun jaron antaŭ la neĝo. Mia kompatinda elĉerpita cerbo provis juĝi la situacion kaj estigi kampanjan planon.

"Mi estis surpriziĝinta akcepti, nun ke la rekompenco estis atingebla de mi, kiom sia posedo ŝajnis vana al mi. Fakte, mi estis ellacega; kvar jaroj de persistega laboro lasis min nekapabla de ajna energio kiel de ajna sentemo. Mi estis malvigla kaj mi vane klopodis por reakiri la entuziasmon de miaj unuaj esploradoj, la furiozon de malkovro kiu donis al mi kuraĝon kaŭzi la pereon de mia maljuna patro. Nenio plu ŝajnis al mi gravi. Mi cetere, tre bone, sentis ke tie estis nedaŭra dispozicio, pro la trolaborado kaj la manko de dormo, kaj ke, ĉu per drogoj, ĉu per ripozo, eblus al mi reakiri mian vigecon.

"Mi povis pensi klare nur unu aferon, estas ke necesis direkti mian aferon al konkludo : la fiksa ideo ankoraŭ regis min. Kaj tio sen prokrasti ĉar mi preskaŭ ne pli havis monon. Mi rigardis ĉirkaŭ mi, sur la deklivo de la monteto, infanoj kiuj ludis, junulinoj kiuj priatentis ilin, kaj mi penis pripensi pri ĉiuj fantastaj avantaĝoj kiujn nevidebla viro povus trovi en la mondo.

"Post iu momento, mi tiris min ĝis mia hejmo, glutis iom da manĝaĵo, dozegon da striknino kaj ĵetis min tute vestita por dormi sur mian liton ne aranĝita... La striknino, Kempo, estas mirinda toniko; tio revigligas iun homon.

- Sed tio estas diabla rimedo, estas fajro en botelo !  
- Mi trovis min, ĉe la vekiĝo, tute revigligita kaj eĉ nervoza. Ĉu vi komprenas ?

- Jes, mi konas la drogon.

- Nu, iu frapis sur mia pordo. Estis mia luiganto, kun minacoj, kun iu tuta demandaro : iu maljuna pola judo, vestinta per longa griza mantelego, piedvestinta per grasaj pantofloj. Mi turmentis katon dum la nokto, li estis certa : la lango de la maljunulino funkciis. Li insistis por scii ĉion. La leĝoj de la lando pri vivisekcio estis tre severaj; li povis esti akuzota.

"Mi neis la katon. Tiam li diris ke la trepidadoj de mia malgranda gasmotoro estis sentitaj en la tuta domo - tio kio estis vera, kompreneble. Li spionvadis ĉirkaŭ mi en la ĉambro, strabante al ĉio super siaj okulvitroj el arĝento. La teruro subite kaptis min ke li kunŝtelu ion de mia sekreto. Mi provis loki min inter li kaj la aparato de koncentrado kiun mi inventis : tio nur igis lin pli scivolema. Kaj kion mi faris ? Kaj kial mi ĉiam estis sola kaj mistera ? Ĉu estis leĝe ? Ĉu ne estis danĝere ? Mi pagis nur ordinaran luadon. Lia domo ĉiam estis respektinda, malgraŭ malbonaj najbarejoj...

"Subite, la pacienco eskapis el mi, mi ordonis lin eliri. Li tuj ekprotestis, balbutis ke li rajtis eniri miahejmen. En sekundo, mi firme kaptis lin per la kolumo (iu afero ŝiriĝis) kaj li turniĝadis ĝis en la koridoro. Mi frapfermis la pordon, faris turnon de ŝlosilo kaj sidiĝis tute tremetanta.

"Ekstere, li gravigis bagatelojn pri kiuj mi tute ne okupiĝis, kaj post momento, li foriris.

"Sed tiu incidento maldolĉigis la aferojn. Mi ne sciis nek tion kion li intencis, nek tion kion li rajtis fari. Transloki min en alian apartamenton, estis malfruigo. Aliflanke, restis al mi apenaŭ dudek pundoj - plejparte en banko - kaj mi ne kapablis pagi al mi transloĝiĝon. Malaperi ! restis nur tio.

"Jes, sed estus miahejme enketoj, traserĉado... Je la penso ke mia laboro povus esti endanĝerigita, interrompita en sia lasta etapo, mi ekbolis per furioza aktiveco. Unue, mi

rapidis eliri kun miaj tri volumoj de skribaĵoj, mia ĉekaro - la trampo nun havas ĉion tion - kaj mi adresis ilin, de la plej proksima poŝtoŭficejo, al iu privata poŝto restanta en la strato Granda Portlando. Mi provis eliri senbrue.

Revenante, mi trovis la luiganton kiu trankvile supreniris la ŝtuparon; li aŭdis, mi supozas, la pordon fermiĝi. Vi ridintus vidi lin flankensalti sur la interŝtuparo kiam mi alvenis kurante malantaŭ li. Li konsternita rigardis min kiam mi pasis tute proksime. Mi tremigis la tutan domon frapfermigante mian pordon. Mi aŭdis lin alveni per tirata paŝado ĝis mia etaĝo; li hezitis, poste malsupreniris. Mi tuj redaŭrigis miajn preparojn.

"Ĉio estis finfarita en la vespero, en la nokto. Mi estis tie senmove, sub la dolora kaj dormiga influo de la drogoj kiuj senkolorigas la sangon. Oni frapis batojn ĉe la pordo. Tio ĉesis, paŝoj foriris, poste ili revenis ekfrapi. Baldaŭ oni provis gliti ion sub la pordo, bluan paperon. Pro malpacienca atako, mi starigis min, iris malfermi la pordon plenlarĝe.

"Nu !" mi ekkriis. Estis mia luiganto, portanto de elpela ordono. Li prezentis ĝin al mi, rimarkis ĉe la aspekto de miaj manoj ion eksterkutima, mi pensas, kaj levis la okulojn al mian vizaĝo.

"Unue, li restis kun buŝo faŭkanta, poste li eligis ian nekompreneblan krion, lasis fali samtempe kandelon kaj paperon, kaj blinde forfuĝis tra la malluma koridoro, direkte al la ŝtuparo. Mi ŝlose refermis la pordon. Alproksimigante min al la spegulo, mi komprenis lian timegon : Mi havis la vizaĝon tute blanka, koloro de ŝtono.

"Estis tute abomena. Mi kalkulis sen la suferado. Nokto de akra angoro, de naŭzoj, de malfortiĝo. Mi kunbatis la dentojn kvankam mia haŭto estis fajra, mia tuta korpo fajris. Kaj mi estis tie, kuŝanta kiel kadavro. Mi nun komprenis kial la kato plendis ĝis la momento de la



kloroformo... Estis tre feliĉe ke mi vivis sola kaj forlasita en mia ĉambro. Estis momentoj kiam mi plorĝemis, kiam mi plorkriis, kiam mi parolis; sed mi bone eltenis... Mi perdis konscion, poste vekigis tute malvigla, en la nigra nokto.

"La doloro ĉesis. Mi diris al mi ke mi estis mortiganta min, sed mi ne atentis pri tio. Mi neniam forgesos la tagiĝon kaj la eksentitan hororon revidi miajn manojn fariĝintaj kiel diafana vitro kaj pli travideblaj kaj pli maldikaj laŭmezure kiel la lumeco pliigis; fine mi povis travidi, kaj malgraŭ miaj fermitaj palpebroj, la malbelegan malordon de mia ĉambro. Miaj membroj fariĝis vitrecaj; la ostoj kaj la arterioj estingiĝis, malaperis; la etaj blankaj nervoj forpasis laste. Mi grincigis la dentojn, sed mi tie atendis ĝis la fino ... Finfine, nur la morta ekstremo de la ungoj postrestis, pala kaj blanka, kun la bruna makulo de iu acido sur miaj fingroj.

"Mi klopodis por ellitiĝi. Unue, mi estis tiel nekapabla kiel vindinfano : Mi piedpaŝis rande de mia lito, kun membroj kiujn mi ne povis vidi. Mi estis malforta kaj malsata. Mi antaŭeniris kaj rigardis en mian spegulon : nenion ! tute nenion ! Krom kelkajn mildigitajn pigmentojn, pli delikataj ol nubo, postrestantaj malantaŭ la retino. Mi devis klini min al la tablo kaj glui mian frunton al la spegulon.

"Estis nur per impetega volostreĉo ke mi sukcesis reiri al miaj aparatoj kaj kompletigi mian operacio.

"Mi dormis dum la mateno, metante mian littukon sur miaj okuloj por protekti ilin kontraŭ la lumo. Ĉirkaŭ tagmezo, mi estis vekata de batoj ĉe la pordo. Miaj fortoj estis revenintaj al mi : mi sid-rektiĝis sur mia postaĵo, mi streĉis la orelon kaj mi distingis flustrojn. Mi saltis sur miaj piedoj kaj, silente, plej dolĉe kiel eble, mi komencis malmunti mian aparaton, disigi la partojn tra la ĉambron, por ke oni ne povus fari al si ideon pri ĝia strukturo. Baldaŭ la batadoj renoviĝis, voĉoj alvokis : unue, tiu de la luiganto, poste, du

aliaj. Por ŝpari tempon, mi respondis al ili. La nevideblaj ĉifono kaj kapkuseno trafitaĵoj de mia mano, mi malfermis la fenestron kaj forĵetis ilin eksteren, sur la kovrilon de rezervujo. Kiam la fenestro malfermiĝis, krako aŭdiĝis ĉe la pordo : iu metis premadojn, por cedi la seruron, sed la solidaj rigliloj kiujn mi ŝraŭbis kelkajn tagojn antaŭe, haltigis lin. Tamen, tio tremetigis min kaj furiozigis min. Mi komencis tremi kaj rapidigi miajn movadojn.

"Mi ĵetis dise-mise meze de mia dormoĉambro dekroĉitajn folietojn, pajlon, pakpaperon, ktp, kaj mi ŝaltis la gaskranon. Seriozaj batoj ekpluvis sur mia pordo. Mi ne sukcesis trovi la alumetojn. Per miaj manoj mi kolere batis la murojn. Mi remalŝaltis la gason, transpaŝis la fenestron kaj stariĝis sur la kovrilon de rezervujo; poste, mildege, mi mallevis la glitfenestron kaj tie, sekura, nevidebla. sed tremanta pro kolero, mi sidiĝis por atendi la okazaĵojn.

"Mi vidis ilin krevigi unu el la paneloj; momenton poste, ili dissaltigis la fermilon de la rigliloj kaj ili aperis en la pordkadro. Estis la proprietulo, akompanita de siaj du bofiloj, du knaboj kun dudek tri aŭ dudek kvar jaroj. Malantaŭ ili, svingiĝis la silueto de maljuna virino, la maljunulino de malsupre.

"Vi povas imagi ilian miron trovi la ĉambron malplenan. Unu el la junuloj tuj kuris al la fenestro, haste malfermis ĝin kaj rigardis eksteren. La okuloj malfermegitaj, lia barba diklipa vizaĝo venis je unu futo [ $\pm 30\text{cm}$ ] de la mia. Mi ja deziregis frapi ĝin, sed mi detenis mian fermitan pugnon.

"Liaj rigardoj trapasis al mi la korpon. Simile tiuj de la aliaj, kiam ili rekuniĝis kun li. La maljunulo iris alĵeti rigardon sub la liton. Poste ĉiuj ĵetegis sin al la komodo. Ili komencis diskuti senfine per duone juda ĵargono, duone malbona angla; kaj ili konkludis ke mi ne respondis al ili, ke ili estis trompitaĵoj de sia imago. Iu sento de eksterordinara

orgojlo postveni mian koleron, dum, instalinta ekster la fenestro, mi observis tiujn ĉi kvar geulojn (la maljunulino ankaŭ estis enirinta; ŝi gvatis suspekteme, tute ĉirkaŭ si, kiel kato), tiujn ĉi kvar geulojn kiujn provis kompreneti la enigmon de mia ekzisto.

"La luiganto, tiom kiom mi povis kompreni el lia slango, akordiĝis kun la maljunulino : mi realigis vivisekcion. La filoj certigis per ĵargonaĵo ke mi estis elektristo : ili donis kiel pruvon la dinamojn kaj radiatorojn. Ĉiuj estis tre malkvietaj pro la ideo de mia reveno; tamen mi pli poste konstatis ke ili riglis la enirejan pordon. La maljunulino ankoraŭ rigardis en la komodo kaj sub la lito : unu el miaj kunloĝantoj, iu stratvendisto, kiu kunloĝis kun iu buĉisto la kontraŭan ĉambron, aperis sur la interŝtuparo : oni vokis lin, li eniris, kaj parolaĉis sensencaĵojn.

"Prezentiĝis al penso ke la specialaj radiatoroj kiujn mi uzis, se ili trafus en la manojn de inteligenta kaj klera homo, povus perfidi min. Estante do elatendinta favoran cirkonstancon, mi traŝoviĝis de la fenestro en la ĉambron kaj, evitante la maljunulinon, mi disigis el ĝia ĝemelo, kiu subtenis ĝin, unu el la etaj dinamoj, kaj mi sendis la tutan aparaton kraŝi sur la pargeton. Ha ! Ilia teruro !... Dum ili provis klarigi al si la aferon, mi elŝteliĝis eksteren kaj singardeme malsupreniris la ŝtuparon.

"Ĉe la teretaĝo, mi eniris en malgrandan ĉambron kie mi atendis. Fine ili ankaŭ malsupreniris, ankoraŭ malkvietaj, ankoraŭ disputantaj, ĉiuj iom embarasitaj ne esti trovantaj "fiaĵon" kaj demandantaj al si kiu estis sia leĝa situacio rilate al mi. Tuj kiam ili estis malsupre, mi denove elŝteliĝis, resupreniris kun skatolo da alumetoj, bruligis mian amason da paperoj kaj malpuraĵoj, proksimigis la seĝojn kaj la litaĵojn, alportis la gason per kaŭĉuka tubo...

- Ĉu vi bruligis la domon ? ekkriis Kempo.

- Jes, mi flamigis ! Estis la sola maniero malklarigi mian spuraron. Kaj cetere, la domo certe estis asekurita... Mi trankvile malriglis la enirejan pordon kaj jen mi sur la strato ! Mi estis nevidebla kaj nur komencis ekkompreni la eksterordinaran avantaĝon kiun donis al mi tiun kvaliton. Mia kapo jam entenis amason da malsaĝaj kaj mirindaj projektoj kiujn mi kapablis de tiam senpune ekplenumi.

## 21 \_ En la strato Oksfordo.

"Malsuprenirante la ŝtuparon, la unuan fojon, mi trovis neatenditan malfacilaĵon : mi ne povis vidi miajn piedojn, mi dufoje mispaŝis. Same, okazis aparta mallertaĵo pri mia maniero ekpreni la riglilon : mi ne vidis miajn manojn... Tamen, kondiĉe ke mi ne rigardas algrunde mi sukcesis sufiĉe bone paŝi sur ebena tereno.

"Mia mensostato, vi devas kompreni tion, estis la ekzaltiĝo. Mi spertis impreson de vidanto kiu paŝus kun la piedoj ĉirkaŭvolvitaj per vato kaj kun vestaĵoj kiuj farus nenian bruon en civito de la blinduloj. Mi freneze tentiĝis ŝerci, timigi la homojn, frapeti al ili la ŝultron, forĵeti ĉapelojn por petoli per miaj esceptaj avantaĝoj.

"Tamen, apenaŭ mi alvenis sur la straton Granda" Portlando" (mi loĝis tute proksime al la granda novaĵbutiko), mi aŭdis kolizian bruon kaj mi estis fortege ekfrapita de malantaŭe. Turniĝinte, mi vidis viron kiu portis korbon da sifonboteloj kaj kiu rigardis sian portaĵon kun konsterno. Kvankam la bato reale doloris min, mi trovis ion tiom amuza en lia konsterniĝo ke mi laŭtege rideksplodis. 'La diablo estas ene !' mi kriis, tirante la korbon el la manoj de la portanto. Tiu ĉi maltenis ĝin kaj mi forĵetis supren la tutan ŝarĝon. Sed iu kruda koĉero kiu troviĝis tie antaŭ drinkejo, ĵetiĝis sur ĝin kaj liaj etenditaj fingroj atingis min kun bedaŭrinda vigleco, sub la orelo. Mi lasis ĉion fali sur la koĉero. Tiam kriadoj, piedpremado de la homamaso ĉirkaŭ mi; la homoj eliras el la butikoj, la veturiloj ekhaltas. Mi komprenis mian azenaĵon, kaj malbenante ĝin, mi dorsapogiĝis kontraŭ montrofenestro kaj atendis la momenton forkuri. En unu momento, mi povus esti kaptita en

la interpuŝiĝo kaj nepre malkovrita. Mi puŝpelis buĉistan lernoknabon kiu feliĉe tute ne turnis sin por vidi la neniecon kiu pelis lin kaj mi elŝteliĝis malantaŭ la fiakron. Mi nekonas kiel finiĝis la afero.

"Mi rapidis trairi la ŝoseon kiu feliĉe estis libera kaj apenaŭ atentante pri la vojo kiun mi sekvis, turmentata ekde la lasta incidento de ektimigo esti malkovrita, mi enŝoviĝis en la homamaso per kiu Oksfordo estas embarasita posttagmeze. Mi provis loki min en la fluo, sed ĝi estis tro kompakta kaj baldaŭ oni surtretis miajn kalkanojn. Mi uzis la rojon kies malebenaĵojn mi opiniis tre penigajn, kaj preskaŭ tuj, la timonforko de fiakro serĉanta klienton fortege ekfrapis min sub la skapolo, memoriganta al mi ke mi jam estis dolore vundetita. Mi ŝanceliĝante malproksimiĝis, evitis per instinkta movo, puŝĉareton, kaj retroviĝis malantaŭ la fiakro. Iu inspiro savis min : ĉar tiu ĉi malrapide antaŭeniris, mi sekvis ĝin, mi iris laŭ ĝiaj spuroj, surprizita de la evoluo kiun atingis mian aventuron, malkvieta kaj tremetanta pro malvarmo. Estis hela januara tago kaj mi estis tute nuda kaj la maldika kototavolo kiu kovris la veturejon estis tre proksime frostiĝanta... Malsaĝa, mi nun komprenas tion, mi ne kalkulis ke, travidebla aŭ ne, mi ne estis imuna kontraŭ la rigorecoj de temperaturo.

"Subite, bonega ekpenso pasis tra mia cerbo : Mi kurante ĉirkaŭiris kaj grimpis en la fiakron. Kaj tiel, tremetante, timigite, snufante, sentante la unuajn signojn de malvarmumo kun pli kaj pli doloraj kontuzoj en la renoj, mi paŝe veturigis min laŭlonge de la strato Oksfordo, ĝis preter la vojo Totenhamkortumo. Kiel oni povas imagi tion, mia humoro estis gravege ŝanĝita de la momento kiam, dek minutojn pli frue, mi ekĵetis min ekster mia hejmo. Ha, tiu privilegio esti nevidebla ! La sola penso kiu nuntempe absorbis min, estis scii kiel elturni min el tiu afero.

"Ni malrapide pasis antaŭ la vendejo de Mudie. Tie, altstatura sinjorino portanta kvin aŭ ses volumojn kun flava kovrilo, postkriis mian fiakron. Mi elsaltis nur ĝustatempe por eskapi ŝin, flugtuŝante de proksime, dum mia fuĝado, iun kamionon de la fervojo. Mi forkuris en la direkto al placo Blomsburi, kun la intenco direkti min norden, malantaŭ la Brita Muzeo, kaj tiel atingi la kvietajn kvartalojn. Mi estis nun kruele frostigita, kaj la strangeco de mia situacio incitis la nervojn tiagrade ke mi kurante ploris. Ĉe la okcidenta angulo de la placo, malgranda blanka hundo eliris el la oficejoj de la Farmacia Societo kaj ĝi tuj venis spuri direkte al mi, kun la nazo algrunde.

"Mi neniam antaŭe pensis pri tio : la nazo estas por la menso de hundo tio kio la okulo estas por la menso de homo kiu klare vidas. La hundoj perceptas la odoron de pasanto kiel la homoj perceptas lian formon. La besto komencis boji kaj salti, montrante, laŭ tio kio tro klare ŝajnis al mi, ke ĝi eksciis pri mia ĉeesto. Mi trairis la straton Granda<sup>n</sup> Rusel<sup>on</sup> rigardante super mia ŝultro kaj mi paŝis vojireton en la strato Montago antaŭ distingi laŭ kiu direkto mi kuris.

"Tiam mi aŭdis muzikon kaj rigardante for, mi vidis homamason kiu eliris el la placo Rusel, aron da ruĝaj trikotoj, kaj antaŭe, la standardo de la Savarmeo. En tia popolamasiĝo aŭ deklamanta sur la ŝoseo aŭ mokanta sur la trotuaroj, neniu espero penetri. Ne volante returne iri kaj pli malproksimiĝante de mia loĝejo, decidiĝante sub la instigilo de la cirkonstancoj, mi grimpis la tre blankajn ŝtupojn de iu domo kiu frontis al la kradoj de la Brita Muzeo kaj mi staris tie por atendi ke la homamaso preterfluu. Feliĉe, mia hundo haltis pro la bruo de la fanfaro, hezitis kaj galope reiris al placo Blomsburi.

"La svarmo alvenis, kriadante kun nekonscia ironio, la himnon "Kiam ni vidos Lin vidalvide ?" La tempo ŝajnis al mi

senfina antaŭ ol la fluo de la popolamaso venis forbalai la trotuaron ! Bum ! Bum ! Bum ! La tamburego sendis al mi siajn bruajn vibradojn; kaj mi ne atentis pri du knaboj haltintaj apud mi :

- Rigardu do ! diris unu el ili..

- Kion ? eligis la alia.

- Sed... tiujn ĉi spurojn de paŝoj... de nudaj piedoj...

"Mi vidis tiujn haltintajn infanojn kun malfermita buŝo, antaŭ la kotaj spuroj kiujn mi postlasis malantaŭ mi sur la freŝdate blankigitaj ŝtupoj. La pasantoj preterfrotis ilin, puŝis ilin, sed ilia damna penskapablo staradis tie neagante... (Bum ! Bum ! Bum !) Kiam (Bum !) ni vidis Lin (Bum !) vidalvide (Bum ! Bum !) ?...

- Estis viro kiu nudpiede suriris tiujn ĉi ŝtupojn aŭ mi ja ne komprenas, diris unu el la knaboj. Kaj li ne desupris. Kaj lia piedo sangis !

La ĉefa parto de la homamaso estis preterpasita.

- Rigardu tien, Edĉjo ! eligis la plej juna el la detektivetoj, per akra voĉo pro surprizo. Kaj li etendis la fingron direkte al miaj piedoj. Mi ankaŭ rigardis, kaj mi vidis iliajn konturojn montritajn de makuletoj el koto. Dum momento, mi estis paralizita.

- He ! Estas strange, diris la plejaĝa, estas konsternege ! Ekzakte la ombro de iu piedo, ĉu ne ?

"Li hezitis, poste li antaŭenpaŝis kun etendita mano. Iu viro haltis por vidi tion kion li serĉis, poste iu fraŭlino. Ankoraŭ sekundon kaj li tuŝintus min. Tiam mi ekkomprenis tion kio estis por fari; mi antaŭeniris unu paŝon, la knabo eksaltis malantaŭen eligante krion kaj per rapida movo, mi saltis sur la sojlon de la najbara domo. La plej juna el la buboj estis sufiĉe lertaj por sekvi la movadon kaj, antaŭ ol mi malsupreniris la ŝtupojn kaj atingis la trotuaron, li estis elsurpriziĝinta kaj kriegis ke la piedoj estis pasintaj trans la



muron.

"Oni faris rondon ĉirkaŭ li, oni vidis novajn spurojn de miaj paŝoj sur la lasta ŝtupo kaj sur la trotuaro. 'Kio estas ?' demandis iu. 'Piedoj ! Vidu ! Piedoj kiuj kuras !'

"Ĉiuj en la strato, escepte miajn tri turmentistojn, klopodis nur pri la eskortado de la Sava Armeo; tiu svarmo haltigis min, sed haltigis ankaŭ ilin. Okazis dismovo en la homamaso; oni miras, oni pridemandas. Mi puŝpelis junulon, transpasis; momenton poste, mi kapkline kuris ĉirkaŭ la placo Rusel, kun ses aŭ sep homoj kiuj sekvis miajn postsignojn kaj prikomprenis nenion. Mi ne havis la eblecon klarigi min : estus tuj la tuta amaso kiun mi havintus post mi.

"Dufoje mi turniris ĉe iu angulo, trifoje mi trainis la ŝoseon kaj revenis sur miaj paŝoj; poste ĉar miaj piedoj revarmiĝis kaj sekiĝis, ilia spuro komencis forvelki. Fine, mi havis tempon por spiri; mi frotis min, purigis al mi la piedojn per la manoj, kaj tiel mi sukcesis savi la tuton. Tio kion mi laste vidis pri tiu ĉasado, estis malgranda grupo de eble dekduo da geuloj, esplorante kun senfina perplekso iun spuron kiu malrapide sekiĝis post iu flako da akvo sur la placo Tavistoko, iun spuron tiom izolita kaj tiom nekomprenebla kiom la spuro observita de Robinsono Kruso sur lia dezerta insulo.

"Tiu kurado iomete revarmigis min; mi enŝoviĝis kun pli da kuraĝo en la labirinton de tiuj ĉi malmulte trapasataj stratoj kiuj troviĝas tie. Mia dorso estis rigida kaj dolorplena; miaj tonsiloj estis doloraj ekde la ĉirkaŭstreĉo de la koĉero; la haŭto de mia kolo estis skrapvundita de liaj ungojn; miaj piedoj ege suferigis min; iu malgranda tranĉvundo ĉe unu el ili, lamigis min. Iam mi vidis blindulon alproksimiĝi al mi, mi evitis lin hopante, ĉar mi timis la fajnecon de liaj sensoj. Unu- aŭ dufoje, okazis kolizioj; mi lasis la geulojn konsternitajn pro neklarigeblaj malbenoj kiuj

eĥiĝis en iliaj oreloj.

"Tiam, malrapide, sen bruo, io alvenis al mi en la vizaĝon : la placo sin kovris per delikata blanka mantelo, flokoj de neĝo falis malrapide. Mi trafiĝis malvarmumon kaj ne povis min deteni terni. Ĉiuj hundoj kiujn mi renkontis, estis por mi, kun ilia streĉita muzelo kaj iliaj maldiskretaj snufadoj, objektoj de teruro.

"Mi vidis alkuri homojn, infanojn, plenpulme kriante : estis brulego. Ili iris direkte al mia loĝejo. Rigardante malantaŭ mi, al la malsupro de la strato, mi ekvidis amason da nigra fumo supre de la tegmentoj kaj de la telefondratoj. Estis, mi certiĝis, mia loĝejo kiu brulis : ĉio estis tie, vestojn, aparatojn, ĉiuj miaj vivrimedoj, vere, krom mia ĉekaro kaj la tri volumoj de notoj kiuj atendis min en la strato Granda Portlando. Ĉio brulis, ĉio ! Se iam viro bruligis ĉiujn pontojn malantaŭ si, ja estis mi ! La domo fajris".

La nevidebla viro paŭzis kaj pripensis. Kempo senpacience ekrigardis tra la fenestro. Poste :

- Mi aŭskultas vin, li diris, daŭrigu !

## 22 \_ En iu ĉiovendejo.

"Estis do dum lasta januaro, sub neĝoŝtorma minaco - kaj la neĝo, restante sur mi, aperigus min - ke, laciĝinta, frostiĝinta, suferanta, malfeliĉa pli ol oni povus diri, kaj tamen apenaŭ konvinkita pri mia nevidebleco, mi komencis tiun ĉi novan vivon al kiu mi estis destinita. Mi estis sentegmenta, kaj sen vivrimedoj. neniu estulo en la mondo al kiu mi povus konfidi min. Diri mian sekreton estis denunci min, fari pri mi kuriozaĵon, fenomenulon. Tamen, mi ja deziregis alpaŝi la unuan renkontiton kaj fidi al sia diskreteco. Sed aliflanke, mi konjektis la teruron, la krudan kruelecon kiun vekus miaj proponoj. Mi formis nenian projekton dum mi estis sur la strato. Mia sola celo estis ŝirmi min kontraŭ la neĝo, esti finfine kovrita, en varmo : nur tiam mi kapablus decidi planon. Sed eĉ por mi, nevidebla viro, la vicoj da domoj tra Londono restis fermitaj, barikaditaj, riglitaj, neatingeblaj.

"Mi klare vidis nur unu aferon antaŭ mi : la malvarmon, la misveteron, ĉiajn mizerojn sub la neĝo kaj en la nokto.

"Rimarkinda ideo venis en mian kapon. Venis al mi bonega plano, mi ekiris laŭ unu el la stratoj kiuj kondukas de la strato Gover al la vojo Totenhamkortumo kaj mi baldaŭ troviĝis antaŭ la Holdingo, tiu granda entrepreno kie oni vendas ĉion, vi ja scias - viandon, spicaĵojn, tolaĵojn, meblojn, vestojn, kaj eĉ oleopentraĵojn - iu grandega labirinto de butikoj pliĝuste ol iu vendejo. Mi pensis ke mi trovus la pordojn malfermitaj, ili estis fermitaj. Dum mi staris en la larĝa enirejo, iu veturilo haltis antaŭe; iu viro en uniformo - vi bone konas tiun specon de ulo, kun Holdingo per oraj literoj sur la kaskedo - malfermis la pordon. Mi sukcesis

enŝoviĝi kaj, transirante la domon - mi estis ĉe la sekcio de la rubandoj, gantoj, ŝtrumpetoj, ktp - mi alvenis en pli vastan parton dediĉitan al korboj por piknikoj kaj al mebloj el vimeno.

"Tie mi tamen ne sentis min sekura : tro da homoj senĉese iris kaj reiris. Mi vagis tie kaj tie, tiel bone ke mi malkovris ĉe supra etaĝo iun vastan sekcion kie viciĝis kvantoj da lignaĵoj de lito; mi grimpis la lignaĵojn kaj finfine trovis rifuĝejon en grandega amasiĝo de falditaj matracoj. La loko, jam lumigita, estis agrabla kaj varma : mi decidis resti en tiu kaŝejo, kun singarde streĉita okulo al grupoj de komizoj kaj klientoj kiuj cirkulis en la vendejo, ĝis fermohoro. Mi tiam povus, mi pensis, priŝteli la firmon por nutri min, vesti min, maskovesti min, spionvagi ĉien, taksi la vivrimedojn, eble dormi sur iu lito. La plano ŝajnis tre saĝa. Mia ideo estis akiri kostumon, fari al mi taŭgan kapon, kvankam envolvitan, havi monon, tiam repreni mian libron tian kie ili atendis min, poste ien lupreni loĝejon kaj senhaste prepari la kompletan realigon de la superecoj kiujn donis al mi sur la aliuloj - mi ankoraŭ kredis tion ! - mia privilegio esti nevidebla.

"La fermado okazis sufiĉe rapide. Ne estis pli ol horo ke mi okupis pozicion sur la matracoj kiam mi vidis ke oni mallevis la ferkurtenojn de la fenestroj kaj ke oni puŝis la klientojn al la pordoj. Pluraj viglaj junuloj kun eksterordinara fervoro ekordigis ĉiujn varojn kiuj restis malorde. Mi forlasis mian rifuĝejon tuj kiam la tumulto malpliigis, kaj mi singarde vagis tra la malpli izolitaj partoj de la ĉiovendejo. Mi vere surpriziĝis vidi per kiu rapideco, junuloj kaj junulinoj forprenis la varojn dise prezentitaj por la vendado dum la tago. Ĉiuj kartonoj, ĉiuj penditaj ŝtofoj, ĉiuj pasamentaĵoj, ĉiuj skatoloj da dolĉaĵoj en la sekcio de nutraĝvendejo, ĉiuj montraĵoj bretoj de ĉi tio aŭ tio estis

dekroĉitaj, kunligitaj, envolvitaj, remetitaj en bone zorgitajn ĉelojn; ĉiu kiu ne povis esti prenita kaj lokita, estis kovrita de tegaĵo el kruda tolo. Fine, ĉiuj sidiloj estis renversitaj sur la vendotablojn, por lasi la pargeton libera. Tuj kiam ĉiu el tiuj ĉi junuloj finis, li aŭ ŝi rapidis al la elirejo kun vigla mieno kiun mi ĝis nun malofte rimarkis ĉe la komizoj. Tiam alvenis skipo da knaboj, disŝutantaj lignan segaĵon, portantaj sitelojn kaj balailojn. Mi devis flankeniĝi por ne troviĝi sur ilia traĭro, kaj eĉ okazis ke mia maleolo ricevis segaĵon. Dum kelka tempo, vagante laŭ la tegitaj kaj mallumaj vendotabloj, mi povis aŭdi la laborantajn balailojn. Fine, proksimume horegon post la fermado de la vendejo, mi distingis bruon de pordoj ŝlositaj. Silento ĉien disvastiĝis kaj mi troviĝis sola en la labirinta implikaĵo de bretoj, de galerioj, de montrosalonoj. Ĉio estis tre trankvila; de iu loko, apud unu el pordoj kiuj rigardas al la strato Totenhamkortumo, mi memoras esti aŭdinta la bruon kiun faris ekstere la kalkanumoj de la pasantoj.

"Mia unua vizito estis por la parto kie mi vidis vendi ŝtrumpojn kaj gantojn. Estis mallume, mi havis la malagrabraĵon ĉasi alumetojn; sed mi fine eltrovis ilin en iu tirkesto de malgranda kasejo. Poste necesis al mi trovi kandelon. Mi ŝiris kovertojn, priserĉis, mi ne scias kiom da skatoloj kaj tirkestoj, fine, mi malkovris tion kion mi serĉis: la etikedo de kartono indikis: "Kalsonoj kaj subĉemizoj el ŝafida lano". Poste, ŝtrumpetojn, tre densa ŝultrotuko; poste mi iris al la fako de vestaĵoj, prenis iun pantalonon, iun endoman jakon, iun surtuton kaj iun molan ĉapelon - specio de eklezia ĉapelo kun falditaj randoj. Mi komencis refariĝi iu homa estulo. Tiam mi pensis manĝi.

"Ĉe la supra etaĝo, estis bufedo. Mi ene trovis malvarman viandon; kafo restis en la kafokruĉo. Mi ekflamigis la gason, revarmigis ĝin. Mi jam pli bone fartis.

Poste ĉar mi serĉis. kovrilojn - necesis kontentiĝi per iu sortimento da piedkovriloj - mi trafis sekcion de nutraĝvendejo kun pli da ĉokolado kaj da kanditaj fruktoj ol bezonis al mi kaj blanka Burgonja vino. Flanken, la sekcio de ludiloj : jen ekstaris al mi brila ideo... Estis tie falsaj nazoj, nazoj el kartono, vi scias, ĉu ne ? Mi ja volintus malhelajn okulvitrojn, sed la Holdingo tute ne komercis da optikaj artikloj... Mia nazo maltrankviligis min. Mi estis pensinta ŝminki ĝin; sed tiu ĉi malkovro dezirigis al mi perukojn, maskojn, ktp. Finfine, mi iris dormi sur amason da tre varmaj, tre komfortaj piedkovriloj.

"Miaj lastaj pensoj antaŭ ekdormeti estis la plej gajaj kiuj venis al mi ekde mia metamorfozo. Mi ĝuis de la fizika komforto, kaj mia spirito travivis tion. Mi kredis povi matene elŝteliĝi sen esti vidata kun miaj vestoj sur mi, kovrante mian vizaĝon per granda blanka koltuko kiun mi prenis; per la trovita mono, mi aĉetus okulvitrojn kaj mi tiel kompletigus mian alivestiĝon.

"Mi ne malfruis revidi en la plej tumultaj sonĝoj ĉiujn fantaziajn eventojn de tiuj ĉi lastaj tagoj. Mi vidis etan malbelan judan proprietulon kolerkriante hejme; mi vidis liajn du bofilojn miregigitaj, kaj la sulkiĝintan vizaĝon de maljunulino kiu postulis sian katon. Mi denove konis la strangan senton vidi la ŝtofon malaperi, kaj revenis sur la ventobatitan monteton, mi aŭdis la maljunan pastoron snufi kaj murmuri antaŭ la malfermita tombo de mia patro : 'La ŝlimo al ŝlimo, la cindro al cindro, la polvo al polvo... Ankaŭ vi !' eligis voĉo. Kaj subite mi estis pelita al la truo. Mi baraktis, kriis, vokis helpon de la funebrantaro; sed ne pli kortuŝitaj ol ŝtonoj, ili daŭrigis sekvi la servon. La maljuna pastoro mem ne ĉesis zumi kaj snufi sur sia ritolibro. Mi komprenis ke oni povis nek vidi min nek aŭdi min kaj ke iu nerezistebla potenco kaptis min. Mi vane luktis, mi estis kuntirata al la rando, la

ĉerko aŭdigis obtuzan sonon kiam mi falis sur ĝin, kaj tero estis ŝovele ĵetita sur mian korpon. Neniu atentis pri mi, neniu ekvidis ke mi estis tie. Mi spasme baraktadis kaj ekvekiĝis.

"La ektagiĝo, la pala Londona tagiĝo estis veninta, mia rifuĝejo estis lumigita per malvarma kaj griza lumo kiu filtriĝis ĉirkaŭ la rulkurtenoj. Mi restariĝis kaj, dum momento, ne povis kompreni kie mi estis, en tiu ĉi vasta ĉambro, kun ĉiaj vendotabloj, ĉiaj stakoj da volvitaj ŝtofoj, ĉiaj amasoj da piedkovriloj kaj da kusenoj, ĉiaj kolonoj el fero. Poste, la memoro revokis sin al mi, mi aŭdis voĉojn kiuj interbabilis.

"Tie, tie, en la pli brila lumo de iu vendotablo kiu estis jam levinta ĉiajn rulkurtenojn, mi vidis du virojn alproksimiĝi, mi lasis min gliti, serĉante tra kie mi povus fuĝi. Sed la bruo de mia movo sciigis ilin pri mia ĉeesto : ili sendube ekvidis formon kiu foriris kun malplej da bruego kaj plej rapide kiel ĝi povis. "Kiu estas tie ? kriis iu. - Haltu !" kriis la alia. Mi hastege turniris angulon, kaj trafis ĝuste - mi, korpo sen kapo, ne forgesu tion - sur granda stultulo kiu ja povis esti dekkvinaĝa. Li eligis ŝrikojn, mi sendis lin ruliĝi surteren, saltis super li, turniris alian angulon, kaj pro feliĉa inspiro, ĵetis min ventraltere malantaŭ iun vendotablon. Preskaŭ tuj mi aŭdis paŝojn kuri laŭlonge de la vendotablo kaj preterpasi min; voĉoj kriis : 'Ĉiuj al la pordoj !' Kaj oni demandis tion kio okazis. Kaj oni interŝanĝis opiniojn pri la maniero kapti min.

"Kuŝanta sur la grundo, timeganta, mi estis perdinta mian memregadon. Tiel stranga kiel tio povas ŝajni, en tiu momento, ne prezentiĝis al mi ekpenso demeti miajn vestojn kiel mi devintus fari tion. Mi metis en mian kapon foriri kun ili, kaj tiu ideo sole regis min.

"Tamen, la ekzameno de la vendotabloj finiĝis per tiu

krio : 'Li estas tie !' Mi salte ekstaris, vigle kaptis seĝon kaj ĵetis ĝin en la kruojn de la stultulo kiu kriis; turnante min, mi renkontis alian ĉe la angulo de la galerio, mi sendis lin ruliĝi kaj rapide ekgrimpis la ŝtuparon. Tiu ĉi restariĝis, blekis ion kiel 'Al ! Al !' kaj fervorplene persekutis min kurante laŭ la ŝtuparo. Tute supre estis amase stakigitaj tiuj vazoj kun brilaj koloroj... vi bone scias, ĉu ne ?

- Artaj vazoj, sugestis Kempo.

- Jes, artaj vazoj. Mi turniris post la lasta ŝtupo, kaptis unu el iu stako kaj frakasis ĝin sur lian kapon, al tiu stultulo, kiam li alvenis ĝis mi. Sed la tuta stako da potoj renversiĝis : mi aŭdis kriojn kaj paŝojn ĉiuflanke venantaj. Mi pafis al la bufedo : tie estis viro blanke vestita, speco de kuiristo kiu, ankaŭ li, postkuris min. Lasta senespera ĉirkaŭiro : mi troviĝis meze de la lampoj kaj la ladaĵoj. Mi rifuĝis malantaŭ la vendotablon, atendis mian kuiriston, kaj ĝuste kiam li ekĵetiĝis, la unua el la atakantaro, mi donis al li per lampo, frontan baton kiu duige faldis lin. Li falis, kaj mi, buliĝante en mia kaŝejo, mi komencis senvestiĝi plej rapide kiel eble. Surtuto, jako, pantalonon, ŝuoj, tio bone glatis; sed iu subĉemizo el ŝafida lano algluiĝis al la korpo, kiel haŭto. Mi aŭdis alveni la aliajn; la kuiristo, svenbatita aŭ muta pro teruro, kuŝis senmova aliflanke de la vendotablo. Necesis ankoraŭfoje impeti kapkline, kiel kuniklo kiu eliras el amaso da lignaĵo.

"Mi aŭdis iun kriadi : 'ĉi-flanken, sinjoro policano !' Mi retroviĝis en mia vendejo de litaĵoj, poste en iu oceano da konfekcioj. Mi rapidegis tien, kuŝis min teren, formetis mian subĉemizon, post senfinaj tordiĝoj; kaj, senspira, frenezita, mi senĝene stariĝis ĝuste kiam la policano kaj tri komizoj turniris angulon. Ili sin ĵetis sur mian subĉemizon kaj mian kalsonon; ili ekprenis mian pantalonon. Unu el la junuloj ekkriis : 'Li forlasas sian ŝtelaĵon.! Li certe estas en la



ĉirkaŭaĵo !...' Sed tamen, oni tute ne malkovris min. Mi tie restis dum momento vidante ilin kiu serĉis min, kaj malbenante la malbonsorton kiu perdigis al mi miajn vestaĵojn. Poste mi reiris al bufedo, trinkis iom da lakto, kaj sidiĝis apud la fajrujo por ekzameni la situacion.

"Baldaŭ alvenis du dungitoj kiuj komencis babili pri la afero kun multe da vikleco kaj kiel stultuloj kiujn ili estas. Mi aŭdis tre troigitan raporton pri miaj damaĝoj, poste pri la konjektoj pri la loko kie mi povis fakte esti. Tiam mi denove rekomencis projekti. La nesuperebla malfacilaĵo, ĉi tie, ĉefe nun kiam la alarmo estis sonigita, estis kunpreni kion ajn. Mi malsupreniris al la vendejo por vidi, ĉu ekzistis rimedo fari pakaĵon kaj surskribi adreson; sed mi ne povis diveni kiel funkciis la kontrolon. Ĉirkaŭ la dekunua, la neĝo degeliĝanta laŭmezure kiam ĝi falis, la tago estante pli bela kaj iom pli varma ol la antaŭa, mi diris al mi ke, evidente, estis nenio ĉi tie por esperi por mi, kaj mi eliris, ankoraŭ furiozita pro mia malbona ŝanco kaj havante cetere en la kapo nur la pli konfuzajn intencojn.

## 23 \_ La butiko de galerio Druri.

- Vi devas komenci kompreni ĉiujn malavantaĝojn de mia kondiĉo. Mi estis sendoma, sen io por kovri min; havigi al mi vestaron, estis oferi ĉiujn miajn avantaĝojn, estis fari pri mi strangan kaj teruran monstron. Plie, mi fastis, ĉar manĝi, plenigi al mi la stomakon per nutraĵoj kiuj ne estus tuj asimilitaj, tio estis refariĝi videbla, kaj laŭ groteska maniero.

- Mi ne pensis pri tio, diris Kempo.

- Ankaŭ mi !... La neĝo informis min pri alia speco de danĝero. Mi ne povis iri eksteren dum neĝado : akumulante sin sur mi, ĝi rivelintus min. La pluvo, ĝi ankaŭ, farintus pri mi fluetantan silueton, brilan homan ŝajnon, fantazian vezikon... Kaj la nebulo !... Mi estus, en la nebulo, fantomo, eĉ pli subtila, konfuza aludo de homeco. Cetere, en plena aero - en la aero de Londono ! - mi kolektis koton sur miajn maleolojn, karbofumojn kaj polvon sur mia haŭto. Mi ne povis scii post kiom da tempo, per tio mem, mi fariĝus videbla, sed mi klare vidis ke tio ne estus longa.

- Do ne resti en Londono, neniapreze.

- Mi atingis la antaŭurbojn, direkte al la strato Granda Portlando, kaj troviĝis ĉe la fino de la strato kie mi estis loĝanta; mi ne eniris tien, la homamaso restadis antaŭ la ankoraŭ fumantaj ruinoj de la domo kiun mi bruligis. La plej urĝa por mi estis akiri vestaĵojn. Mi tiam ekvidis, en unu el tiuj malgrandaj butikoj kie estis ĉio - .. ĵurnaloj, bombonoj, ludiloj, papervaroj, akcesoraĵoj de la lasta karnavalo, ktp, ktp - grandan sortimenton de maskoj kaj falsaj nazoj : mi rememoras pri la ideo kiun sugestis al mi la amuziloj de la Holdingo. Mi nun havis celon : Mi direktis min, farante

ĉirkaŭvojojn por eviti la trafikplenajn stratojn, al la stratetoj norde de la Strando; mi memoris ke pluraj teatrotajloroj havis siajn butikojn en tiu parto, sen bone scii kien.

"Estis malvarme; la stratoj estis balaitaj per pika vento el nordo. Mi rapide paŝis por ne esti reatingita. Ĉiu trairenda vojo konsistigis danĝeron, ĉiu pasanto estis atente observenda. Iu viro, ĝuste kiam mi estis preterpaŝonta lin, fine de la strato Belforto, subite turnis sin, venis al mi, kaj sendis min ruliĝi sur la ŝoseon, preskaŭ sub la rado de fiakro. La tuta vico da koĉeroj opiniis ke li mem ricevis kvazaŭ baton. Mi estis tiom konsterninta pro tiu ĉi renkonto ke mi eniris en la bazon de la Monaĥeja ĝardeno kaj eksidiĝis dum momento, anhelante kaj tremante, en trankvila angulo, apud montrilo de violoj. Mi ekkomprenis ke mi denove malvarmumis, necesis turni min de tempo al tempo por ne altiri la atenton pro miaj ternoj.

"Fine, mi atingis la celon de miaj esploroj : iu naŭza butiketo, en malbona stato, en izolita strato, apud la galerio Druri, kun montrofenestro plena da roboj kun brilaĵetoj, da falsaj juveloj, da perukoj, da pantofloj, da domenoj kaj da fotografioj de aktorinoj. La butiko estis je la malnovtempa modo, malalta kaj malluma; supre, kvar nigraj kaj malĝojaj etaĝoj. Mi scivoleme rigardis tra la vitro kaj, vidinte neniun ene, mi eniris. La pordo, malfermiĝante, tintigis sonorileton; mi lasis ĝin malfermita kaj turnis ĉirkaŭ manekeno kiu portis fadenmontran kostumon, en iu angulo, malantaŭ iu tualetspegulo. Dum ĉirkaŭ minuto, neniu venis, poste mi aŭdis pezajn paŝadojn trairi la ĉambron, kaj viro aperis en la butiko.

"Mia plano estis perfekte fiksita. Mi intencis eniri en la domon, kaŝi min supre de la ŝtuparo, atendi mian horon kaj kiam ĉio estos trankvila, priserĉi tie ene, preni perukon,

maskon , okulvitrojn, kostumon, kaj poste iri tra la mondo, ulo eble groteska, sed finfine akceptebla. Incidente, mi povus trovi en la domo kelkan tre utilan monon.

"La viro kiu ĵus eniris estis malgranda, iomete ĝiba, kun dikaj brovoj, longaj brakoj, mallongaj kaj torditaj kruroj. Ŝajne mi interrompis lian manĝon. Li rigardis tute ĉirkaŭ si, kun iu atenda mieno. Li unue esprimis iun surprizon, poste la kolero, vidante sian butikon malplena. "Damnaj bubaĉoj !" li ekkriis. Post ekrigardo sur la strato, dekstren, maldekstren, li reeniris, refermis la pordon per piedbato, kun evidenta ĉagreno, kaj grumblante revenis al tiu kiu kondukis internen.

"Mi antaŭeniris por sekvi lin; pro la bruo kiun mi faris, li tuj ekhaltis. Mi same ekhaltis, mirigita de la akreco de lia orelo. Li frapfermis la pordon antaŭ mia nazo...

"Mi hezitis. Subite mi aŭdis reveni hastajn paŝojn kaj la pordo malfermiĝis. Li tie restis stare, rigardante tute ĉirkaŭ si en la butiko, kiel viro kiu estis ne ankoraŭ konvinkita. Poste. mem parolante, li serĉis malantaŭ la vendotablo, poste malantaŭ kelkaj mebloj. Kaj denove, li haltis, hezitema. Sed li lasis malfermita sian pordon : mi enŝoviĝis en la postbutikon.

"Ĝi estis stranga ĉambro, malriĉe meblita, kun amaso da maskoj en iu angulo. Sur la tablo, la matenmanĝo interrompita : estis furioze incitega afero por mi, Kempo, esti spiranta lian kafon restante senmova dum li eniris, kaj rekomencis sian manĝon. Liaj sintenadoj ĉe la tablo estis agacaj.

"Tri pordoj rigardis al tiu malgranda ĉambro, unu kondukanta al la supra etaĝo, alia malsupren; sed ĉiuj estis fermitaj. Mi do ne kapablis eskapi tiel longe li estis tie. Mi apenaŭ povis moviĝi, pro lia vigleco, kaj mi ricevis aerblovon en la dorso. Dufoje mi bridis terson ĝustatempe.

"Miaj impresoj de simpla spektanto estis sendube

scivolemaj kaj novaj; sed pro ĉio tio, mi troviĝis ekstreme laca kaj malpacienca longe antaŭ ol li finis manĝi. Tamen, la manĝo atingis finon. Estante metinta sian mizeran vazaron sur la stana pleto kie estis la tekruĉo, estante kolektinta la panerojn en lia buŝtuko makulita de mustardo, li kunportis ĉion. Lia ŝarĝo malebligis lin fermi la pordon malantaŭ li kiel li certe ne malfaris tion sen ĝi - mi neniam vidis lian similaĵon por fermi la pordojn ! - kaj mi sekvis lin en tre malpuran kuirejon, subteretaĝen, kaj en malgrandan provizejon. Mi plezuris vidi lin eklavi lian vazaron; sed opiniante ne bone resti malsupre kaj la kahelaro estanta ne varma al miaj piedoj, mi resupreniris kaj sidiĝis sur la seĝon de la viro, apud la fajrejo. La fajro apenaŭ brulis : preskaŭ sen pensi pri tio, mi remetis iom da karbo. La bruo resuprenirigis tujtute mian gastiganton kaj li restis konsternita. Li realigis la inspektadon de la tuta ĉambro kaj eĉ ne multe mankis ke li tuŝis min. Eĉ post tiu esploro, li ŝajnis nur duonkontenta : li haltis ĉe la sojlo, kaj antaŭ remalsupreniri, li ekrigardis ronde. Mi tie atendis dum jarcento. Li fine revenis kaj malfermis la pordon, kiu kondukis al la supra etaĝo. Mi ŝteliris malantaŭ li, tuj apud.

"Sur la interŝtuparo, li subite haltis, tiel neatendite ke mi estis tuj falonta sur li. Li tie estis, rigardante malantaŭe, rekte en mia vizaĝo, kaj streĉante la orelon. 'Mi ĵurintus... ', li eligis. Lia longa kaj vila mano tiris lian malsupran lipon; liaj okuloj iris de supre malsupren la ŝtuparon; li grumblis, poste reekis supreniri.

"Jam lia mano estis sur la manilo de pordo kiam li denove haltis, kun la sama esprimo de maltrankvilo kaj de kolero sur la vizaĝo. Li ekrimarketis, ne for de li, la negravan bruon de miaj movadoj : necesas ke ĉi tiu homo estis havanta la orelon ege akra !... Subite li ekfurioziĝis : 'Se estis iu tie ĉi...' li kriis kun sakraĵo, kaj la frazo restis

nefinita. Li enŝovis lian manon en sian poŝon, ne trovis tion kion li serĉis kaj pasante apud mi kiel ventoblovo, kun batalema mieno, li subite falruliĝis la ŝtuparon. Anstataŭ sekvi lin, mi sidiĝis sur la lasta ŝtupo kaj atendis lian revenon. Li baldaŭ reaperis, ankoraŭ grumbladante. Li malfermis la pordon de sia ĉambro kaj antaŭ ol mi povis eniri, frapfermis ĝin en mian vizaĝon.

"Mi decidis esplori la domon kaj mi bezonis pro tio kelkan tempon, atentema fari la malplej da bruoj kiel eble. Ĝi estis tre malnova, tre kaduka, atakita de ratoj, tiom malseketa ke la tapeto en la mansardo, malgluiĝis de la muroj. La plimulto da maniloj de pordo estis malfacila kaj mi timis turnante ilin. Pluraj el la ĉambroj kiujn mi vizitis, ne estis meblitaj; aliaj estis ĵetkovritaj de teatraj vestaĵoj, brokante aĉetitaj, prijuĝante laŭ la aspekto. En unu, najbara de tiu kiun li okupis, mi trovis multe da malnovaj ĉifonaĵoj: mi priserĉis ene, kaj tiom bone vigliĝis ĉe tiu tasko ke mi ankoraŭ forgesis la evidentan akrecon de lia orelo. Mi distingis kaŝemajn paŝojn kaj, ĝustatempe suprenrigardinte, mi vidis lin kiu pasis la kapon kaj rigardis la senordan amason, malnovan revolveron el antikva formo enmane. Mi staris tute senmova dum li rigardis suspekteme ĉirkaŭ si, kun la buŝo malfermita. 'Devas esti ĝin', li diris malrapide, 'Dio damnu ĝin !...'. Li trankvile refermis la pordon; mi aŭdis la ŝlosilon turniĝi en la seruro poste, la paŝoj malproksimiĝis. Mi subite komprenis ke mi estis enfermita. Dum minuto, mi retropaŝis, mi restis perpleksa. Iu koleratako kaptis min; sed mi decidis unue trarigardi la vestaĵojn. Nu, ĉe mia unua provo, iu pakaĵo falis el alta breto. Tio revenigis mian bonulon, pli minaca ol neniam. Tiufoje, li vere tuŝis min, saltis dorsen kun surprizo kaj staris mirkonsternita meze de la ĉambro.

"Tamen li kvietiĝis: 'Estas la ratoj!' li mallaŭte eligis, kun fingro sur la buŝo. Li tamen estis iom konsternita. Mi

eliris elŝoviĝante oblikve el la ĉambro; sed la pargeto ekkraĥis. Tiam tiu ĉi infera kruduleto ekĵetigis tra la domo, revolveron enmane, fermante la pordojn unujn post la aliajn kaj enpoŝigante la ŝlosilojn. Kiam mi komprenis tiun kiu estis lia celo, mi ekfuriozis : mi apenaŭ sufiĉe regis min por atendi la bonan momenton. Tamen, mi rimarkis ke li estis sola en la domo : tiam, mi tute ne hezitis, mi frapis sur la kapon.

- Sur la kapon ? ekkriis Kempo.

- Jes, mi svenigis lin... kiam li malsupreniris la ŝtuparon. Mi frapis lin de malantaŭe per skabelo kiu estis sur la ŝtuparplaceto. Li ruliĝis ĝis malsupre kiel sako da nenovaj botoj.

- Sed, pripensu ! la plej vulgara humaneco...

- Ĉio tio fakte estas bonega por la popolamaso !... Sed la problemo por mi, Kempo, estis eliri el tiu ĉi domo sub alivestiĝo sen ke li vidu min; kaj mi ne havis alian rimedon sukcesi tion. Mi buŝoŝtopis lin per veŝto Ludoviko la XVIa kaj mi ligis lin en iu drapo.

- Vi ligis lin en drapo !

- Mi faris de li ian pakaĵon. Estis sufiĉe bona ideo timigi kaj silentigi tiun idioton; vere estis amasega malhelpaĵo tiri min el embaraso... Kara Kempo mia, ne estas bone rigardi min kvazaŭ mi murdis. Li, li havis revolveron. Se, hazarde, li vidis min, li kapablis...

- Sed ankoraŭ !... diris Kempo. En Anglio ! Niaepoke !... Finfine, tiu homo estis hejme; kaj vi, vi fakte estis priŝtelanta lin.

- Priŝtelanta lin ? Dio mia, Dio mia ! Vi baldaŭ nomos min ŝteliston !... Certe, Kempo, vi ne estas sufiĉe naiva por enfali en la malnovaj antaŭjuĝoj. Ĉu vi imagas mian situacion ?

- Kaj la lian !

La nevidebla viro interrompiĝis kun turmentita mieno :

"Kion vi volas diri ?"

La vizaĝo de Kempo iĝis iom senindulga. Li estis parolonta, sed li detenis sin.

- Ĉion konsiderante, li eligis kun subita ŝanĝo, mi pensas ke necesis paŝi. Vi estis en senelirejo. Sed plie...

- Evidente, mi estis en kaptilo, en terura senelirejo ! Kaj necesas ankaŭ diri ke tiu viro furiozigis min, pro persekuti min ĉien en sia domo, pro gestadi kiel frenezulo kun sia revolvero, pro fermi kaj malfermi ĉiujn siajn pordojn. Li tutsimple incitegis. Vi tute ne mallaŭdas min, ĉu ne ? Vi ne riproĉas min ?

- Mi neniam kondamnas iun, respondis Kempo. Tio ne plu decas... Kaj poste ?

- Mi malsatis. Malsupre, mi trovis panon kaj fromaĝon kiu forte odoris : estis pli ol necesis por kontentigi mian apetiton. Mi trinkis iom da brando kun akvo. Poste mi reiris pasante super la sako, li ankoraŭ kuŝis tie senmove - mi reiris al la ĉambro kun malnovaj vestaĵoj. Ĝi rigardis al la strato; du kroĉetitaj kurtenoj, nigraj pro malpureco, ornamis la fenestron. Mi iris rigardi tra ilin : ekstere, la tago estis lumplena, blindiga, kontraste al la ombroj de la veaspekta domo kie mi troviĝis. La trafiko estis aktiva : ĉaretoj da fruktoj, fiakro, veturilo kun pakaĵportilo kovrita de kestoj, ĉareto de fiŝvendisto.... Kiam mi turnis min, koloraj makuloj ŝvebis antaŭ miaj okuloj sur la mebloj kovritaj de ombro. Post mia agitado, nun postvenis klaran komprenon de la aferoj. La ĉambro estis plena de malforta odoro de benzeno, uzata, mi supozas, por purigi la vestaĵojn.

"Mi konvene komencis hejman viziton. Mi kredemas ke la ĝibulo sole vivis en sia domo ekde kelka tempo. Estis kurioza ulo... Ĉio ajn kio povis esti utila al mi, mi kolektis ĝin en la lokon de la ĉifonaĵoj kaj tiam faris seriozan elekton. Mi trovis valizon kiun mi juĝis interesa havi, poste pulvon,



pudron, anglan tafton, ktp, ktp

"Mi pensis ŝminki min, pudri mian vizaĝo kaj miajn manojn, ĉion kiun sin montris de mia persono por revidebliĝi; sed la malavantaĝo estas ke poste, necesintus al mi terebintinon kaj aliajn drogojn, kaj mi ne scias kiom da tempo, por denove malaperi. Fine, mi decidis elekti nazon el la plej bona speco - iomete groteska, eble, sed ne pli ol tiu de multaj estuloj - nigrajn sunokulvitrojn, griziĝantajn vangharojn kaj perukon. Subvestoj, ne ekzistis; sed mi povis aĉeti tion pli poste, kaj nuntempe, mi vindis min per domenoj el kotono kaj koltukoj el kaŝmiro. Mi ne trovis ŝtrumpetojn, sed la botoj de la ĝibulo sufiĉe bone taŭgis al mi, kaj tio sufiĉis. En la butika kaso, tri suverenojn kaj la ĉirkaŭan valoron de tridek ŝilingoj per arĝentaj moneroj; en iu ŝranko kies seruron mi rompis, en la postbutiko, ok orajn sterlingojn. Tiel provizinta, mi povis fari mian eniron en la mondo.

"Tamen mi havis strangan heziton. Ĉu mia eksteriĝo estis akceptebla? Mi ekzamenis min per malgranda spegulo, rigardante min je ĉiuj flankoj por malkovri ian forgeson; ĉio ŝajnis al mi taŭga. Mi estis groteska kiel povas esti iu aktoro, iu teatra avarulo, sed fine mi ne estis fizika monstraĵo. Rekaptante konfidon, mi malsuprenigis mian spegulon en la butikon, kaj la rulkurtenoj levitaj, mi denove ekzamenis min zorge per la tualetspegulo kiu estis en la angulo.

"Mi bezonis iom da tempo por kolekti mian kuraĝon per ambaŭ manoj. Poste, mi malfermis la pordon kaj antaŭeniris en la straton, lasante la etan viron liberigi sin de sia drapo kiel li dezirus tion. Post malpli ol kvin minutoj mi trainis dekduon da stratoj kiuj apartigis min de la butiko kaj de la kostumisto. Neniu ŝajnis tro aparte rimarki min. La lasta malfacilaĵo ŝajnis bone supervenkita.

Grifino denove haltis.

- Kaj ĉu vi ne pli multe maltrankviliĝis pri via ĝibulo ?  
demandis Kempo.

- Ne. Kaj mi ne scias tion kio li fariĝis. Mi imagas ke li malligis sin, aŭ per siaj manoj, aŭ svingiĝante. La nodoj estis sufiĉe streĉitaj.

Li silentis, iris al la fenestro kaj rigardis eksteren, rigide.

- Kaj kion okazis kiam vi alvenis al la Strando ?

- Ho ! Novan seniluziiĝo. Mi kredis esti ĉe la fino de miaj klopodoj. Praktike, mi opiniis povi senpune fari ĉion kion mi volus, ĉion... krom perfidi mian sekreton ! Estis mia ideo. Kion ajn mi farus, kioj ajn povus esti la konsekvencoj, ne gravas por mi : Mi devis nur formeti miajn vestaĵojn por malaperi. Neniu kapablas kapti min. Mi povus preni monon kie mi povus trovi ĝin. Mi decidis pagi al mi pompan festeno, poste engastiĝi ĉe bonan hotelon kaj tie amasigi novan vestaĵaron. Mi estis plena de miriga memfido; mi estis naivega - ne estas precize agrabla al mi memori tion. Mi eniris en restoracion, kaj jam mi mendis mian tagmanĝon kiam prezentiĝis al menso ke mi ne kapablis manĝi sen vidigi mian nevideblan vizaĝon. Mi interrompis mian mendon, diris al la ĉefkelnero ke mi revenos post dek minutoj, kaj mi eliris streĉita. Mi ne scias ĉu via apetito neniam estis tiamaniere desaporita ?...

- Ne tute per tiel malagrabra maniero, respondis Kempo. Sed mi povas imagi tion...

- Mi plezure strangolintus la stultulojn kiuj ĝenis min. Fine, ne plu kapablante elteni bezonon de bongusta manĝaĵo, mi direktis min aliloken kaj petis individuan ĉambreton. "Mia vizaĝo estas, mi diris, difektita laŭ terura maniero". Oni rigardis min kun sciavideco; sed finfine, ne estis ilia afero, kaj mi tiel sukcesis ricevi mian tagmanĝon. Ĝi ne estis tre

bona, verdire, sed sufiĉis. Poste mi restis por fumi cigaron kaj por starigi al mi iun kampanjan planon. Ekstere, neĝoŝtormo komenciĝis.

"Ju pli mi pensis pri tio, Kempo, kaj des pli mi komprenis kiun nekontesteban sensencaĵon, iu nevidebla viro estis, sub malvarma kaj malpura klimato, en homplena civilizita urbo. Antaŭ tiu freneza eksperimento, mi revis pri ĉiuj avantaĝoj de la mondo. Ĉi tiun posttagmezon, ĉio estis nur elreviĝo. Mi resumis ĉiujn aferojn kiujn homo konsideras kiel dezirindajn. Estas eksterdube ke la nevidebleco ebligis min atingi ilin; sed ĝi ĵetis min en la neebleco ĝui ilin tuj kiam mi akirintus ilin. Por la ambicio, por la orgojlo de kiu premio ekzistas loko kie estas ne permesita al vi montriĝi? De kiu valoro estas la amo de virino kiam ŝi povas nur nomiĝi Delila? Mi cetere ne havas inklinon por la politiko, por la malsaĝecoj de fameco, nek por la filantropo, nek por sporto. Kion mi estis faronta? Mi fariĝis mistero vestinta, karikaturo de homo, tute en vindo kaj en bandaĝoj.

Li interrompiĝis; per lia sinteno oni povis diveni ke liaj okuloj vagis al la fenestro.

- Sed kiel vi alvenis al Iping? Kempo demandis, atenta por okupi sian gaston, por ankoraŭ paroligi lin.

- Mi iris tien por labori. Mi havis esperon. Estis ideoĝermo! Mi ankoraŭ havas ĝin, sed nun estas matura ideo. Maniero retropaŝi! Ripari tion kion mi faris... Kiam tio plaĉos al mi!... Kiam mi estos farinta ĉion kion mi volas fari okaze de mia nevidebleco... Estas ĉefe pri tio kion mi volas nune paroli kun vi.

- Ĉu vi tutrekte iris al Iping?

- Jes. Mi devis nur kunpreni miajn tri volumojn de notoj kaj mian ĉekaron, mian valizon kaj tolaĵon kaj fariĝi al mi kvanto da kemiaĵoj por efektiviĝi mian ideon - mi montris al vi la kalkulojn ekde kiam mi retrovos miajn librojn - kaj mi

foriris. Dio mia ! Mi memoras tiun ŝtormon kaj la damnitan klopodon kiun mi havis por malhelpi la neĝon tramalsekigi mian nazon el kartono...

- Fine, diris Kempo antaŭ du tagoj, kiam oni malkovris vin, vi estis plivole... se mi kredas la ĵurnalojn...

- Jes, pli ĝuste... ĉu mi mortigis tiun stultulon de policano ?

- Ne... oni kredas ke li resaniĝos.

- Li do ŝancis. Mi tute malpacienciĝis. La idiotoj ! Ĉu ili ne povis lasi min trankvile ? Kaj tiu krudulo de nutraĵvendisto ?

- Li ne estas en mortdanĝero.

- Mi scias nenion pri mia trampo, aldonis la nevidebla viro kun zorgiga rido. Antaŭ Dio, Kempo, la homoj kun via karaktero ne scias tion kio estas la kolero !... Esti laborinta dum jaroj, esti planinta projektojn, skizojn, kaj tiam trovi iun stultegulon, mallerta kaj blinda, kiu venas ĵeti sin transverse de via kariero !... Ne ekzistas stultulo kiu naskiĝis por ne malutili al mi... Se mi ankoraŭ longe restus en tiu reĝimo, mi freneziĝus kaj frapus en la amason... Jam, ili faris al mi la aferojn miloble pli malfacilajn !...

## 24 \_ Abortita projekto.

- Nun, daŭrigis Kempo strabe rigardante tra la fenestro, kion ni estas farontaj ?

Li proksimiĝis al sia gasto por eviti ke tiu ĉi povu subite ekvidi la tri virojn kiuj alvenis, grim pantaj kun netolerebla malrapideco, ŝajnis al li, la deklivon de la monteto.

- Kion vi intencis fari kiam vi direktis vin al Haveno Arkteo ? Ĉu vi havis kelkan projekton ?

- Mi tien iris por eliri el la lando; sed mi ŝanĝis miajn planojn ekde kiam mi vidis vin. Mi pensis ke estus saĝa, nun ke estas varme kaj ke mi povas resti nevidebla, atingi la Sudon. Des pli ke mia sekreto estis konata, kaj ke ĉiu estus embuskanta, gvatanta kontraŭ la envolvita kaj maskita viro. Vi havas linion de vaporŝipoj por Francio : mia ideo estis enŝipigi min ĉi tie kaj preni la riskojn de la transpaso. De tie, mi povus iri per la fervojo en Hispanion, aŭ eĉ daŭrigi ĝis Alĝerio. Tio ne estus malfacila. Tien, iu homo povus restadi ĉiam nevidebla kaj tamen vivi, sen sidi senfara. Kaj mi uzis tiun trampon kiel monkeston kaj ŝarĝiston ĝis mi trovintus la eblon unuatempe sendi miajn librojn kaj miajn aferojn.

- Bonege, mi komprenas.

- Kaj tiam, okazis ke tiu aĉa ŝtipkapulo provis priŝteli min ! Li kaŝis miajn librojn, Kempo ! Kaŝitaj miaj libroj !... Se mi iam sukcesos ekkapti lin !... Tio kio estas plej bone por fari, estas unue repreni al li la librojn. Sed kie li estas ? Ĉu vi scias tion ?

- Li estas ĉe la urba policejo, ŝlosita laŭ sia propra peto en la plej fortika tiea ĉelo.

- La fripono !

- Tio iom malfruigas vi.

- Necesas ke ni havu tiujn librojn; ili havas gravegan intereson.

- Certe ! eligis Kempo kiu demandis al si, iom nervoza, ĉu li ne aŭdis paŝojn eksteren. Certe, necesas ke ni havu tiujn librojn. Sed tio ne estos tre malfacila se li ne scias tion kion tiuj libroj elvokas por vi.

- Ne, li ne scias tion, diris la nevidebla viro, kaj li ekpripensis.

Kempo penis imagi ion por pluigi la konversacion kiam Grifino reparolis per si mem :

- La fakto ke mi tiel ekalvenis en via domo, Kempo, ŝanĝas ĉiujn miajn planojn ĉar vi ja estas kapabla kompreni. Malgraŭ ĉio kio okazis, malgraŭ tiu publikeco, malgraŭ la perdo de miaj libroj kaj ĉio kiun mi suferis, spite ĉio, restas al mi la eblo fari grandajn aferojn, grandegajn aferojn... Ĉu vi ne diris al iu ke mi estis ĉi tie ? li abrupte demandis.

Kempo hezitis.

- Tio estas evidente, li diris.

- Al neniu ? Grifino insistis.

- Eĉ ne unu homo !

- Ha ! Nu...

La nevidebla viro ekstaris kaj, pugnoj sur la koksoj, li paŝegis en la ĉambreto.

- Mi faris azenaĵon, Kempo, gravan azenaĵon, alpaŝante al la eksperimento per mi tute sola. Mi perdis miajn fortojn, tempon, okazojn. Sole ! Ha ! Kiel homo kapablas nur malmute da afero ! Kelkajn bagatelajn ŝtelojn, kelkajn malgravajn perfortaĵojn, kaj tio estas ĉio... Tio kion mi volas, Kempo, estas iu por subteni min, por helpi min, kaj kaŝejo ien kie mi povas dormi, manĝi, ripozi kviete kaj sen esti suspektita. Necesas al mi asistanto. Kun partnero, kun la manĝo kaj la ripozo certigitaj, ekzistas mil aferoj kiujn mi povas fari. Ĝis nun, mi manovris nur per konfuzaj donitaĵoj.

Ni devas konsideri ĉion kiun la nevidebleco inkludas kaj kiun ĝi tute ne inkludas. Ĝi konstituas tre malgrandan avantaĝon por tiu kiu volas subaŭskulti malantaŭ pordoj, ekzemple, ĝi ne malhelpas vin bruigi. Malgranda avantaĝo, ankoraŭ, tre malgranda... nu, ni koncedu !... en ŝtelo kun enira rompo, ktp. Iam kiam vi kaptis min, vi povas facile enprizonigi min. Jes, sed aliflanke, mi estas malfacila por kapti... Fakte, tiu nevidebleco estas bona nur por du kazoj : ĝi estas utila por la fuĝo, ĝi tiel ankaŭ estas por la alproksimiĝo. Ĝi do estas aparte utila por mortigi. Mi povas ĉirkaŭiri iun homon, kiu ajn armilon li havus, elekti la punkto, frapi kiel mi volas, eviti kiel mi volas, elŝteliĝi kiel mi volas.

Kempo metis la manon al siaj lipharoj. Ĉu oni moviĝis malsupren ?

- Mortigi, jen tio kiun ni devas fari, Kempo.

- Jen tio kiun ni devas fari, mortigi... Mi aŭskultas vin, Grifino, sed mi ne diras jes, estu atente. Kial mortigi ?

- Ne senutila murdo, ne; sed saĝa masakro. La demando, jen ĝi : oni scias, kiel ni mem scias tion, ke estas nevidebla viro, kaj tiu nevidebla viro, Kempo, devas nun estigi la regadon de teruro. Jes, sendube, tio tremetigas; sed mi bone diras : la regadon de teruro. Necesas ke li prenu kelkan urbon, tiel kiel via Arkteo, teruru ĝin kaj mastru ĝin. Necesas ke li daktu siajn ordonojn, li povas fari tion laŭ mil manieroj... paperĉifaĵoj glititaj sub la pordoj povas sufiĉi. Kaj kiu ajn malobeus liajn ordonojn, li devas mortigi lin, kiel ankaŭ kiu ajn venus al helpo de ribelulo.

- Hm ! Hm ! eligis Kempo malpli atenta al babilado de Grifino ol al bruado de la enira pordo, malfermita poste fermita. Ŝajnas al mi, Grifino, li diris, por maski sian malatenton, ke via asistanto estus en malfacila pozicio ?

- Neniu scius ke li estas mia asistanto, vige rebatis la nevidebla viro; poste, subite : ŜŜ !... Kio do okazas

malsupren ?

- Sed nenio, respondis Kempo, ekparolante laŭte kaj rapide. Mi ne diris jes, Grifino. Bone aŭskultu min, mi ne diris jes. Kial revu ludi tian partion kontraŭ sia raso ? Kiel vi povas esperi trovi feliĉon tie ? Ne estu do soleca lupo ! Publikigu viajn rezultojn; diru al la mondo, diru almenaŭ al la nacio vian konfidencan. Pensu pri tio kiun vi povus akiri kun miliono da helpantoj...

La nevidebla viro interrompis lin kaj la brakon etenditan : "Estas paŝoj kiuj supreniras !"

- Nu do !

- Lasu min vidi.

Kaj li direktis sin, la brakon etenditan, al la pordo.

Tiam la okazaĵoj akceliĝis. Kempo hezitis dum sekundo, poste moviĝis por bari al li la vojon. La nevidebla viro ekstremitis, poste restis senmova.

- Perfidulo ! kriis la voĉo.

Kaj subite la noktosurtuto malfermiĝis kaj eksidante Grifino komencis senvestiĝi.

Kempo rapide iris tri paŝojn al la pordo. Tuj la nevidebla viro - siaj kruroj jam malaperis - ekstaris eligante krion. Kempo vigle malfermis la pordon.

Tiumomente oni aŭdis, venante el malsupre, bruon de voĉo kaj de hastemaj paŝadoj.

Per rapida movado, Kempo retropuŝis la nevideblan viron, li eksaltis flanken, refermis fortege la pordon malantaŭ li. La ŝlosilo estis ekstere, tute preta. Iun plua momenton, kaj Grifino estintus sola, kaptita en la kabineto de la belvedero, sen iu malgranda incidento : la ŝlosilo ĉimatene estis haste enŝovita en la seruro; Kempo, abrupte tirante la pordon, faligis ĝin sur la tapiŝon.

Li paliĝis. Li alkrampiĝis per ambaŭ manoj al la manilon. Momenton, li eltenis. Poste, la pordo malfermiĝis je ses



coloj [ $\pm 15\text{cm}$ ], sed li sukcesis refermi ĝin. La duan fojon, okazis interspaco larĝe de unu futo [ $\pm 30\text{cm}$ ] kaj la noktosurtuto aperis, enŝovis sin en la aperturon; Kempo estis kaptita ĉe la gorĝo de nevideblaj fingroj, kaj li maltenis la manilon por defendi sin. Li estis forpuŝita, faligita per stumbligo, krude ĵetita en angulon de la interŝtuparo. La malplena noktosurtuto falis sur lian kapon.

Duonvoje en la ŝtuparo troviĝis tiam la kolonelo Adai, la adresito de la letero de Kempo, la ĉefo de la Arktea polico. Li restis mirigata, stupora pro tiu subita vido : Kempo sekvita de tiu ĉi eksterkutima strangaĵo, iu malplena vesto kiu turniĝadas en aero. Li vidis Kempon puŝpelita, poste restariĝanta. Li vidis Kempon ŝanceliĝi, sin ĵeti antaŭen, denove fali, falegi kiel bovo.

Tiam, subite, li ankaŭ estis perforte frapita. Kaj de neniu ! Nenio ! Iu grandega pezaĵo, laŭ tio kio ŝajnis al li, saltis sur lin; oni kaptis lin ĉe la gorĝo, oni donis al li genuobaton en la ventro kaj li estis puŝpelita kapantaŭen en la ŝtuparon. Iu nevidebla piedo pasis sur lian dorson, la flugtuŝo de spirito falruliĝis la ŝtupojn; li aŭdis la du policanoj en la vestiblo, krii kaj kuri; la enira pordo fermiĝis bruege.

Li restariĝis tute konsternita. Li vidis Kempon kiu malsupreniris zigzagante, kovrita de polvo, hartaŭzita, kun iu flanko de la vizaĝo kontuzita, la lipo sanganta, tenante en siaj brakoj ruĝan noktosurtuton kaj kelkajn ĉifonaĵojn.

- Dio mia ! ekkris Kempo. Ĉio estas perdita ! Li forfuĝis.

## 25 \_ La ĉasado kontraŭ la nevidebla viro.

Dum kelkaj minutoj, Kempo nekapablis sciigi al kolonelo Adai tion kio ĵus okazis tiom rapide. Ili restis tie sur la interŝtuparo, ambaŭ. Kempo hastege parolis, kun la ridinda vestaĵo de Grifino ankoraŭ sur la brako. Tamen Adai baldaŭ komencis kompreni ion pri la situacio.

- Estas frenezulo, diris Kempo. Estas brutulo. Estas la personiĝinta egoismo. Li vidas nur sian propran intereson kaj sian saviĝon. Li ĉimatene prezentis al mi ĉiujn liajn egoismajn kaj brutalajn projektojn... Li vundis homojn; li mortigos aliajn, se ni ne sukcesos antaŭmalhelpi lin. Li vekos panikon. Nenio povas haltigi lin. Jen nun li, kuranta, furioza...

- Necesas kapti lin, eldiris la kolonelo. Estas evidenta.

- Jes, sed kiel ? ekkriis Kempo kun subite ideoplena kapo. Vi devas tuj agi pri tio. Necesas utiligi por tio ĉion kion ni havas kiel servokapablajn homojn. Necesas malhelpi lin forlasi la distrikton : tuj post sia eliro de tie, li povus kuri tra la tuta lando, laŭ sia kaprico, mortigante unu, kripligante alian. Li revas mi ne scias kiun regnon de la teruro ! De la teruro, mi diras al vi !... Necesas starigi viglecatenton en la stacidomoj, sur la vojoj, en la havenoj. Ni bezonas la helpon de la garnizono : vi estas telegrafonta por ke oni sendu al ni helpotrupon. La sola afero kiu povus retenigi lin ĉi tie estas la deziro reakiri iujn notlibrojn kiujn li rigardas kiel tre valoraj. Mi parolos al vi pri tio !... Estas viro ĉe la policejo, iu nomito Marvel...

- Mi scias, mi scias. Tiuj libroj... jes. Sed la knabego...

- Diras ke li tute ne havas ilin. Sed la alia estas persvadinta ke li havas ilin... La alian, necesas ke vi

malhelpus lin manĝi kaj dormi; tage kaj nokte, necesas ke la tuta lando starus kontraŭ li. Necesas ke ĉien, la provianto estu metita en sekureco, ŝlosita. Ĉiujn porvivaĵojn, por ke li estu devigata akiri tion perforte. Necesas ke ĉien, la domoj estu barikaditaj kontraŭ li... Estas la ĉielo kiu donas al ni malvarmajn noktojn kaj pluvojn. Necesas okazigi ĝeneralan batuon. Mi ripetas al vi, Adai, ke li estas danĝerulo, plago; ĝis li ne estos enkarcerigita, kaj en sekura loko. Estas timiga pensi pri ĉio kio povas okazi.

- Kion ni povas plie fari ? demandis la kolonelo.

Necesas ke mi tuj malsupreniru kaj ke mi faru miajn disponojn... Sed kial vi ne venas ?... Jes, venu ankaŭ ! Ni estigos ian militkonsilion... Prenu Hopso<sup>n</sup> por helpi nin... kaj la oficistojn de la fervojo. Evidente ! Urĝas. Nu, venu... ni babilos piedirante. Kion ni povas ankoraŭ fari ?... Liberigu do vin pri tiu noktosurtuto.

Kaj post tio, Adai antaŭiris. Malsupre, ili trovis la eniran pordon malfermita, kaj la policanoj lokitaj ekstere kiu, miregigitaj, vake rigardis en la aero.

- Li estas foririnta, sinjoro ! diris unu.

- Necesas tuj iri al la centra policejo. Unu el vi iru serĉi veturilon kaj realvenu kunpreni nin... vigle ! Kaj nun, Kempo, kion plie ?

- Hundojn. Kunprenu hundojn. Ili ne vidas lin, sed ili flaras lin. Prenu hundojn.

- Perfekte ! Oni ĝenerale ne scias tion, sed la gardistoj ĉe la malliberejo de Halstedo, elserĉas homon per spurhundoj !... Hundoj ! Kaj poste ?

- Ha ! memoru ke lia manĝado aperigas lin : post kiam li manĝis, siaj nutraĵoj estas videblaj ĝis ili estas asimilitaj. Tiel ke li bezonas kaŝi sin kiam li manĝas... Necesas senĉese batui. Ĉiuj densejoj, ĉiuj kaŝanguloj... Kaj ke oni metu ĉiujn armilojn en sekura loko. Li ne povas surhavi iun kun li

longatempe. Kaj ĉio, kion li povas kolekti por frapi, necesas kaŝi ĝin.

- Bone, tion... Ho ! Ni baldaŭ kaptos lin !

- Kaj sur la vojoj... aldonis Kempo.

Li hezitis.

- Nu do ?

- Pistita vitro !... Estas kruela, mi scias tion. Sed pensu pri tio kion li povas fari.

Adai sorbis aeron inter siaj dentoj.

- Aĉa homĉasado ! li diris. Finfine, mi ne scias. Mi tuj faros tamen prepari pistitan vitron. Se li troigas...

- Tiu viro eksterigis sin el la homaro, mi diras al vi. Li estigos la regnon de la teruro tuj kiam li estos superinta la emocion de la danĝero al kiu li ĵus eskapis. Mi certas kiel mi certas esti ĉi tie kaj paroli al vi. Ni havas ŝancon sukcesi nur se ni antaŭiĝos. Li mem detranĉis sin el la homa genro : ke lia sango falu sur lian kapon !

## 26 \_ Murdo de sinjoro Vikstido.

Estas tute oportune kredi ke la nevidebla viro, kiam li pafiĝis el la hejmo de Kempo, estis en plenfurioza stato. Iu malgranda infano, kiu ludis apud la pordo, estis sovaĝe levita de la tero kaj ĵetita flanken; li rompiĝis la maleolon kaj restis kelkajn horojn senkonscia. Neniu scias kien iris Grifino nek tion kion li faris; sed oni povas imagi lin kuranta, en tiu varma posttagmezo de junio, grimpanta la monteton, daŭriganta ĝis la duno kiu kuŝas malantaŭ Haveno-Arkteo, pensanta kun kolero, kun malespero, al lia netolerebla sorto, kaj fine, bolanta kaj laca, serĉanta ŝirmejon en la densejo de Hintondino, por tie kolekti liajn detruajn ideojn. Estas verŝajne tie kie li rifuĝis ĉar estas tie kie, ĉirkaŭ la dua, li evidentigis sian ekziston per nova atenco.

Oni sin demandas kiun povis tiam esti lia mensostato kaj kiujn projektojn li remaĉis en sia kapo. Neniu dubo ke li estis incitegita ĝis la frenezo de la perfido de Kempo; kaj kvankam ni povas kompreni per kiuj kialoj tiu ĉi alvenis al tiu ĉi mallojalaĵo, ni ankaŭ povas imagi al ni, kaj eĉ iom senti, la kolerego ke ĉi tiu surpriza provo devis inciti ĉe Grifino. Eble eĉ li rememoris siajn tiom mirindajn malsukcesojn de la strato Oksfordo : ĉar li evidente fidis al la kunlaboro de Kempo kiam li formis tiun subitan revon de terori la mondon. Ĉiaokaze, li malaperis antaŭ ĉiuj ĉirkaŭ tagmeze, kaj ne estas atestanto kiu povas diri tion kion li faris ĝis ĉirkaŭ la dua kaj duono : Eble feliĉa bonsorto por la homaro, sed fatala senagado por li.

Dum tiu tempo, pli kreskanta homamaso, disa tra la lando, ekserĉadis lin. Dum mateno, li estis ankoraŭ nur legendo, temo de timego; dum la tago, ĉefe dank'al proklamo

redaktita de Kempo per sekaj vortoj, oni bildigis lin al si kiel tuŝeblan malamikon kiun nepris vundi, kapti, venki, kaj la tuta lando komencis organiziĝi kun nekredebla rapideco. Je la dua, li povintus ankoraŭ forlasi la distrikton prenante kelkan trajnon; pli poste tio fariĝis neebla : ĉiuj pasaĝertrajnoj, ĉe ĉiuj linioj, en granda paralelogramo, de Sudampton al Vinĉestero kaj de Brajtono al Horŝam, havis liajn pordojn ŝlositaj, kaj la vartrafiko estis preskaŭ tute interrompita. Ĝis dudek mejloj [ $\pm 32\text{km}$ ] ĉirkaŭ Haveno-Arkteo, homoj armitaj per fusiloj kaj klaboroj baldaŭ estis tri- aŭ kvar-ope dispartigitaj, kun hundoj, por batui vojojn kaj kampojn.

Policianoj sur ĉevalo galopis sur ĉiuj vojoj de la regiono, haltante ĉe ĉiu dometo, invitante la homojn fermi siajn hejmojn, ne eliri sen esti armitaj; ĉiuj komunumaj lernejoj estis forpermesitaj je la tria, kaj la timigitaj infanoj kolektintaj en bandoj, haste rehejmeniris. La proklamo de Kempo, subskribita de la kolonelo Adai, estis afiŝita en preskaŭ la tuta distrikto ĉirkaŭ la kvara aŭ kvina : ĝi mallonge sed klare informis pri ĉiuj kondiĉoj de la komencita lukto, la bezono senigi la nevideblan viron de nutraĵo kaj de dormado, la neceso de senĉesa viglecatento kaj ĝi krome rekomendis viglan atenton al ĉio kio povus indiki la movadojn de la malamiko. Tiel senprokrasta, tiel decida estis la efiko de la aŭtoritatoj, tiel rapida, tiel universala estis la konvinko en tiu eksterordinara estulo, ke antaŭ la vesperiĝo, iu areo de pluraj centoj de kvadrataj mejloj [ $\pm 256\text{km}^2$ ] estis rigore sub sieĝostato. Ankaŭ antaŭ la noktiĝo, iu hororondo disvastiĝis tra la tuta singarda kaj nervoza loĝantaro; buŝ-al-buŝe, tien kaj reen, tra la tuta lando, diskoniĝis la rakonto pri la murdo de S<sup>ro</sup> Vikstido.

Se ni pravas supozi ke la rifuĝo de la nevidebla viro estis en densejo de Hintondino, ni devas ankaŭ supozi ke komence de la posttagmezo, li eliris eksteren kun projekto

kiu implicis la uzadon de armilo. Kiu estis tiu projekto ? Ni nescias tion; sed, almenaŭ laŭ mi, evidentas, per la pezega evidenteco, ke eĉ antaŭ renkonti Vikstidon, li enmane tenis la feran stangon. Komprenoble ni povas nenion scii pri la detaloj de tiu renkontiĝo. Ĝi okazis rande de sabletejo, je malpli ol du cent metroj de la ĉefa pordo de la parko de Lordo Arkteo. La piedpremita grundo, la multnombraj vundoj ricevitaj de S<sup>ro</sup> Vikstido, lia rompita marŝbastono, ĉio malkaŝas senesperan lukton; sed la kaŭzo de la atako, se ĝi ne estas krizo de murdema frenezo, neblas imagi ĝin. Vere, la versio de freneziĝo estas preskaŭ neevitebla.

S<sup>ro</sup> Vikstido, intendanto de Lordo Arkteo, estis viro de kvardek kvin aŭ kvardek ses jaroj, kun sendanĝeraj aspekto kaj kutimo, la lasta en la mondo kiu kapablis provoki tiel teruran kontraŭulon. Ŝajnas ke la nevidebla viro uzis kontraŭ li feran stangon detirita de rompita barilo. Li haltigis tiun viron kiu kviete rehejmeniris pro manĝa tempo; li atakis lin, paralizis liajn malfortajn sindefendojn, rompis al li la brakon, faligis lin kaj kaĉigis al li la kapon.

Evidente, li devis, antaŭ renkonti sian viktimon, ŝtelpreni tiun stangon de iu barilo; li devis enmane teni ĝin tutpreta. Nur du detaloj, krom tio kio jam estis konstatita, ŝajnas rilati al la afero. La unua estas ke la sabletejo ne estis sur la vojo kiun devis sekvi S<sup>ro</sup> Vikstido por rekte rehejmeniri, sed preskaŭ je ducent metroj ekstere. La dua estas la deklaro de knabineto kiu, irante por la vesperklaso, vidis la malfeliĉulon "trotantan" laŭ aparta maniero, tra kampo, direkte al la sabletejo. La pantomimo de tiu infano sugestas la ideon de viro postkuranta ion kiu fuĝas antaŭ li surtere, kaj sur kio li pli kaj pli forte frapas per sia bastono. Ŝi estis la lasta estulo kiu vidis Vikstido" vivanta. Li liberigis sin de ŝiajn okulojn nur por iri al la morto : la lukto estis kaŝita al la infanaj okuloj nur de bosketo de fagoj kaj

malprofunda kaviĝo de la tereno.

Kaj tio, almenaŭ laŭ mi, senhezite enfakigas la murdon ekster la krimoj plenumitaj sen kialo. Estas permesita kredi ke Grifino prenis tiun ĉi feran stangon kiel armilon, jes, sed sen iu ajn firma intenco uzi ĝin por mortigo. Vikstido, preterpasante, rimarkintus tiun stangon kiu moviĝis en la spaco laŭ neklarigebla maniero. Tute ne pensante pri la nevidebla viro - ĉar Haveno-Arkteo estas je dek mejloj [ $\pm 16\text{km}$ ] for - li postsekventus tiun stangon. Tre verŝajne, li eĉ ne aŭdis paroli pri la nevidebla viro. Oni povas konsekvence imagi tiun ĉi ekfuĝanta por eviti ke oni malkovras lian ĉeeston, kaj Vikstido<sup>n</sup>, scivoligitan, ligiĝantan al la postkuro de tiu objekto moviĝa, nekomprenebla, kaj fine frapanta lin.

Nenia dubo ke, en la ordinaraj cirkonstancoj, la nevidebla viro povintus facile postlasi la bravulon, iom mallerta, kiu persekutis lin; sed la pozicio kiel estis trovita la korpo de Vikstido, sugestas ke li misfortune senelirigis sian predon en angulon, inter du tufoj da urtikoj kaj la sabletejo. Por tiu kiu konas la eksterordinaran incitigemon de Grifino, la resto de la aventuro estas facila por reludi.

Sed estas nur hipotezo. La solaj nediskuteblaj faktoj (ĉar oni ne povas ĉiam plenfidi al rakontoj de infanoj), estas la malkovro de la korpo de Vikstido, tuj mortinta, kaj la malkovro de la fera stango makulita de sango, ĵetita meze de urtikoj. La forlaso de tiu stango de Grifino kredigas ke, sub la emocio de la afero, li rezignis pri la celo por kiu li prenis ĝin, kondiĉe ja ke li celis ion. Certe li estis ege egoista kaj senkora; sed la vido de sia viktimo, sanga kaj kompatinda ĉe liaj piedoj, povas remalfermigi en li delonge entenatan fonton de rimorso; li povas dummomente esti ĝenata, kiun ajn planon li cetere elektis.

Post la murdo de Vikstido, li ŝajnus esti paŝinta tra



kampoj, direkte al la duno. Oni rakontas ke ĉirkaŭ la sunsubiro, du viroj zorgantaj pri herbejo ne for de Filiko-Fundo, aŭdis voĉon. Tiu voĉo alterne ĝemis kaj ridis : ĝi singultis, ploris poste rekomencis eligi kriojn. Tio devis esti tre stranga. Ĝi alproksimiĝis tra kampon de trifolioj, poste forvelkis flanke de la montetoj.

Intertempe, la nevidebla viro devis sciigi ion pri tio kiun lia amiko Kempo rapide profitis el liaj konfidencoj. Li estis sendube trovinta domojn ŝlositajn, sekurajn; li estis vaginta ĉirkaŭ la stacidomoj, promeninta ĉirkaŭ la gastejoj; kaj, certe, li estas leginta la afiŝojn kaj farinta al si ideon pri la kampanjo instigita kontraŭ li. Ĉar la vespero antaŭiĝis, li vidis aperi en la kampoj ĉi tien kaj tien, grupojn de tri aŭ kvar homoj, li aŭdis la bojadon de la hundoj. Tiuj homĉasistoj havis apartajn instrukciojn en la okazo de renkonto kun la malamiko, pri la maniero helpi unu la alian. Sed Grifino evitis ĉiujn. Eblas al ni imagi lian incitegiĝon, ankoraŭ pliigita de la ideo ke li mem liveris la informojn kies oni uzis kontraŭ li sen ia skrupulo. Dum tiu tago almenaŭ, li perdis kuraĝon; dum preskaŭ dudek kvar horoj, krom kiam li alfrontis al Vikstido, li estis persekutata viro.

Dum la nokto, li devis manĝi kaj dormi; ĉar la matenon de la sekva tago, li retrovis mem, aktiva, timinda, furioza kaj kruela, tute preta por la lasta batalo kiun li devis komenci kun la mondo.

## 27 \_ Sieĝado de la domo de Kempo.

Kempo legis strangan leteron, skribita per kraĵono sur grasa paperfolio.

"Vi estis mirindege energia kaj lerta, diris tiun leteron, sed mi ne sukcesas kompreni tion kion vi gajnas per tio. Vi estas kontraŭ mi. Dum tuta tago, vi postkuris min; vi provis ŝteli al mi iun nokton de dormo. Malgraŭ vi, mi trovis por manĝi; malgraŭ vi, mi sukcesis dormi, kaj la partio nur komenciĝas. Jes, la partio nur komencas... Cetere, ne estas por diri, necesas ke la regno de teruro okazos, jen la unua tago. Haveno-Arkteo ne plu estas sub la regado de la Reĝino; diru tion al via policano, diru tion al la tuta bando : la urbo estas sub mia regado, al mi, kaj mi estas la teruro ! Tiu ĉi tago estas la unua tago de la jaro I de la nova erao, la erao de la nevidebla viro. Mi estas Nevideblulo I<sup>o</sup>.

"Por komenci, la programo estas simpla : la unua tago, okazos ekzekuto, nur por ekzemplo, tiu de iu nomita Kempo. La morto ekiras, ĉe lia adreso, hodiaŭ. Li povas sin kaŝi, enŝlosiĝi, ĉirkaŭiĝi per gardistoj, surmeti kirason se tio ŝajnas bone al li : la morto, la nevidebla morto alproksimiĝas. Ke li zorgu pri sia sekureco : tio kaŭzos des pli da impreson sur mia popolo... La morto foriros el la leterkesto je tagmezo. La letero falos en la keston ĝuste kiam la leterportisto alvenos, kaj la sorto estos ĵetata ! La partio komenciĝas. La morto estas survoje... Ne iru doni helpon al kulpulo, amikoj miaj, pro timo ke la morto ankaŭ surfalus sur vi. Hodiaŭ, Kempo devas morti".

Kiam la kuracisto Kempo ellegis kaj relegis tiun leteron :

- Tio ne estas mistifiko, li ekkriis. Estas ja lia stilo.

Kaj li ne ŝercas !...

Li turnis la folion kaj, sur la adreso, vidis la stampon de la Hintondina poŝtoŝejo, kun tiu ĉi banala detalo : "Du pagendaj pencoj". Li malrapide stariĝis, lasante sian nefinitan tagmanĝon (la letero alvenis per la poŝto de la dektria), kaj li pasis en sian kabineton. Li sonorigis al sia mastrumistinon kaj ordonis al ŝi fari tuj la doman rondiron, kontroli ĉiujn fenestrojn, fermi ĉiujn ŝutrojn. Pri tiuj de sia kabineto, li mem zorgis. En iu ŝlosita tirkesto, en sia dormoĉambro, li prenis malgrandan revolveron, zorge ekzamenis ĝin, kaj metis ĝin en la poŝon de sia jaketo. Li skribis plurajn leteretojn, unu por la kolonelo Adai, kaj li sendigis ilin de la servistino, donante al ŝi eksplicitajn instrukciojn pri la maniero kies ŝi devis eliri el la domo. "Ne estas danĝero", li diris farante tiun mensan restriktion : "Ne danĝero... por vi !" Li restis dummomente pensema, poste reiris al sia tagmanĝo kiu malvarmiĝis.

Li manĝis kun malatentoj. Fine, li frapis la tablon : "Ni kaptos lin, li ekkriis. Kaj mi estas la logilo. Li mise troigos".

Li poste supreniris al la belvedero, zorgante fermi malantaŭ si ĉiujn pordojn.

- Tio estas iu implikita partio, li diris, iu stranga partio... sed la ŝancoj estas ĉiuj por mi, sinjoro Grifino, malgraŭ ke vi estas nevidebla !... kaj malgraŭ via aŭdaco !... Grifino kontraŭ la universo ! Tio transpasus la mezuron !

Li staris apud la fenestro, rigardante la sunplenan marbordon. "Necesas ke li trovu por manĝi ĉiutage... mi ne envas lin... Ĉu li vere dormis lastnokte ?... Ie, subĉiele... ŝirmite kontraŭ renkontiĝoj. Se ni povus havi bonan malvarman veteron, tre malsekan, anstataŭ varmon !... Eble li spionas min, tiumomente".

Li lokis sin tute apud la fenestro. Io vigle frapis la muron el brikoj super la vitrokadro : Kampo saltis reen.

- Mi iĝas nervoza !

Kvin minutoj fluis antaŭ ol li denove alproksimiĝis.

- Tio certe estis pasero, li diris.

Subite, li aŭdis la sonorilon ĉe la enirpordo : li rapidege malsupreniris la ŝtuparon. Li ekmalriglis, turnis la ŝlosilon en la seruro, kontrolis la sekura ĉeno, metis ĝin transverse kaj singarde malfermis, sen montri sin. Familiara voĉo salutis lin : estis Adai.

- Via servistino estis atakita, Kempo, diris la kolonelo malantaŭ la pordo.

- Kiel !

- Oni prenis al ŝi la leteron kiun ŝi portis... Li estas tute proksime de ĉi tie. Lasu min eniri.

Kempo malkroĉis la ĉenon, kaj Adai eniris tra plej mallarĝa pordofendo kiel eble. Li restis en la koridoro, rigardante kun senfina kvietiĝo la dommastron kiu refermis la pordon.

- Li forkaptis al ŝi la paperon el la mano. Li donis al ŝi teruran timon... Ŝi estas tie, ĉe la policejo. Nervoatako... Li estas tute proksime de ĉi tie. Kion vi diris en tiu letero ?

Kempo ellasis sakraĵon.

- Dio ! Kiel mi estis stulta ! Mi devus antaŭsenti tion. Ne estas horo de paŝado de Hintondino ĝis ĉi tie... Jam !...

- Kio estas ?

- Venu vidi, diris Kempo, montrante al kolonelo la vojon al sia kabineto.

Li prezentis al li la leteron de la nevidebla viro. Adai, leginte ĝin, mallaŭte fajfis.

- Kaj vi, tiam ?...

- Mi proponis al vi prepari kaptilon... kaj, kiel stultulo, mi sendis mian planon, per mia servistino, al kiu ?... al li !

Siavice, la kolonelo sakris; poste subite :

- Li forglitos.

- Neniu danĝero !

La frakaso de iu rompita vitro ekvenis de la supro de la ŝtuparo. Adai videtis la arĝentan elbrilon de malgranda revolvero duone eltirita el la poŝo de Kempo.

- Estas fenestro tie supre, diris tiu ĉi.

Kaj li grimpis, antaŭirante la kolonelon.

Dum ili estis ankoraŭ en la ŝtuparo, okazis dua frakaso, kaj kiam ili alvenis en la kabineton, ili trovis du el la tri fenestroj rompitaĵ, la pargeton duone dissternita de vitrosplitoj, dikan ŝtonon falita sur skribotablo. La du viroj haltis ĉe sojlo de la pordo por kontempli la damaĝon.

Kempo denove sakris. Sammomente la tria fenestro krakis kun seka bruo kiel tiu de pistola pafo : la fenestrovitro fendetiĝis, poste fine disfalis en la ĉambron, rompita laŭ dentintaj trianguloj, en mil pecetoj.

- Kion tio signifas ?

- Estas komenco, respondis Kempo.

- Ĉu ne eblas grimpi ĝis ĉi tien ?

- Ho ! ne eĉ por kato.

- Ĉu ne estas ŝutroj ?

- Ne, ne tie. Ĉiuj malsupraj ĉambroj... Hej ! Dio mia !

Nova frakaso; poste obtuza bruo de batoj frapitaj sur tabuloj, malsupre.

- Ke la tero glutu lin ! ekkriis Kempo. Tio devas esti... jes ... estas unu el dormĉambroj. La tuta domo spertos tion... Sed li estas stultulo : La ŝutroj estas fermitaj, la vitro falos eksteren (*En Anglio, la fenestroj estas levofenestroj kun internaj ŝutroj*); li tranĉvundos al si la piedojn.

Ankoraŭ iu fenestro sciigis sian ruiniĝon. La du viroj estis sur la interŝtuparo, perpleksaj.

- Mi havas ideon, eligis Adai. Donu al mi marŝbastonon, ion ajn : mi tuj iros al la policejo kaj liberlasos la spurhundojn al lia spuraro. Tiam, mi opinias ke ni submetos

lin al nia volo !

Iu fenestro ankoraŭ dividis la sorton de la aliaj.

- Ĉu vi ne havas revolveron ?

La mano de Kempo direktiĝis unue al sia poŝo, poste li hezitis :

- Ne, mi ne havas tion... almenaŭ por pruntedoni al vi.

- Mi realportos ĝin al vi. Vi estas sekura ĉi tie.

Kempo, honta esti dumsekunde rompinta sincerecon, prezentis sian armilon.

- Nun ni aliru al la pordo, eligis la kolonelo.

Kiam ili haltis en la vestiblo, hezitemaj, ili aŭdis unu el la fenestroj de la dormoĉambro de la unua etaĝo kraki kaj displitiĝi. Kempo, irante al la pordo, pretiĝis por malrigli plej milde kiel eble. Li havis la vizaĝon iomete pli palan ol kutime.

- Provu rapide forkuri ! li diris.

Ĉe la minuto, kiam Adai troviĝis sur la sojlo, la rigliloj tuj revenis en la fermilojn. Estis momento de necerteco, li sentis sin pli serena kun la dorso sur la pordo. Poste, digne kaj brustoŝvelante li malsupreniris la ŝtupojn. Li trairis la gazonon. Li alproksimiĝis al la krado kiam delikata zefiro ŝajnis kuri sur gazono; io moviĝis apud li.

- Haltu iomete ! diris voĉo.

Adai ekhaltis kun mano kuntirinta sur la revolvero.

- Kio ? li eligis, pala kaj malkvieta, kun la nervoj vigle streĉitaj.

- Faru al mi la plezuron reiri al la domo ! diris la voĉo per tono tiel seka kaj kruda kiel tiu de la kolonelo.

- Mi bedaŭras ! rebatis Adai subite iom raŭka.

Kaj li lekis la lipojn.

La voĉo estis, li kredis, antaŭ li maldekstre. Se li provis per iu kuglo !...

- Kien vi iras ? la voĉo demandis.

Ambaŭ interparolantoj faris rapidan movadon; la revolvero brilis en la duonfermita poŝo de la kolonelo. Tiu ĉi rezignis pafi, li pripensis.

- Kien mi iras ? li malrapide rediris. Tio estas mia afero.

Tiuj vortoj estis ankoraŭ sur liaj lipoj ke brako ĉirkaŭis lian kolon; li ricevis genuon en la dorso kaj estis renversen tirata. Li mallerte elprenis sian armilon, kaj pafis tuthazarde. Tuj li ricevis baton sur la buŝon kaj la revolvero estis elŝirita de li el la mano. Vane li penis kapti netrafeblan kruron kaj elŝoviĝi; li falis dorsen.

- Damna !... li eligis.

La voĉo ekridegis :

- Mi tuj mortigus vin, ĝi eldiris, se ne estus por perdi kuglon.

Adai vidis la revolveron en la aeron, je ses futoj [1,75m] antaŭ li, kiu celis lin.

- Tiam ? li demandis, metante sin sur sia postaĵo.

- Levigu vin !

Adai leviĝis.

- Atentu ! ordonis la voĉo per firma tono. Ne provu ludi kun mi. Memoru ke mi ja vidas vian vizaĝon, se vi ne vidas la mian. Vi tuj reiros en la domon.

- Sed li ne lasos min eniri.

- Domaĝe ! Ne estas kun vi ke mi traktas.

Adai denove lekis siajn lipojn.

Deturnante siajn rigardojn, li vidis malproksime la bluan kaj malhelan maron sub la tagmeza suno, la bone tonditan gazonon ĉe siaj piedoj, la blankan klifon, la bruoplenan urbon; kaj subite li komprenis ke la vivo estas tre dolĉa. Siaj okuloj redirektiĝis al tiun etan metalan objekton, pendanta inter ĉielo kaj tero, je ses futoj antaŭ li.

- Kion mi devas fari ? li demandis per senĝoja tono.

- Kiel ! "Kion mi devas fari ?" Vi devas nur iri returne.

- Mi provos. Se li lasas min eniri, ĉu vi promesas ne ĵeti vin al la pordo ?

- Ne estas kun vi ke mi traktas.

Kempo, post esti elirigi Adai<sup>on</sup>, estis rapidege resuprenirinta en sian kabineton; rampanta meze de rompita vitro, rigardanta singardeme super la rando de la fenestro, li vidis la kolonelon en intertrakto kun la nevideblulo. "Kial li pafas ?" li flustris. Ĝuste tiam la revolvero iom moviĝis; iu sunrebrilo trafis la okulojn de Kempo. Per la mano, tiu ĉi faris al si lumŝirmilon, kaj provis sekvi la direkton de la radio kiu blindigis lin.

- Jes ja ! li eligis. Adai transdonis al li sian revolveron.

- Promesu ne ĵeti vin al la pordo ! ripetis la kolonelo je tiu momento. Ne daŭrigu partion gajnata.

- Reiru al la domo. Mi klare diras al vi ke mi promesas nenion.

Adai subite ŝajnis esti fiksinta decidon. Li direktis sin al la domo, malrapide, kun manoj dorse. Kempo tre senhelpa subobservis lin. La revolvero malaperis, denove ekbrilis, ankoraŭ malaperis, kaj laŭ pli atenta ekzameno, montriĝis sub la formo de malgranda malhela objekto kiu sekvis la kolonelon.

La aferoj okazis tre rapide. Adai saltis dorsen, turnis sin dum unu spiro, volis ekkapti la malgrandan objekton, maltrafis ĝin, levis la manojn, falis antaŭen sur la nazo : super li, ŝvebis en la aero floko de blua fumo. Kempo ne aŭdis la bruon de la pafado. La kolonelo tordiĝis, leviĝis sur unu brako, refalis antaŭen kaj restis senmova.

Dum momento, Kempo restis konsternita de la trankvila indiferenteco kiun la sinteno de la kolonelo indikis. La posttagmezo estis tre varma kaj tre kvieta; nenio ŝajnis moviĝi en la universo krom paro de flavaj papilioj



postkurantaj unu la alian tra la arbustoj, inter la domo kaj la krado. Adai restis kuŝanta sur la gazono apud la krado. La rulkurtenoj de ĉiuj vilaoj ĉe la piedo de la monteto, estis mallevitaj; sed en malgranda verda pavilono, oni vidis blankan kapon, sendube iu dormanta oldulo. Kempo atente rigardis en la tuta ĉirkaŭaĵo, serĉante la revolveron per la okuloj : ne plu da revolvero ! Liaj okulojn direktiĝis al Adai... La partio vere komenciĝis.

Tiam li aŭdis soni kaj frapi sur la enirpordo. La batadoj fariĝis insistaj. Sed laŭ la ordonoj de Kempo, la geservistoj sin enŝlosis en siaj ĉambroj. Sekvis poste silento. Kempo sidiĝis kun la orelo streĉita; li singarde rigardis eksteren tra ĉiu el la tri fenestroj; li iris al la interŝtuparon supre de la ŝtuparo; tie li aŭskultis, tre malkvieta. Arminta per la fajropikilo de sia ĉambro, li malsupreniris denove ekzameni la internan fermilon de la teretaĝaj fenestroj. Ĉio estis en bona stato. Li resupreniris al la belvedero. Adai estis ankoraŭ senmove kuŝinta rande de la sabloŝutita aleo, kiel li falis. Sur la vojo laŭiranta la vilaojn, Kempo ekvidis la servistinon kaj du policanojn.

Ĉie kvieto de mortulo. La tri homoj ŝajnas tre malrapide proksimiĝi. Kempo demandis al si kion ja povis fari sia malamiko.

Subite li ektemis : iu granda frakaso venis de malsupre. Post esti unue hezitante, li remalsupreniris. Subite la domo tondris per pezaj batoj kaj per bruo de ligno disrompiĝanta. Li aŭdis iun fenestran vitron frakasiĝi, poste ŝutroj skuiĝi kun bruo de feraĵoj. Li turnis la ŝlosilon kaj malfermis la kuirejan pordon. Sammomente la ŝutroj fendigiĝis, displitiĝis, venis fali internen. Li restis konsternita. La fenestroframo, krom unu fenestrokrucio, estis ankoraŭ sendifekta; sed malgrandaj vitrodentoj postrestis solaj laŭlonge de la kadro. La ŝutroj estis

disbatitaj per hakilo, kaj nun tiu hakilo vigle atakis la fenestroframon kaj la ferajn stangojn kiuj protektis ĝin. Subite la ilo saltis flanken kaj malaperis.

Kempo vidis la revolveron ekstere, surgrunde, en la aleo : poste ĉi tiu malgranda armilo saltis supren. Li retiriĝis. La pafo eliĝis tro malfrue, sed tre ĝusta : splito de la pordorando kiun li refermis post si, flugis super sia kapo. Li klakigis la pordon kaj turnis la ŝlosilon. Aliflanke, li aŭdis Grifino<sup>n</sup> ridi kaj krii. Poste estis la hakilo kiu rekomencis sian detruan laboron.

Kempo, staranta en la koridoro, strebis pripensi. Post momento, la nevidebla viro estos en la kuirejo; la pordo ne haltigos lin dum minuto; kaj tiam...

Denove oni sonorigis ĉe la enira pordo. Eble estis la policanoj. Li kuris en la vestiblo, malligis la ĉenon kaj elglitigis la riglilojn; li paroligis la servistinon antaŭ ol tute forigi la sekurecan ĉenon : tri homoj unubloke sin pelis enen. Kempo rapidis refermi ĝin.

- La nevidebla viro ! li ekkriis. Li havas revolveron... kaj ankoraŭ du kuglojn. Li mortigis Adai<sup>on</sup>. Li almenaŭ vundis lin. Ĉu vi ne vidis lin sur la gazono ? Li estas tie surgrunde.

- Kiu do ? demandis unu el la policanoj.

- Adai !

- Ni venis tra la malantaŭa aleo, klarigis la servistino.

- Kio estas tiu ĉi frapobruo ? pridemandis la alia policano.

- Li estas en la kuirejo... aŭ li estos tien tre baldaŭ. Li trovis hakilon...

Subite, la tuta domo tondris pro frapitaj batoj de la nevidebla viro sur la kuireja pordo. La servistino fikse rigardis al la kuirejon poste rifuĝis en la manĝoĉambron. Kempo provis komprenigi sin per hakataj frazoj. Ili aŭdis cedi la pordon.

- Tiu ĉi flanko ! kriis Kempo, eliĝante el sia stuporo.
- Kaj li pelis la policanojn al la sojlo de la manĝoĉambro.
- La fajropikilo ! kriis Kempo impetegante al la

fajroŝirmilo.

Li prezentis al unu el la policanoj la fajropikilon kiun li alportis, kaj al la alia, tiun de la manĝoĉambro. Subite, li saltis dorsen.

- Ho ! eligis unu el la policanoj.

Kaj li ĵetis sin antaŭen, ricevante baton de hakilo sur sia fajropikilo.

La revolvero pafis unu el siaj lastaj kugloj kaj kreviĝis sur la muro, iu "Sidnei Kooper" el alta valoro. La alia policano faligis sian fajropikilon sur la malgrandan armilon, kiel oni batmortigas vespon : li sendis ĝin ruliĝi sur la plankon.

Ĉe la unua bruo, la sevistino eligis krion, stariĝis kriegante apud la fajrujo, poste kuris malfermi la ŝutrojn - sendube kun la intenco forfuĝi tra la fenestro.

La hakilo retroiris en la koridoron kaj okupis spacon proksimume je du futoj [ $\pm 0,6m$ ] super la grundo. Oni aŭdis anheli la nevideblan viron.

- Forigu ambaŭ, diris tiu ĉi. Estas kun Kempo ke mi traktas.

- Kaj ni, estas kun vi ke ni traktas ! respondis la unua policano.

Li faris rapidan paŝon antaŭen, sondante per sia fajropikilo en la direkto de la voĉo. La nevidebla viro nepre retropaŝis dorsen; li iris bati kontraŭ la ombrelujon.

Tiam, ĉar la policano ŝanceliĝis, skuita de la brutaleco mem de sia bato, la hakilo fronte trafis lin : la kasko kaviĝis kiel kartonon, kaj la viro iris ruliĝi suteran ĝis la sojlo de la kuirejo.

La alia policano, celanta malantaŭ la hakilo per sia fajropikilo, trafis ion molan kiu cedis. Okazis dolorkrio, kaj

la hakilo falis planken. La policano denove frapis la malplenan kaj renkontis nenion; li metis la piedon sur la hakilon kaj ankoraŭ frapis. Poste li stariĝis, svingante sian fajropikilon, streĉante la orelon, atenta pri la plej eta movo.

Li aŭdis la fenestron de la manĝoĉambro malfermiĝi, kaj rapidajn paŝadojn kuri tra la ĉambro. Lia kamarado kaŭriĝis, sidrektiĝis sur sia postaĵo, kun sango kiu fluis sur li inter la okulo kaj la orelo.

- Kie li estas ? demandis la vundito.

- Mi ne scias, sed mi trafis lin. Li estas ie en la vestiblo, krom se li elŝteliĝis malantaŭ vi. Doktoro !... Sinjoro !... Doktoro !...

La dua policano provis restariĝi. Fine, li sukcesis. Subite la obtuza bruo de nudaj piedoj aŭdiĝis ĉe la kuirejo.

- Hola ! kriis la unua policano.

Kaj li ĵetis la fajropikilon kiu iri frakasi malgrandan gasbekon. Li ŝajnis persekuti la nevideblan viron en la kuirejo. Poste, kredante pli bone fari, li eniris en la manĝoĉambron.

- Doktoro !... li komencis.

Kaj li restis senparole.

- La kuracisto Kempo estas heroo ! li reparolis, kiam sia kamarado alvenis por rigardi super sia ŝultro.

La fenestro de la manĝoĉambro estis tute malfermegita. Nek la servistino, nek Kempo estis tie.

La ideo kiun la dua policano havis pri Kempo, tiumomente, ne estis malpli brila.

## 28 \_ La ĉasisto ĉasata.

Sinjoro Helaso, la plej proksima najbaro de Kempo, dormis en sia pavilono, kiam la sieĝo de la domo komenciĝis. Li apartenis al la kuraĝa plimulto kiu rifuzis kredi al "tiu ridinda rakonto" de nevidebla viro. Lia edzino, tamen - li devis memori tion iom pli poste - kredis ja tion. Li nepre volis promeni en sia ĝardeno, kvazaŭ nenio okazis; kaj dum la posttagmezo, li iris ripozi kiel homoj el lia aĝo volonte faras tion. Li endormiĝis magraŭ la bruo de frakasitaj fenestroj; sed li abrupte ekvekiĝis kun la stranga konvinko ke bedaŭrindaĵo tamen okazis. Li rigardis eksteren en la direkto de la domo de Kempo; frotis al si la okulojn kaj denove rigardis. Tiam li ellitiĝis kaj sidiĝis, streĉante la oreilon. Li diris al si ke li haluciniĝis. Kaj tamen ne, fakte estis tie io stranga : la domo ŝajnis forlasitaj de monatoj, sekve de ia tumulto. Ĉiuj fenestroj estis rompitaĵoj, kaj ĉe ĉiuj, krom tiuj de la belvedero, la internaj ŝutroj estis fermitaj.

- Mi ja ĵurus ke ĉio estis kiel kutime (li eltiris sian poŝhorloĝon), antaŭ nur dudek minutoj...

Li aŭdis regulajn skuadojn, poste bruon de rompita fenestrovitro. Tiam, dum li estis tie kun malfermita buŝo, okazis ankoraŭ pli miriga afero. La ŝutroj de la manĝoĉambro vigle malfermiĝis kaj la servistino ekaperis, kun ĉapelo, senespere penanta levi la fenestroframon. Subite viro montriĝis malantaŭ ŝi kaj venis helpe al ŝi : estis la kuracisto Kempo. Kaj tuj, la fenestro malfermita, la servistino malfacile elŝovis sin eksteren; ŝi ĵetis sin antaŭen kaj malaperis meze de la arbustoj. S<sup>ro</sup> Helaso, antaŭ tiu ĉi strange ga spektaklo, stariĝis eligante mirajn ekkriojn. Li

vidis Kempo mem stariĝi sur la fenestrojlo, salti de tie kaj tuj reaperi kuranta laŭlonge de aleo inter la boskoj, kaj klinante sin kiel homo kiu volegas ne esti vidata. Li forkuris malantaŭ citizon, kaj reaperis transiranta heĝon kiu kondukis al la duno. En sekundo li supersaltis ĝin kaj daŭrigis sian kuradon kun senbrida rapideco, rulfalis la deklivon en la direkto de S<sup>ro</sup> Helaso.

- Disinjoro ! ekkriis tiu ĉi, trafita de subita ideo, estas tiu besto de nevidebla viro !... Se tamen tio estis vera !

Por S<sup>ro</sup> Helaso, pensi pri tiaj aferoj kaj agi, estis tutsame. Lia kuiristino kiu observis lin de la supra fenestro, miris vidi lin, tre skuita, kiu revenis al la domo per alta rapideco de naŭ mejloj hore [ $\pm 15\text{km/h}$ ]. Oni aŭdis batfermi la pordojn, tondri sonorilojn, kaj kriaĉi S<sup>ro</sup> Helaso kiel bovido.

- Fermu la pordojn ! Fermu la fenestrojn ! Fermu ĉion ! Jen la nevidebla viro kiu alvenas !

Tuj la domo pleniĝis per kriadoj, ordonoj, hastemaj paŝadoj. S<sup>ro</sup> Helaso persone kuris fermi la francmanierajn fenestrojn kiuj rigardis al la verando. Ĝuste tiam, ekaperis super la ĉirkaŭbarilo de la ĝardeno, la kapon, la ŝultrojn, poste la genuon de Kempo. Post minuto, tiu ĉi, traborinte al si vojon tra la asparagoj, alkuris tra la agro al la domo.

- Vi ne eniros, ekkriis S<sup>ro</sup> Helaso enŝovante la riglilojn. Se li kursekvos vin, mi tre bedaŭras... sed vi ne eniros !

Kempo, kun terurita vizaĝo, aperis tute kontraŭ la fenestra vitro, frapis, skuis kiel frenezulo, la francmanieran fenestron. Vidante siajn penadojn senutilaj, li kuris laŭlonge de la verando, saltis, batis per frapilo la oficejan pordon. Li sekve ĉirkaŭiris ĝis antaŭ la domo, poste reiris sur la vojon al la monteto.

S<sup>ro</sup> Helaso, rigardante tra sia fenestro, la teruron sur la vizaĝo, apenaŭ vidis malaperi Kempon ke lia bedo da asparagoj estis denove piedpremita al la sama direkto, fare

de piedoj kiujn oni ne vidis. Tiam, S<sup>ro</sup> Helaso hastege supreniris al la unua etaĝo : la sekvo de la ĉasado eskapis al li. Sed kiam li pasis antaŭ la fenestro de la ŝtuparo, li aŭdis klaki la pordeton de la ĝardeno.

Distingiĝante sur la vojo al la monteto, Kempo nature komencis malsupreniri al la urbo. Li mem povis nur sekvi ekzakte la vojiron kiun, de supre de sia belvedero, kaj per tiom atentema okulo, li vidis Marvelo<sup>n</sup> sekvi antaŭ kvar tagoj. Li bone kuris rilate al homo ne trejnita. Kvankam lia vizaĝo estis pala kaj eliganta ŝviton, li konservis sian sinregadon. Li kuris per larĝaj paŝegoj kaj ĉiufoje kiam estis malfacila trairejo, kiam la tereno fariĝis neegala aŭ ŝtonplena, aŭ kiam peco de rompita vitro brilis sur la grundo, li pasis sur ĝi, lasante la nevideblan viron kiu nudpiede postkuris lin, elekti la direkton kiun li volus.

Unuafoje en sia vivo, Kempo rimarkis ke ĉi tiu vojo estis treege longa kaj dezerta, kaj ke la domoj de la ĉirkaŭurbo piede de la monteto, estis ege foraj. Neniam li ekkonsciis ke la kurado estis tiel malrapida kaj tiel peniga transportrimedo. Ĉiuj malgrandaj vilaoj, dormantaj sub la posttagmeza suno, ŝajnis ŝlositaj, barikaditaj. Sendube ili estis ŝlositaj kaj barikaditaj laŭ liaj propraj ordonoj; sed fine, ili ja povintus resti viglecatentaj pri eksteriĝoj antaŭvide al tia okazo !

La urbo nun staras antaŭ li; transe, malantaŭ ĝi, la maro malaperis; homoj moviĝis tien. Iu tramo alvenis ĝuste ĉe la piedo de la monteto. Pli for, estis la policejo. Sed ĉu estis paŝoj kiujn li ekaŭdis malantaŭ si ? Ĉu li estis kuratingita ?

La homoj tie, obstine rigardis al lia flanko; unu aŭ du uloj ekkuris; lia spirado bruis kiel segilo en lia gorĝo. La tramo nun estis tute proksima, kaj la Ĝojaj Ludantoj de Kriketo riglis sian pordon kun bruo. Malantaŭ la tramo, fostoj kaj sablamasoj de la stratprizorgado..., Kempo, dum

sekundo, ekpensis salti en la tramon kaj enfermi sin tie. Poste li decidis iri ĝis la policejo. Post momento, li preterpasis antaŭ la pordo de la Ĝojaj Ludantoj de Kriketo, li estis fine de la strato, kun estuloj ĉirkaŭ li. La koĉero de la tramo kaj sia helpanto, mirigitaj pro lia impeta hastego, staris tie kun la maljungitaj ĉevaloj. Pli for, teraĵistoj ankaŭ vidigis, super sablamasoj, siajn surprizitajn vizaĝojn.

Kempo iom malrapidigis sian kuradon; li aŭdis la rapidajn paŝadojn de la malamiko kaj, denove, eksaltis antaŭen.

- La nevidebla viro ! li kriis al la teraĵistoj, kun malklara gesto.

Kaj pro subita inspiro, li transsaltis la tranĉeo kaj tiel okazigis movoplenan grupon inter li kaj la alia.

Tiam, forlasante la ideon de la policejo, li turniris al malgranda flanka strato, laŭiris kontraŭ ĉareto de legomoj, hezitis dum dekona sekundo ĉe la pordo de iu sukeraĵisto, poste direktis sin al la eniro de strateto kiu revenis malantaŭen al la ĉefa strato. Du aŭ tri infanetoj ludis tie : vidante lin, ili eligis kriojn kaj haste disiris kaj, tujtuj fenestroj kaj pordoj malfermiĝis, panikitaj panjoj montris la kvaliton de sia koro. Kempo revenis en la straton Hill, je tricent metroj de la tramlinio; kaj tie, li aŭdis kriegadojn de homoj kiuj kuris.

Li ekrigardis al la supro de la strato, ĉe la flanko de la monteto. Je apenaŭ dudek kvin paŝoj, grandega teraĵisto kuris, kraĉante hakatajn sakraĵojn, frapante trafe maltrafe per ŝpato. Tuj post venis la tramkoĉero kun pugnigitaj manoj. Aliaj sekvis, eligante kriojn, disdonante batojn. En la strato, direkte al la urbo, viroj kaj virinoj ankaŭ kuris. Kempo klare rimarkis iun laboriston kiu eliris el butikoj kun bastono enmane.

- Foren ! Foren ! iu kriis.

Kempo tiam komprenis ke la homĉaso ŝanĝis. Li haltis,



rigardis ĉirkaŭ si, anhelante.

- Li estas tute proksime de ĉi tie ! li kriis. Baru la straton !...

Li ricevis viglan baton super la orelo kaj ekŝanceliĝis penante por sin turni al la kontraŭulo kiun li ne vidis. Li apenaŭ sukcesis reakiri sian ekvilibron; li rebatis, sed en la aero. Poste, li estis denove trafita sub la makzelon kaj sterniĝis plene etendita. Post sekundo, genuo premis al li la bruston, kaj du furiozaj manoj ĉirkaŭpremis lian gorĝon, sed unu kun malpli da forto ol la alia. Li kaptis siajn pojn, aŭdis la atakanto eligi dolorkrion; poste la ŝpato de la teraĵisto venis turniĝadi en la aero super li kaj frakasiĝi sur ion kun obtuza bruo. La mano kiu premis al li la gorĝon subite malstreĉiĝis, kaj per spasma strebo, Kempo sukcesis liberiĝi, ekkaptis molan ŝultron kaj ruliĝis sur sian kontraŭulon. Li retenis kontraŭ la grundo kubutojn kiujn li ne vidis.

- Mi tenas lin ! li kriegis. Helpon ! Helpon !... Tenu lin ! Li estas surgrunde ! Kaptu al li la piedojn !

Tuj oni rapidis, ĉiuj samtempe, al la du luktantoj : iu fremdulo, neatendite ekestanta, povintus kredi ke okazis tie nekutime obstina partio de piedpilko. Post la krio de Kempo, oni cetere aŭdis nenion pli ol la bruon de batoj, de piedpremadoj kaj iun penigan spiradon.

Post supera penado, la nevidebla viro stariĝis, ŝanceliĝanta. Kempo alsaltis al lia kapo, kiel hundoj faras tion al cervo, kaj dekduo da manoj kaptis kaj ŝiris la malamikon en la malpleno. La tramkoĉero kaptis la kolon kaj lin faligis dorsen. Konfuza grupo da viroj baraktantaj denove ruliĝis surgrunde. Tiam okazis, mi timas tion, kelkaj teruraj piedbatoj, poste subite, oni aŭdis senesperan krion "Indulgon ! Indulgon !" kiu tuj sin perdis en stertoro de sufokiĝo.

- Retroen ! Stultuloj ! eligis la obtuza voĉo de Kempo.

Okazis vigla retroiro de dikmuskolaj ombroj.

- Li estas vundita, mi diras al vi. Forigu !

Post momento de lukto, malgranda spaco estis liberigita. Poste rondo de malpaciencaj vizaĝoj vidis la kuraciston genuintan, ŝajnis, en aero je dekkvin koloroj [ $\pm 35\text{cm}$ ] super la grundo, kaj tenantan kontraŭ tero, brakojn kiujn oni ne vidis. Malantaŭ li, iu policano premis ankaŭ nevideblajn maleolojn.

- Ne maltenu lin ! kriis la dika teraĝisto, ankoraŭ tenanta sian ŝpaton makulitan per sango. Li ŝajnigas.

- Ne, li ne ŝajnigas, diris la kuracisto, singardeme levante sian genuon; mi taskas al mi teni lin.

La kuracisto havis vizaĝon tute kontuzita kaj kiu jam ruĝiĝis. Li malfacile parolis, ĝenata pro sia lipo kiu sangis. Li maltenis iun manon kaj ŝajnis palpi la vizaĝon.

- La buŝo estas tute malseka !... li diris. Bona Dio !

Li abrupte rektiĝis, poste genuiĝis surteren, apud la nevidebla korpo. Okazis puŝo, interpuŝiĝo, sono de pezaj paŝoj : amaso da novvenintoj ankoraŭ pliigis prematecon. Homoj eliris el la domoj. La pordoj de la gastejo estis, en palpebruma daŭro, tute malfermegitaj. Oni preskaŭ ne plu parolis. Kampo palpis ĉi tie kaj tien; lia mano ŝajnis moviĝi en la malplena aero.

- Li ne plu spiras !... Mi ne sentas lian koron !... Lia flanko... Diable !

Maljunulino kiu rigardis super la brako de la dika teraĝisto, eligis akutan krion : "Vidu do tien !"

Ŝi etendis sian tute sulkiĝintan fingron. Rigardante la lokon kiun montris, ĉiu vidis, delikatan kaj travideblan manon - kvazaŭ ĝi estintus farita el vitro, tiel ke vejnoj kaj arterioj, ostoj kaj nervoj povus esti distingitaj - manon senfortan kaj falantan; ĝi ŝajnis kovriĝi per nuboj kaj fariĝi opaka sub iliaj okuloj.

- Atentu ! kriis la policano. Jen la piedo komencas aperi.

Tiel, malrapide, komencante ĉe la manoj kaj piedoj, senhaste etendiĝante laŭlonge de la membroj ĝis la vitalaj organoj, okazis tiu stranga transformo, tiu reveno al la stato de videbla substanco. Estis kiel la malrapida invado de veneno. Unue, la vejnoj blankaj, desegnante la skizon vaporecan kaj grizetan de membro; poste la travideblajn ostojn kaj la malsimplan reton de arterioj; poste la karnon kaj la haŭton, malprecizajn, apenaŭ distingeblajn, rapide iĝante solidajn kaj opakajn. Baldaŭ oni povis vidi la difektitan bruston, la ŝultrojn kaj la necertan konturon de la dispecigita vizaĝo.

Fine, kiam la homamaso malproksimiĝante permesis al Kempo restariĝi, oni vidis, kuŝantan surgrunde, nudan kaj kompatindan, la vundoplenan kaj rompitan korpon de viro de proksimume tridek jaroj. Lia hararo, liaj brovoj estis blankaj - ne blankiĝintaj pro la aĝo, sed blankaj el la blankeco de albino; liaj okuloj estis ruĝaj kiel grenatoj. Liaj manoj estis fermitaj, liaj okuloj larĝe malfermitaj, kun esprimo de kolero kaj de malespero.

- Kovru al li la vizaĝon ! kriis iu. Pro amo al Dio, ke oni kovru al li la vizaĝon !

El la Ĝojaj Ludantoj de Kriketo, oni alportis tukon; poste lin kovrinte de ĝi, oni alportis lin en la gastejon... Kaj li estis tie, sur abomeninda lito, en senkaraktera kaj malbone lumigita ĉambro, meze de malkleraj kaj bruemaj homamaso, rompita, vundita, perfidita, sen ke iu kompatu al li, tiu ĉi Grifino, la unua homo kiu nevidebligis sin, Grifino, la plej naturdotita fizikisto kiun la mondo neniam havis : li elfinis, per nekredebla katastrofo, sian strangan kaj teruran karieron.

## Epilogo.

Tiel finiĝas la eksperimento, ne malpli stranga ol krima, de la nevidebla viro. Se vi volas scii pli pri li, necesas iri al malgranda gastejo, apud Stoŭe-Haveno, kaj paroli al la mastro. Sur la ŝildo, oni vidas nur botojn kaj ĉapelon, kun tiu ĉi surskribo :

### ĈE LA NEVIDEBLA VIRO.

La mastro estas eta viro, mallonga kaj dika, kun elstara cilindroforma nazo, rigidaj haroj kiel tamburfrapiloj, roza vizaĝo kiel koralo. Trinku malavare, kaj li larĝakore rakontos al vi ja, ĉion kio okazis al li post la afero kaj kiel la leĝuloj provis "trompakiri" de li, la monon trovita en siaj poŝoj.

- Kiam ili malkontestis ke ili ne povis demonstri al kiu estis la mono, mi volas esti pendumita, li ripetis, se ili ne volis ŝajnigi min kiel trovinton de trezoro... Nu, ĉu mi aspektas kiel trovinto de trezoro ? Poste iu ĝentlemano donis al mi gineon por, kelkan vesperon, rakonti la historion ĉe la koncertkafejo de la Imperio.

Kaj, se vi sentas la bezonon abrupte interrompi la fluadon de liaj rememoroj, tio ĉiam estos facila : demandu al li ĉu ne temis, en lia historio, pri tri manuskriptoj. Li agnoskas ke fakte temis pri tio; kaj li klarigas, kun protestoj, ke ĉiuj kredas ke li posedas ilin. Sed, bona Dio !, li ne havas ilin. "La nevidebla viro prenis ilin por kaŝi ilin, je la momento kiam mi forlasis lin, fuĝante al Stoŭe-Haveno... Estas S<sup>o</sup> Kempo kiu metis en la kapon de homoj ke mi havis ilin".

Tiam li enprofundiĝas en pensado, kaŝe observas vin, movas malpacience glasojn kaj baldaŭ forlasas la vendotablon.

Li estas fraŭlo- liaj gustoj estis ĉiam favora al senedzineco - kaj ne ekzistas virino en la domo. Supre, lia vestaĵo estas butonata kiel taŭgas; sed pri liaj hejmecaj subvestoj, rilate al la ŝelkoj, ekzemple, li gardis la kutimon de ŝnuretoj. Li estras sian konsumojon sen iniciatemo, sed kun perfekta digno. Liaj movadoj estas moderaj : li estas pensulo. Li havas en la vilaĝo reputacion de saĝeco kaj de respektinda ekonomio. Pro lia kono de la sudaj vojoj de Anglio, li superis Kobbetton mem (*Angla aŭtoro, fama pro sia perfekta kono de suda Anglio*).

Dimanĉon matene, ĉiujn dimanĉojn matene, dum la tuta jaro, kiam la gastejo estas fermita al la homoj, kaj same ĉiujn vesperojn post la deka, li iras en la salonon kun glaso da ĝino iomete miksitaj kun akvo kaj, demetinte ĝin, li ŝlosas la pordon, ekzamenas la rulkurtenojn, rigardas sub la tablon; poste, post kiam li certas esti sola, li malfermas la ŝrankon, iun tirkeston de tiu ĉi ŝranko, iun skatolon en tiu ĉi tirkesto : el ĝi, li eltiras tri volumojn binditajn en bruna ledo, metas ilin kun graveco meze de la tablo. La pletoj estas eluzitaj de la tempo kaj makulitaj de verdetaĵaj koloroj; ĉar, iam, ili restadis en iu fosaĵo, kaj kelkaj paĝoj estis nebuligitaj de malpura akvo. La mastro sidiĝas en seĝon, malrapide plenŝtopas sian longan pipon el tero, sen perdi siajn volumojn dum momento de antaŭ la okuloj. Poste li metas unu el ili antaŭ li kaj komencas priatenti ĝin, turnante kaj returnante la foliojn. Li havas la brovojn kuntiritajn; movas la lipojn kun peno.

- Iu x; iu malgranda<sup>2</sup> supren, iu kruco, poste... Diablo prenu lin !... Ha ! Disinjoro ! Kia viro li estis pri la intelekto !

Baldaŭ, li delasas la libron kaj apogas sin malantaŭen. Palpebrumante, li rigardas tra la fumo de sia pipo ĉe la alia fino de la ĉambro, aferojn nevideblajn por ĉiu alia krom li.

- Estas plene da sekretoj tio ! li diris, da timigaj

sekretoj! Se iam mi konos la veran kaŭzon de la afero...  
Disinjoro... Ho, mi ne volus fari tion kion li faris. Mi nur  
volus... jes...

Tiam li prenas enspiraĵo de sia pipo; glitas en revo, la  
eterna kaj mirinda revo de sia vivo... Kaj kvankam la  
kuracisto Kempo senhalte serĉis ĉiufanken, neniu estulo,  
ekster la gastejestro, scias ke la libroj ekzistas tie,  
enhavanta la subtilan sekreton de la nevidebleco kun dekduo  
da ne malpli strangaj aliaj. Neniu scios ion ĝis lia morto.